Amnestio Internacia:

2014/15 – tre malbona jaro por la homaj rajtoj en la mondo

Precipe BRICS-, islamaj kaj (eks)komunismaj ŝtatoj elstaras kiel krudaj lezantoj de la homaj rajtoj

Volo kaj progresoj por plibonigi la situacion estas nur malgrandaj

Male: La tuta mondo estas minacata de la islama terorismo kaj de novaj regionaj militoj
Ruslando minacis la Okcidenton per „sindefendo“ per nukleaj armiloj
En la mondo ekzistas 60 milionoj da rifuĝintoj
kaj 20 milionoj da viktimoj de homa komercado kaj sklaveco

La jaro 2014/15 estis malbona por la homaj rajtoj kaj malfacila por ĉiuj aktivuloj, kiuj kuraĝis lukti por la respektado de la homaj rajtoj, plendas Salil Shetty, internacia ĝenerala sekretario de Amnestio Internacia (AI). Multaj homoj devis fariĝi atestantoj de tio kiel ilia lando transformiĝis al milita zono. Kutime, la registaroj de la mondo ne laciĝas emfazi, ke la homaj rajtoj havas prioritaton en iliaj landoj. Malgraŭ tio, multaj politikistoj mizere fiaskas, se temas pri tio doni protekton al tiuj homoj, kiuj plej urĝe bezonas ĝin. Kvankam la humaneca internacia juro[1] malpermesas ataki la civilan popolon, konfliktoj daŭre okazas ĝuste je la kosto de tiu civila popolo. Konklude: La humaneca internacia juro estas tretata per piedoj, praktike en ĉiuj landoj de la mondo, en iuj pli, en aliaj malpli draste, kiel montras la plej nova raporto de Amnestio Internacia.[2]

Ke la pasinta jaro estis katastrofa por la homaj rajtoj ĝenerale kaj milionoj da homoj aparte, konfirmis ankaŭ Selmin Caliskan, ĝenerala sekretariino de la germana sekcio, kiu konstatas, ke la ekstrema perforto, kiun precipe ne-ŝtataj grupiĝoj lanĉis kaj lanĉas kontraŭ civiluloj, estas nova tendenco. Precipe la sinteno kaj senhelpeco de Eŭropo rilate al la situacio de homoj, kiuj suferas pro militaj atakoj, turmentado, seksa perforto, sklavigo kaj forpelado, estas hontinda. AI riproĉas al la monda poltiko, ke ĝi nur dimanĉ-predikas, anstataŭ konkrete helpi. La konkludo de AI estas, ke la mondo fiaskis se temas pri helpo al la suferanta civila loĝantaro. En la eksportado de armiloj Germanio ludas aparte „senrespondecan“ rolon.[3]

La kresko de retorikaj rasismaj atakoj kontraŭ eksterlandanoj, rifuĝintoj, migrantoj kaj azilpetantoj igis la Eŭropan Konsilion lamenti pri tiuj tendencoj en la „Jarraporto de la Komisiono kontraŭ rasismo kaj maltoleremo“ (ECRI).[4]

La plej aktualaj landoj kaj plej drastaj kazoj – tutmonda superrigardo

Sirio/Irako – Gaza/Israelo – Afganio/Pakistano – Ukrainio/Krimeo

La plej kruda aktuala kazo estas ***Sirio***, kie la milito kostis ĝis nun minimume 250´000 mortviktimojn ĉefe inter la civila popolo mem. Ban Ki Mun, ĝenerala sekratario de UN, parolis pri „buĉado“. Laŭ informo de UN de la 8a de julio 2015, ĝis nun pli ol 4 milionoj da sirianoj fuĝis al eksterlando,[5] kaj ene de Sirio mem troviĝas 2,6 milionoj da rifuĝintoj, kiuj forkuris de la bataloj, kiuj furoras inter rivalaj soldataroj, kaj de la terorismo de la t.n. „Islama Ŝtato“, kiu okupas kaj kontrolas pli kaj pli grandan teritorion de Sirio kaj Irako, kvankam usonaj aviadiloj klopodas forpeli la ĝihadistojn. Kaj en Sirio kaj en ***Irako***, kie ekzistas unu miliono da rifuĝintoj, estas plenumataj neimageblaj krimoj kontraŭ la loĝantoj, kun genocida aŭ etnocida karaktero. Koncernataj de tiuj genocidoj estas precipe la jezidoj kaj aliaj arabaj kaj islamaj minoritatoj. Plibonigo ne estas antaŭvidebla – temas pri giganta humaneca katastrofo, kiun

[1] Esperanta versio de la koncerna artikolo en Vikipedio mankas (vd. http://en.wikipedia.org/wiki/International_humanitarian_law).
[2] La raporto en diversaj lingvoj estas elŝutebla sub https://www.amnesty.org/en/documents/pol10/0001/2015/en. La presita libro en la germana lingvo aperis ĉe: http://www.fischerverlage.de/buch/amnesty_report_2014_15/9783100008381.
[3] Vd. http://www.tagesschau.de/inland/amnesty-jahresbericht-101.html.
[4] Vd. http://www.aargauerzeitung.ch/wirtschaft/europarat-beklagt-zunahme-von-hassreden-und-gewalt-im-internet-129324688.
[5] Vd. http://www.tagesschau.de/ausland/fluechtlinge-syrien-109.html.

eĉ la Sekureca Konsilio de UN ne kapablas solvi. Pro la konstanta kontraŭstarado de Ruslando, kiu rifuzas ĉiun rezolucion, kiu kontraŭdiras ĝiajn interesojn, la situacio estas komplete blokaeneralata.

Precipe tiuj landoj, kiuj kritikas la lezadon de la homaj rajtoj en aliaj landoj plej laŭte, malmulte faras, ekzemple se temas pri akceptado de rifuĝintoj. Nur 2 procentoj de la siriaj rifuĝintoj trovis ŝirmon en aliaj landoj, tro malmulte kiel AI opinias. Miloj da rifuĝintoj pereis en la Mediteranea Maro, kiam ili provis transveturi ĝin de Afriko aŭ Proksima Oriento al Eŭropo, ĉefe tra Grekio, Italio, Francio, Hispanio, Portugalio kaj Anglio, kie neoficialaj rifuĝintoj estas rigore traktataj kaj rifuzataj de la polico kaj justico, ekzemple ĉe la landlimo. Fine de 2012 en diversaj tendaroj de Turkio vivis 1,6 milionoj da siriaj rifuĝintoj kaj 30´000 irakaj jezidoj, parte en mizeraj kondiĉoj. En 2014 Italio savis 170´000 rifuĝintojn, kiuj veturis trans la Mediteranea Maro, sed la ĉesigo de la operaco „Mare Nostrum“ fine de oktobro 2014 kaŭzis la timon, ke multaj (miloj da) rifuĝintoj povus droni kaj morti en la maro, kio fakte ankaŭ okazis. AI konsideras la altan kvanton de pereintaj rifuĝintoj skandalo kaj kritikis la rigorajn leĝojn por trakti rifuĝintojn kaj azilpetantojn, akceptitajn en tiuj eŭropaj landoj. En 2015, ĝis la 9a de junio 103´000 rifuĝintoj kaj migrantoj atingis Eŭropon trans la Mediteranea Maro: 54´000 en Italio, 123´000 en Grekio (ĝis aŭgusto 2015), 91 en Malto kaj 920 rifuĝintoj en Hispanio. La italaj aŭtoritatoj havis grandan penon loĝigi tiun amason da rifuĝintoj, de kiuj la plimulto eĉ ne intencis resti en Italio sed celis plu veturi norden en Eŭropo. En la sama jaro Jordanio akceptis pli ol 600´000 rifuĝintojn el Sirio, kiuj loĝas en diversaj tendaroj en la dezerto, kie la vivkondiĉoj estas tre malfacilaj, kaj la malgranda Libano akceptis 1,2 mio. siriajn rifuĝintojn, kio estas giganta nombro. En la mondo aktuale ekzistas 60 milionoj da rifuĝintoj – neniam antaŭe ekzistis tiel multaj rifuĝintoj kiel nun, grandparto inter ili estas infanoj.

Por resti en la sama regiono, en la strio de ***Gaza***, kie en julio 2014 la ***israela*** armeo lanĉis atakon kontraŭ palestinaj teroristoj, mortis 2000 civiluloj. Laŭ AI, dum tiu operaco la homaj rajtoj estis grave lezataj kaj militaj krimoj estis plenumataj de la israela flanko.[6] La israela armeo estas kritikata precipe pro tio, ke ĝi efektivigis ´kontraŭleĝajn´ ekzekutojn kaj aplikis la kolektivan punon kontraŭ la palestinanoj (kio estas malpermesata de la internacia humaneca juro); en tio ankaŭ infanoj fariĝis viktimoj. La totala blokado kaj izolado de la palestina teritorio, la forpelado de palestinaj homoj kaj la sistema detruado de la palestina infrastrukturo fare de la israela armeo sed ankaŭ la ekscesa kaj senproporcia perforto de la israela polico kontraŭ palestinanoj, la arestado kaj malliberigo de palestinanoj sen akuzo, ilia turmentado en malliberejoj kaj la nepunado de israelaj fortoj, kiuj respondecas por militkrimoj aŭ lezado de homaj rajtoj, estas konsiderataj kiel neakcepteblaj. Sed necesas emfazi ankaŭ la fakton, ke ankaŭ la palestinanoj (Hamaso) plenumis militajn krimojn, kiam ili pafis raketojn sur la teritorion de Israelo kaj mortigis plurajn personojn, kio kompreneble ne povas esti tolerata de la israela registaro. Krom tio, la konstrua kaj loĝiga politiko de la israela registaro en la okcidenta Jordanlando trovis la kritikon de UN kaj EU. En julio 1015 ultraortodoksa judo atakis ses partoprenantojn de geja parado per trancilo.[7]

Malgraŭ la fakto, ke en 2014 en ***Afganistano*** restadis 86´000 eksterlandaj soldatoj, la sekureca situacio en tiu lando restis daŭre malstabila, kaj la nombro de civiluloj, kiuj estis mortigitaj, restis alta. En 74% de la kazoj la ĉefa respondeco por tiel multaj viktimoj apartenis al la talibanoj kaj aliaj armataj grupoj. Kun 4853 mortintaj aŭ vunditaj civiluloj la nombro duobliĝis kompare kun la jaro 2009 kaj estis unu kvaronon pli alta kompare kun la antaŭa jaro. 29% de la viktimoj estis virinoj kaj infanoj. Ankaŭ la nombro de mortigitaj ĵurnalistoj duobliĝis kompare kun la antaŭa jaro. En 2013 ekzistis ĉirkaŭ 2,7 milionoj da afganaj rifuĝintoj, kiuj vivas ĉefe en Irano kaj Pakistano, dum 659´961 fuĝintoj troviĝis enlande (marto 2014). Mortpunoj estis efektivigataj ofte post maljustaj procesoj.

La atako de talibanoj kontraŭ iu armea lernejo en Peŝavaro kaŭzis, ke la registaro de ***Pakistano*** nuligis la mortpunan moratorion kaj ekzekutis sep virojn. La ĉefministro anoncis, ke estonte teroristoj estos sendataj antaŭ militajn tribunalojn. Pakistano estas konsiderata kiel unu el la plej danĝeraj landoj por ĵurnalistoj: Minimume ok ĵurnalistoj estis mortigitaj. Religiaj minoritatoj kiel la sikistoj plendis pri persekutado kaj diskriminacio. Kelkaj virinoj estis murditaj por savi la „familian honoron“. Bela koincido estis, ke du pakistanaj civitanoj ricevis la nobelpremion pri paco de la jaro 2014: Malala Yousafzai kaj Kailaŝ Satyarthi, pro ilia elstara homrajta aktivado. Laŭ la indekso pri fiaskintaj ŝtatoj (publikigita de la privata pensfabriko *Fund for Peace*) Afganistano, Irako kaj Pakistano troviĝis en 2010 inter la unuaj dek rangoj.

Lige kun la Majdana revolucio en ***Ukraino*** la situaco de la homaj rajtoj draste malboniĝis. Kelkdek homoj, kiuj partoprenis la protestojn en Kievo, estis mortigitaj de nekonataj armataj fortoj. Diversaj homoj, inter ili iuj ĵurnalistoj, subite malaperis kaj estis retrovitaj grave vunditaj aŭ mortaj. En orienta Ukrainio, kie post la enpenetro de eksterlandaj soldataorj, kiuj evidente estas engagataj, subtenataj, ekipataj kaj financataj de Ruslando, kvankam Moskvo kontestas sian partoprenon en tiu konflikto, eksplodis bataloj kun la ukraina armeo; estis aplikataj tre danĝeraj armiloj de sovetia origino, kiuj kaŭzis amason da viktimoj inter (devigataj kaj libervolaj) junaj soldatoj, kiuj estas nur primitive ekipataj, kaj inter la civila popolo. La rezulto de tiu milit-simila krizo estis pli ol 10´000

[6] La ĉi-koncerna raporto estas elŝutebla sub http://www.amnesty.ch/de/laender/naher-osten-nordafrika/israel-besetzte-gebiete/dok/2014/israel-gaza-nichts-ist-sicher-israelische-angriffe-auf-gemeinschaftszentren-in-gaza/bericht-201cnothing-is-immune201d-israel2019s-destruction-of-landmark-buildings-in-gaza.

[7] Vd. http://www.nzz.ch/international/naher-osten-und-nordafrika/jerusalem-homosexuellen-parade-ultraorthodoxer-jude-sticht-menschen-nieder-1.18588294.

mortintoj kaj 1,5 milionoj da fuĝintoj. En Krimeo, kiu estis – laŭ okcidenta interpreto – aneksita de Ruslando en 2014 laŭ metodoj, kiuj ŝajne kontraŭdiras la internacian juron, precipe la tataroj de Krimeo plendis pri juraj-burokratiaj ĉikanoj, politikaj malpermesoj kaj lezado de diversaj bazaj rajtoj, kiuj estas subpremataj flanke de la novaj rusaj aŭtoritatoj, kiuj altrudis la civitanecon de Ruslando al la popolo de Krimeo. Akompane al tiu evoluo la rusoj draste limigis la liberecon de la esprimado de opinioj kaj gazetaro kaj komencis minaci opoziciulojn per juraj akuzoj kaj procesoj. La parlamento de la tataroj de Krimeo en Simferopolo estis fermita en septembro 2014, kaj la krimetatara televido ATR ne ricevis novan licencon por elsendi. Pluraj tataroj malaperis senspure, kaj verŝajne ĉirkaŭ 20´000 tataroj, kiuj timas, ke ili denove povus esti forpelataj aŭ deportataj, post kiam la rusa flanko faris tian aludon, anticipe forlasis Krimeon. Du ĉefaj politikaj gvidantoj de la krimeaj tataroj fuĝis al Kievo kaj ricevis malpermeson reveni al Krimeo.[8]

Azio, Afriko kaj Latinameriko

Arabaj kaj islamaj ŝtatoj

Praktike en ĉiuj arabaj kaj islamaj ŝtatoj la homaj rajtoj estas krude kaj grandstile lezataj. Same kiel la aŭtoritatoj de ***Kuvajto*** nervoze reagas al ĉiuj provoj malstabiligi la regadon de la emiro, ankaŭ en la ***Unuiĝintaj Arabaj Emiratoj*** la ŝejka reĝimo utiligis la validan leĝaron por persekuti kritikistojn de la registaro. Precipe aŭtoroj de kritikaj komentoj en la interreto ricevis drastajn punojn. En la malliberejoj troviĝis/as homoj, kiujn oni devigis konfesi siajn krimojn parte post turmentoj kaj kadre de maljustaj procesoj. Akuzitoj kaj kondamnitoj ne havis la okazon konsulti juristojn por sia defendo. Sennombraj personoj estis arestataj surbaze de nura suspekto, ke ili povus esti teroristoj. Laŭ nova ***barejna*** leĝo de julio 2014, la ŝtataneco povas esti forprenita de civitanoj, se ili estis kondamnitaj pro terorismo aŭ se ili loĝis en eksterlando pli ol kvin jarojn seninterrompe sen informi la ministerion pri internaj aferoj. Laŭ tiu maniero en 2014 21 civitanoj de Barejno, alia ´paradizo´, kie la bazaj homaj rajtoj estas akre subpremataj, perdis la ŝtatanecon, kaj en aŭgusto sekvis naŭ aliaj personj, kiuj estis kondamintaj kiel teroristoj post dubindaj juraj procesoj, dum kiuj ankaŭ tumentado kaj devigita konfeso de krimo estis aplikata. Ekzekutoj post aljuĝo de mortpuno en kvin kazoj tamen ne estis efektvigitaj, same en ***Omano***, kie la mortpuno daŭre povas esti aplikata. Kiel en aliaj islamaj landoj ankaŭ en ĉi tiu lando virinoj estas diskriminaciataj kaj labor-migrantoj ne sufiĉe protektataj kontraŭ ekspluatado kaj mistraktado. La samajn problemojn havas labor-migrantoj en ***Kataro***, kiu vekis internacian atenton lige kun la preparado de la Futbala Ĉampionado de FIFA en la jaro 2022. En ***Jemeno***, kie eksplodis milita konflikto inter registaraj trupoj kaj Huthi-ribeluloj (kiuj intertempe transprenis la povon en la lando) okazis diversaj atencoj kontraŭ politikistoj kaj ŝtataj reprezentantoj, kaj pluraj eksterlandaj civitanoj estis kidnapitaj. Kidnapado kaj malaperigo de homoj estas tutmondaj problemoj precipe en militaj regionoj, kie la juro ne funkcias. La duono de la jemena popolo estas minacata de malsato.[9] La milita konflikto en Jemeno kaŭzis centojn da mortaj infanoj.[10]

La reĝa reĝimo de ***Maroko*** limigis la rajtojn libere esprimi opiniojn, kunvenadi, publike manifestadi kaj private asociiĝi kaj subpremadis kritikajn ĵurnalistojn kaj homrajtajn defendistojn. Kritiko kontraŭ la monarkio ne estas tolerata en Maroko. La rajtoj de la subtenantoj de la sendependeco de *Okcidenta Saharo*, kiu estis aneksita de Maroko en 1975, estis subpremataj. Similajn problemojn de la limigo kaj subpremado de la opinia libereco, de la rajtoj kunvenadi, manifestadi kaj asociiĝi konas ankaŭ ***Alĝerio*** kaj ***Tunizio***. Kidnapado aŭ eĉ mortigo de eksterlandaj turistoj ne estas maloftaj fenomenoj en tiuj landoj, kiel montris lastatempaj okazaĵoj en Tunizio.

Post la falo de la Ghaddafi-diktaturo ***Libio*** dronis en totala anarkio kaj estis konfrontata kun la disfalo de la ŝtataj strukturoj kaj publika ordo. Diversaj armataj bandoj kaj soldataroj kontraŭbatalis unu la aliajn kaj pripafadis ankaŭ loĝkvartalojn de civiluloj, kio kaŭzis ne nur centojn da mortviktimoj kaj plurajn ostaĝojn sed, laŭ la takso de UNHCR, ĉirkaŭ 395´000 enlandajn rifuĝintojn. La atakoj de islamismaj fortoj celis precipe sekurecan personaron, ŝtatajn oficistojn, religiajn aktivulojn, ĵurnalistojn, juĝistojn kaj juristojn. En Sirte unu kunlaboranto de la Ruĝa Kruco estis mortpafita, krome estis mortigitaj unu homrajta advokatino, unu eksa parlamentanino kaj unu ĵurnalisto. La „Ĝenerala Nacia Kongreso“ limigis la liberecon de la esprimado de kritikaj opinioj kontraŭ la „revolucio de la 17a februaro“ kaj kontraŭ la „ofendado“ de la nacia flago kaj ŝtataj simboloj. La ĝeneralaj perforto kaj senjureco komplete paralizis la justican sistemon de Libio. En marto 2014 6200 homoj troviĝis en malliberejoj de la justicministerio, kaj nur 10% de ili estis prezentataj al la tribunalo. Centoj da homoj estis malliberigataj sen

[8] Vd. http://www.nzz.ch/international/europa/tv-sender-der-krimtataren-stellt-betrieb-ein-1.18515192, http://de.euronews.com/2015/03/17/gibt-es-eine-rueckkehr-fuer-die-tataren-auf-die-krim kaj http://www.tagesanzeiger.ch/ausland/europa/Krimtataren-befuerchten-neue-Vertreibung/story/12646573. Skizan historion pri la ttaroj de Krimeo en Esperanto vd. sub http://www.planlingvoj.ch/Tataroj_de_Krimeo.pdf.

[9] Vd. http://www.zeit.de/politik/ausland/2015-07/jemen-kaempfe-hunger. Laŭ la Monda Evolua Indekso (Human Development Index) Jemeno estas la plej malriĉa lando de Azio (rangoj 148 de 175 rangoj).

[10] Vd. https://www.tagesschau.de/ausland/jemen-kinder-101.html.

formala akuzo. Inter la viktimoj de atakoj kaj diskriminacioj troviĝis ankaŭ rifuĝintoj, religiaj kaj etnaj minoritatoj kiel egiptaj koptoj, sufiistoj kaj tuaregoj. En novembro 2014 la „Nacia Konsilio por homaj kaj civitanaj rajtoj“ estis malfondita. La libiaj aŭtoritatoj entreprenis neniujn konsiderindajn paŝojn por persekuti kaj esplori kulpulojn, kiuj lezis homajn rajtojn aŭ faris militkrimojn.

En ***Egiptio***, kie post la forpuĉo de la demokratie elektita prezidento Mursi la nova registaro ŝajnas revivigi la diktaturon de la Mubarak-reĝimo, oni enkondukis novajn reprezaliojn kontraŭ diversaj opoziciuloj, islamistoj kaj kritikistoj kaj en sensaciaj farsprocesoj kondamnis kelkcent homojn al la mortpuno.

Kvankam iuj juraj aŭ teknikaj plibonigoj estis parte farataj, la rajtoj de la virinoj kaj la demokratio estas praktike limigataj en ĉiuj menciitaj arabaj kaj islamaj ŝtatoj.

Ankaŭ en ***Jordanio***, kiu klopodas prezenti sin kiel „modernan monarkion“, la rajto libere esprimi opinion estis draste reduktata, precipe se temas pri kritikaj opinioj, kiuj „ofendas“ la monarkion, ŝtatajn instancojn kaj la religion. Virinoj daŭre estas subpremataj; en minimume 12 kazoj virinoj estis mortigitaj en la nomo de la „familia honoro“. Laŭ paragrafo 534 de la ***libana*** punkodo seksumado „kontraŭ la naturo“ estas malpermesata, kio ebligas pli facile persekuti seksajn minoritatojn.

Aliaj fifamaj klasikaj ´paradizoj´ por grandstila lezado de la homaj rajtoj estas *Saŭdarabio* kaj *Irano*. La registaroj de tiuj landoj faras ĉiuspecajn klopodojn por subpremadi kaj persekutadi diversajn rajtojn kaj liberecojn kiel tiuj de la esprimado de opinioj, renkontiĝado, kunvenado, asociiĝo, publikaj manifestado kaj protestado. Libera gazetaro ne ekzistas, kaj la interreto estas rigore kontrolata aŭ cenzurata. Ankaŭ diversaj minoritatoj estas subpremataj, diskriminaciataj kaj persekutataj. Precipe la rajtoj de virinoj estas baze lezataj. En tiuj brutalaj diktaturoj, kiuj estas regataj de fanatikaj mezepokecaj islamismaj dogmuloj, la tuta popolo estas draste minacata de arestado, malliberigo, turmentado, mistraktado, mortigo kaj mortpunado, kaj la junularo estas senigata de ĉiaj vivperspektivoj.

En la totalisma ŭahabisma reĝlando ***Saŭdarabio*** la registaro arestis centmilojn da labor-migrantoj kaj forpelis ilin de la lando. Multaj homoj, kaj propraj civitanoj kaj eksterlandanoj, estis publike mort-ekzekutitaj per senkapigo,[11] la leĝoj estis eĉ severigataj por povi persekuti diversajn kritikistojn kaj aktivulojn. Politikaj partioj, sindikatoj kaj homrajtaj organizaĵoj estas malpermesataj. 4 membroj de iu civilsocia asocio estis senditaj por 15 jaroj en la malliberejon. Multaj agadoj okazas sub la preteksto de la „batalo kontraŭ terorismo“. La registaro de Saŭdarabio (la nova reĝo montriĝas eĉ pli severa ol lia antaŭulo) rifuzis esencajn punktojn de rekomendoj, kiujn ĝi ricevis de la homrajta konsilio de UN, ĉar ili kontraŭdiras la fundamentalisman islaman sistemon en tiu unika lando de dezerto kaj nafto. Internacian atenton kaŭzis la verdikto kontraŭ la blogulo Ralf Badawi, kiu estis akuzita pro „ofendo de la islamo kaj apostazio“ kaj kondamnita al dekjara arestado en malliberejo kaj alta monpago, ligite kun 1000 bastonbatoj, kiujn oni eĉ komencis efektivigi (sed interrompis post internaciaj protestoj kaj pro la malboniĝo de la sanstato de la viktimo). Pro iu akuzo iu homrajta defendisto en la Orienta Provinco ricevis la punon de 200 bastonbatoj, krome 5 jarojn da malliberejo kaj dekjaran malpermeson vojaĝi al eksterlando. La religia minoritato de la sijaistoj estis diskriminaciataj kaj aktivuloj el ĝiaj vicoj estis jure persekutataj. Tribunalaj procesoj ofte estis maljustaj, kaj turmentantoj de homoj en malliberejoj ne estis punataj.

Ne pli bona estas la homrajta situacio en la fundamentalisma sijaista ŝtato ***Irano***, kiun la homrajta konsilio de UN nomis „katastrofa“. Malgraŭ la elekto de nova prezidento (en aŭgusto 2013), kiu vekis la impreson, ke li estas malpli radikala ol lia antaŭulo Aĥmadinedĵad, kaj ke li povus efektivigi urĝe necesajn reformojn, estas tro frue fari definitivajn konkludojn, ĉar la eblecoj kaj influo de Hassan Rohani estas limigataj; la politika kaj religia gvidanto, do la plej supera instanco de Irano, kiu troviĝas super la prezidento kaj kiu decidas la politikon de la lando, estas reprezentata de iu konservema ekleziulo, ajatolo Ali Ĥamanei, kiu certe faros neniujn kompromisojn, almenaŭ rilate la islaman juron, kiu kunpuŝiĝas kun la universalaj homaj rajtoj, kiel ili estas praktikataj en Okcidento. Por krimoj plenumataj kontraŭ la islama ordo tiu juro antaŭvidas drastajn punojn, ekzemple la turmentadon de la kondamnitoj per bastonbatoj aŭ amputado de korperoj en kazo de alkohola konsumo dum la ramadano. En Irano ne nur la tuta civilsocio estas grandskale subpremata, sed daŭre estas diskriminaciataj ankaŭ religiaj kaj etnaj minoritatoj kiel azerbajĝananoj, beluĉoj, kurdoj, turkmenoj, sunaistoj, sufiistoj, derviŝoj, bahaanoj, membroj de la araba Aĥvazi-komun-umo kaj anoj de la Ahl-e-Haqq-komunumo, same kiel ateistoj kaj opoziciaj siajistoj. Bahaaj tombejoj estis detruataj de la aŭtoritatoj. La religia fanatikismo konas neniujn limojn en Irano, precipe kontraŭ virinoj. Seksaj rilatoj inter negeedzoj estas puneblaj. Ankaŭ anoj de seksaj minoritatoj povas esti punataj per bastonbatoj aŭ per la mortpuno. Centoj da homoj (inter ili bahaanoj) ne rajtas studi en la universitato, ĉar ili insistas pri la rajto je libera esprimado de opinioj. La nombro de ´kandidatoj´ por la mortpuno estas sufiĉe alta kaj nekonata. Sub tiaj cirkonstancoj estas kompreneble, ke la irana registaro ne estas interesata pri la rekomendoj de la homrajta konsilio de UN, kiu postulas de la irana registaro plibonigi la situacion de la homaj rajtoj en la lando.

Turkio, lando disŝirata inter moderna laika okcidento kaj konservema islama kulturo, prezentas vastan katalogon de dubinda traktado de la homaj rajtoj. Sub la regado de la partio de Recep Tayyip Erdoğan, kiu estis elektita kiel ŝtatprezidento en aŭgusto 2014, la lando riskis transformiĝi al aŭtokratiisma diktaturo kun faŝismaj trajtoj laŭ mezazia aŭ ruslanda modelo. Sub la influo de la konservativa islama ideologio Erdoğan planas reenkon-

[11] Vd. http://www.spiegel.de/politik/ausland/saudi-arabien-exekutiert-175-menschen-in-einem-jahr-a-1049634.html.

duki la mortpunon kaj aboli la liberalisman abortsistemon, dum la konsumo de alkoholo sur la teritorio de universitatoj estu malpermesataj. Krom tio, Erdoğan publike atakis la cionismon kaj retorike pafis kontraŭ Israelo. Post la civilsociaj protestoj en la Gezi-parko dum la jaro 2013 Erdoğan kaj ties partiaj lakeoj reagis per dubindaj policaj kaj justicaj metodoj, kies eksceseco eĉ ŝokis Eŭropan Union, kiu distanciĝis de Turkio kaj precipe de Erdoğan mem, al kiu oni riproĉis diktatorecan konduton kaj korupton (pro siaj aŭtokratemo kaj agresemo Erdoğan estis komparata kun Putin). La Erdoğan-a ŝtato limigis la sendependecon de la justico, severigis la kontrolon de la interreto kaj havigis al la sekreta servo novajn kompetencojn. La rajtoj de manifestantoj estis lezataj kaj la policistoj, kiuj respondecis por tiuj lezoj, ne estis akuzataj aŭ puniataj. Okazigataj tribunalaj procesoj ne konformis al la internaciaj normoj. Krom tio, la turkaj aŭtoritatoj malrespektis la rajtojn de rifuzantoj de la armea servo kaj ne klopodis por eviti perforton kontraŭ virinoj, kies rajtojn oni pretendas defendi. La nova leĝo por protekti la familion kaj preventi perforton kontraŭ virinoj restis praktike sensekva. Seksaj minoritatoj alfrontis diskriminacion sur la labormerkato, kaj en junio 2015 la turkaj aŭtoritatoj malpermesis kaj sufokis paradon de gejoj sur la Taksim-placo en Istanbulo. Kritikaj ĵurnalistoj daŭre estis ĉikanataj, akuzataj aŭ maldungataj. La turkaj instancoj ofte (mis)aplikis la leĝojn por kontraŭbatali terorismon. En sia fanatika modernisma konstrumanio en la urboj la turkaj aŭtoritatoj malrespektis la rajtojn de loĝantoj. Ekzemple la loĝantoj de iu kvartalo de Istanbulo, kie vivas multaj romaoj (ciganoj), estis forpelataj. Post kiam Erdoğan planis enkonduki en Turkion la sistemon de prezidenta respubliko, kiu havigus al la ŝtatestro kvazaŭ aŭtokratecan povon, granda parto de la popolo, i.a. multaj kurdoj, reagis kontraŭstare kaj sukcesis haltigi tiun evoluon okaze de la parlamentaj balotoj en junio 2015; en tiuj balotoj la partio de Erdoğan perdis la absolutan plimulton kaj nun dependas de koalicio por povi plu regadi. Tiuj balotoj ankaŭ montris, ke la demokratio en Turkio ankoraŭ funkcias. Malgraŭ tio, la rangoj de Turkio en diversaj mondaj indeksoj pri demokratio, gazetara libereco, korupto kaj paco tamen estas malbonaj.[12]

Post atenco de kurdoj en la urbo Suruc kaj atako de IS kontraŭ la turkaj armeanoj en julio 2015 la turka polico arestis pli ol mil personojn, kiujn oni suspektas esti teroristoj, batalantoj de IS kaj membroj de PKK. PKK anoncis, ke ĝi nuligis la konvencion pri armisticon kun Turkio, kaj Erdoğan komunikis, ke la pacproceso kun la kurdoj, kiujn la turkoj konsideras ĉefaj malamikoj, estas finata.[13] En tio Usono apogas la turkan registaron kontraŭ la kurdoj. Krom tio, Turko daŭre rifuzas agnoski la amasmurdon de armenoj en 1915/6 kiel genocidon kaj tiel evitas repaciĝon inter ambaŭ popoloj. Ankaŭ la rilatoj kun aliaj etnaj kaj religiaj minoritatoj, ekzemple kristanoj kaj alev(ist)oj, estas streĉataj.

Se en la regiono de la Proksima Oriento oni ne sukcesos bridi la ĉiuflankajn naciismajn emociojn, intergentan malamon, politikan agresemon kaj religian fanatikismon, la koncernataj landoj riskos droni en ampleksa kaj longdaŭra fajra milito kun miloj da viktimoj.

Postsovetiaj respublikoj

Praktike en ĉiuj postsovetiaj respublikoj kun islama kulturo la situacio de la homaj rajtoj estas mizera. Kelkaj ekzemploj:

En ***Azerbajĝano***, diktatore regata de la koruptega postkomunisma Aliev-klano,[14] okazas kruda batalo kontraŭ ĉiuspecaj sendependismaj, kritikaj, opoziciaj kaj disidentaj fortoj, cetere kun la aprobo de Ruslando. Minimume ses homrajtaj defendantoj estis arestitaj kaj deko da gvidaj homrajtaj organizaĵoj estis kontrolataj kaj traserĉataj kaj devigitaj ĉesigi sian laboron. Sendependa gazetaro ne ekzistas, kaj sendependaj ĵurnalistoj estas ĉikanataj kaj minacataj surbaze de konstruataj akuzoj, plej ofte lige kun la posedo de drogoj. La rajto libere kunvenadi estas limigata, turmentado kaj aliaj mistraktadoj estas aplikataj, akuzitoj estis devigitaj subskribi postulatajn konfesojn antaŭ la tribunalo. Kritikaj politikaj aktivuloj estis arestataj. La raporto de AI mencias nekutime multajn nomojn de kazoj kaj viktimoj. Fine de 2014 ekzistis ĉirkaŭ 20 politikaj prizonuloj. Plej aktuale, kontraŭ du virinoj, kiuj kuraĝis kritiki korupton kaj klientismon, okazas jura proceso.[15] Malgraŭ tiu mizera situacio en Azerbajĝano povis okazi diversaj internaciaj festivaloj kiel Eŭropa Kantfestivalo (Eurovision Song Contest) kaj Eŭropaj Ludoj. Ŝajnas ke neniu vere pretas aŭ deziras bojkoti tiujn eventojn, kiuj estas parte misuzataj de la bakua

[12] Laŭ la Indekso pri demokratio de la gazeto Economist Turkio situis en 2014 sur la relative malbona 98a de 167 rangoj, en la ĉirkaŭaĵo de Ugando kaj Venezuelo. Laŭ la Indekso pri percepto de korupto de Transparency International Turkio okupas la 64an rangon pli malpli sur la sama nivelo kiel Sudafriko, Grekio kaj Italio. Laŭ la Indekso pri libereco de la gazetaro de Freedom House Turkio okupas la malbonan 142an de entute 199 rangoj. Reporteroj sen limoj donis al Turkio la 154an de 180 rangoj post Ruslando kaj Irako. Sur la Monda Pacindekso (Global Peace Index) Turkio okupas la 128an de 162 rangoj. Post la nova milito kontraŭ IS kaj PKK en julio 2015 la pozicio de Turkio certe plu falis.

[13] Vd. http://www.nzz.ch/international/europa/ankara-will-eine-mauer-bauen-1.18584482, http://www.derbund.ch/ausland/naher-osten-und-afrika/tuerkische-kampfjets-greifen-isziele-in-syrien-an/story/19687191 kaj http://www.faz.net/aktuell/politik/ausland/europa/nach-tuerkischen-angriffen-pkk-kuendigt-waffenstillstand-mit-tuerkei-auf-13719878.html.

[14] Pri la korupteco de I. Aliev vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Ilham_Aliyev#Corruption.

[15] Vd. http://www.welt.de/politik/ausland/article144381956/Unterdrueckung-nach-den-Spielen-in-Aserbaidschan.html.

reĝimo por politika propaganda, precipe por privarbi la propran prestiĝon en la mondo. Sporto kaj kulturo fariĝis integraj partoj de la politiko kaj ekonomio, en kiu profitas kelkaj relative malmultaj protagonistoj, kiuj verŝajne ankaŭ estas altgrade koruptaj aŭ favoras korupton, kiel montras la kazo de FIFA, kies prezidanto Blatter ŝajnas esti granda amiko de koruptaj potenculoj.

Ankaŭ en ***Kazaĥstano***, kiu estas regata de la postsovetia aŭtokratisma ´eterna´ prezidento Nursultan Nazarbaev, oni kutimas malrespekti la homajn rajtojn, turmenti kaj mistrakti diversajn homojn; en tio turmentantoj kutime estas liberaj de kulpo kaj respondeco. Kvankam la aŭtoritatoj promesis plibonigi la situacion praktike okazis malmultaj progresoj. La rajto libere kunvenadi estis limigata, kaj aktivuloj de civilsociaj NROj timas, ke la ŝtato povus premi ilin per novaj leĝoj kaj reprezalioj. Laŭ informoj de NROj, en 2013/14 la aŭtoritatoj ricevis inter 350 kaj 400 plendojn pri turmentado kaj aliaj mistraktoj, sed oficiale kaj publike estis indikataj pli malmultaj kazoj. Precipe lige kun la „batalo kontraŭ terorismo“, kiu faciligas la lezadon de homaj rajtoj, la aŭtoritatoj ricevis multajn plendojn. La ŝtata sekreta servo fokusis sian atenton precipe sur malpermesataj islamismaj organizaĵoj, religiaj minoritatoj kaj azilpetantoj el najbaraj landoj, precipe Uzbekistano kaj Ĉinio. La limo de la punkapablo estis malaltigita al la 14a jaraĝo, tiel ke do ankaŭ „infanaj teroristoj“ povas esti persekutataj kaj punataj. Kvankam en Kazaĥstano por „terorismo kun mortsekvo“ oni povas ricevi la mortpunon, ŝajnas, ke en ĉi tiu lando mortpunoj lastatempe tamen ne plu estis praktikataj. La nova punkodo klasifikis la „gvidadon, financadon kaj kunlaboron kun neakceptitaj aŭ malpermesataj asocioj“ kiel puneblan krimon. Punebla estas ankaŭ la „kontraŭleĝa enmiksiĝo“ de membroj de civilsociaj organizaĵoj en la laboron de ŝtataj aŭtoritatoj. Gvidantoj de civilsociaj organizaĵoj estas konsiderataj kiel aparta kategorio de krimuloj, por kiuj en vico de deliktoj pli severaj punoj estas antaŭvidataj. Sub aparta premo troviĝas la neoficiala gazetaro.

Eĉ pli drasta kazo de lezado de homaj rajtoj estas ***Uzbekistano***, kiu estas regata de la postsovetia diktatoro Islam Karimov. Turmentado de homoj estas praktikata en la tuta lando, kvankam la aŭtoritatoj senskrupule neas tion.[16] La uzbekaj aŭtoritatoj estas konfrontataj kun la riproĉo, ke ili entreprenis/as neniujn klopodojn por plibonigi la situacion. Ĝis nun la uzbeka registaro ankaŭ ne reagis al la UN-rekomendoj pri turmentado. Ĉefaj viktimgrupoj de la turmentado en Uzbekio estas homrajtaj defendantoj, kritikantoj de la registaro kaj membroj de islamismaj partioj, kiujn la uzbekaj aŭtoritatoj persekutas en la nomo de la „batalo kontraŭ terorismo“. La raporto de AI mencias plurajn aparte krudajn kazojn.

Kvankam en ***Turkmenistano*** okazis iuj teknikaj plibonigoj de la juraj reguloj, en la praktiko la situacio de la homaj rajtoj restas komparebla kun tiu en aliaj mezaziaj respublikoj. Kvankam la turkmena registaro akceptis la UN-rekomendojn, ĝi samtempe rifuzis al UN viziti la landon por kontroli la efektivigon de la „reformoj“. La parlamentanoj de la „opozicia partio“, kiuj konkeris mandatojn okaze de la balotoj de decembro 2013, deklaris sian lojalecon al la turkmena prezidento, do, la parlamenta plurismo en Turkmenio fariĝis nura farso. La gazetaro estas daŭre cenzurata, la rajtoj libere esprimi opiniojn kaj libere asociiĝi estas forte limigataj. Religiaj aktivecoj estis submetataj al severa kontrolado. Almenaŭ la vizo por povi forlasi la landon estis en principo abolita (en 2006) sed ne por ĉiuj. Post la longa brutala regado de la ekssovetia diktatoro Nijazov (nomata „Turkmenbaŝi“) la menciitaj „progresoj“ signifas ioman esperon por la civilsocio en tiu mezazia lando, sed la vojo al vera demokratio estas ankoraŭ longa, ĉar tiu tradicio ne ekzistas.

La demokratia eksperimento en ***Kirgizstano***, kiu iam estis laŭdata kiel „nova Svislando“ de Mezazio, ŝajne fiaskis kaj, la lando tragike refalis en malnovajn sovetiecajn tempojn. La AI-raporto pri Kirgizio similas al la analogaj raportoj pri Kazaĥstano kaj Uzbekistano.

Ankaŭ en ***Belorusio*** (Belarusio aŭ Blankrusio), kiu estas apostrofata kiel plej lasta diktaturo de Eŭropo kaj prezidento Lukaŝenko kiel ĝia plej lasta diktatoro, la homaj rajtoj havas malfacilan ekzistadon. La raporto de AI pri Belorusio sonas kiel hororfabelo. Kiel sola lando de Eŭropo Belorusio efektivigis en 2014, kun la persona konsento de la prezidento, kiu faras ´kurtan proceson´ kun homoj, kiuj ne plaĉas al li, la mortpunon en la kazo de minimume tri propraj civitanoj. Du el ili estis akuzitaj lige kun iu atenco kontraŭ la metroo en Minsko, kie pereis pluraj personoj.[17] En tio Belorusio malrespektis la Internacian Pakton pri burĝaj kaj politikaj rajtoj. Por rikolti konfesojn la belorusa justico metas akuzitojn sub premo kaj aplikas rimedojn de la turmentado. En la esploraresto kie la vivkondiĉoj estas malbonaj, la prizonanoj ricevas malbonan nutraĵon, kaj ricevi medikamentojn estas malfacile. La opinia libereco daŭre estas forte limigata. Laŭ la valida punkodo, ofendi la prezidenton kaj publika blasfemado povas rezulti arestadon. Eĉ homoj, kiuj protestis okaze de la Ĉernobyl-memortago, estis arestitaj. La ĉikanoj de la registaro direktas sin precipe kontraŭ konkretaj personoj. Tio efikas por timigi la tutan popolon. Ekzemple Mykalaŭ Statkeviĉ, iama kandidato por la prezidenta posteno, kiu en 2010 estis kondamnita al sesjara punaresto en malliberejo, daŭre troviĝas en la prizono. Kvankam Minsko konsideras Ruslandon strategia partnero de Belorusio, ankaŭ civitanoj de Ruslando ne estas protektataj en Belorusio, se ili elpaŝas defende al la respektado de la homaj rajtoj. Malgraŭ tiuj problemoj, ŝajnas ke escepte de kelkaj kritikemaj individuoj la popolo ĝenerale kontentas pri la politika situacio en la lando kaj hezitas/evitas ribeli kontraŭ la reĝimo, ĉar tiam la situacio povus

[16] Pri tio vd. http://www.theguardian.com/politics/2005/may/16/usa.world.

[17] Pli detale vd. sub http://www.welt.de/politik/ausland/article13928849/Zwei-Todesurteile-in-Weissrussland-vollstreckt.html kaj http://www.spiegel.de/panorama/todesstrafe-in-weissrussland-dritte-hinrichtung-in-diesem-jahr-a-1001060.html.

esti pli terura kompare kun aliaj ekssovetiaj landoj. Publike neniu kuraĝas kritike paroli pri politiko. La politika konscio en Belorusio estas malalta kaj subevoluinta, same la sento pri belorusa naciismo. En la politiko kaj la publika vivo la belorusa lingvo ludas nur formala rolon en Belorusio kaj estas ĝenerale forpuŝata de la rusa lingvo. Pro la internacia solidareco, kiun la belorusia opozicio ĝuas, la reĝimo evidente ne kuraĝas aresti la membrojn de la malpermesata asocio „Viasna“.[18] Surprize antaŭ la prezidentaj balotoj, fine de aŭgusto la reĝimo liberigis ses politikajn kritikistojn el la malliberejo.[19]

Laŭ ĉiuj indeksoj pri demokratiaj rajtoj kaj liberecoj (kiuj estas notitaj en la piednotoj de ĉi tiu studo), Azerbajĝano, Kazaĥstano, Uzbekistano, Turkmenistano, Kirgizstano kaj Belorusio troviĝas ĉe la fino de la listo. Laŭ la indekso pri fiaskintaj ŝtatoj (publikigita de la privata pensfabriko *Fund for Peace*) ĉiuj tiuj ŝtatoj, inkluzive de Ruslando kaj Ukrainio, estas konfrontataj kun la risko fiaski. Kiel montrate supre, la homaj rajtoj, kiujn oni lezas en tiuj landoj grandstile, sisteme kaj intence, ĝuas tre malaltan statuson, ĉar la regantaj potenculoj volas eviti, ke ili perdos siajn povon, rolon kaj kontrolon super tiuj landoj, kiujn ili konsideras propraj, kvazaŭ personaj regnoj. El la vidpunkto de Ruslando, en tiuj landoj la rusoj estas diskrimi-naciataj; la rusoj plendas, ke la rusa lingvo eĉ ne posedas la statuson de minoritata lingvo kaj ke la rusoj devas lerni la koncernajn ŝtatajn lingvojn, kion ili ne ŝatas fari (pro tio multaj rusoj sentas sin devigataj forlasi tiujn landojn). Nature, Belorusio, kie la rusa lingvo estas ĉefa, estas kurioza escepto. Kvankam la regantoj de tiuj landoj intime kunlaboras kun Ruslando (ekzemple kadre de la Eŭrazia Unio kaj aliaj organizaĵoj), kiun ili konsideras strategia partnero, ili samtempe timas, ke Moskvo povus enmiksiĝi laŭ la modelo de Abĥazio, Sudosetio, Transnistrio, Krimeo kaj orienta Ukrainio kaj ne volas maltrafi ankaŭ la opcion de ekonomia, scienca, kultura kaj alispeca kunlaboro kun la Okcidento.

Azio

Orienta Azio

En ***Hongkongo*** dekmiloj da homoj manifestaciis kontraŭ la subpremado de siaj civitaj kaj politikaj rajtoj malgraŭ esencaj minacoj flanke de la ĉinaj aŭtoritatoj, kiuj klopodis perforte sufoki la proteston.

En julio 2014 la registaro de ***Singapuro***, kiu estas fifama (kaj ĝenerale tro malmulte konata) ´paradizo´ de rigoraj mortpuna kaj turmenta praktikadoj, nuligis la mortpunan moratorion, kiu validis dum tri jaroj, kaj pendumis du virojn, kiuj estis akuzitaj pro misuzo de la leĝo pri drogoj. Surbaze de ĉi-koncerna leĝo de la jaro 2012 la singapuraj aŭtoritatoj almenaŭ transformis plurajn kazojn de mortpuno al dumviva arestado en malliberejo, ligite kun 15 bastonbatoj, pri kiuj ili tamen ne volis rezigni. En julio 2014 la parlamento ŝanĝis la leĝon pri kontraŭradia protektado por ebligi la mortpunon en kazo de krimoj, kiuj estas ligataj kun la misuzo de nuklea materialo (kvankam en Singapuro ne ekzistas nukleaj instalaĵoj!). La punon de bastonbatoj ricevis ankaŭ homoj, kiuj estis kondamnitaj pro deliktoj kontraŭ la enmigraj reguloj kaj pro vandalismo. Okazis debato, ĉu bastonbatoj estas kompareblaj kun turmentado, kion la ĝenerala prokuroro neis, argumentante, ke turmentado ne estas malpermesata de la konstitucio (sic). Civilsociaj aktivuloj kaj homrajtaj defendistoj en Singapuro montris sin maltrankvilaj pri la pli kaj pli harhirtiga aplikado de la limigo de diversaj civitanaj rajtoj kaj liberecoj en la urba ŝtato fare de la registaro, kiu ne hezitas akuzi civitanojn, kiuj kritikas ĝin. Tiel, en majo 2014 la ĉefministro mem plendis kontraŭ la blogulo Roy Ngerng Yi Leng pro „kalumnio“ post kiam li riproĉis al la ĉefministro „kriman defraŭdon“ de ŝtata porpensiula mono. Kvankam la blogulo retiris sian riproĉon kaj publike pardonpetis, li perdis sian laborlokon en la hospitalo. Ĉirkaŭ 12 supozeblaj militemaj islamistoj troviĝis en Singapuro en la malliberejo sen tribunala procesola Ankaŭ ***Malajzio*** pli kaj pli subpremas la opinian liberecon, ĉikanas homrajtajn defendistojn kaj opoziciulojn kaj diskriminacias diversajn minoritatojn, ĉefe religiajn kaj seksajn.

Estu ĉi tie resume analizata ankaŭ la homrajta situacio en jena grupo de ŝtatoj: Tajlando, Kamboĝo, Laoso, Birmo (Mjanmaro), Bangladeŝo kaj Nepalo.

Lige kun la lastatempe ege malrankviliga politika evoluo en ***Tajlando***, kiu estas konstitucia monarkio, la pozicio kaj protekto de la homaj rajtoj konsiderinde malfortiĝis. Post longa periodo de politika malcerteco lige kun la regado de gefratoj Ŝinavatra, la 20an de majo 2014 la ĉefkomandisto de la tajlanda armeo proklamis la militan staton kaj transprenis en armea puĉo kontraŭ la reganta (aŭ provizora) registaro ankaŭ la politikan povon en la lando, kiu nun estas regata de milista ĥunto. En julio estis proklamita provizora konstitucio. Kompreneble, por la demokratio tiu evoluo signifis nenion bonan. Post la enkonduko de la milita stato centoj da personoj estis arbitre arestitaj kaj malliberigitaj, inter ili precipe politikistoj, sciencistoj, ĵurnalistoj kaj civilsociaj aktivuloj. Ili devis

[18] Intervjuon kun Alex Bialitski vd. sub http://www.amnesty.ch/de/laender/europa-zentralasien/weissrussland/dok/2015/interview-mit-ales-bialiatski-wir-koennen-offen-reden-wir-fluchen-ja-nicht-ueber-den-praesidenten. Aliajn informojn pri la homrajta situacio en Belorusio bd. sub http://human-rights-belarus.org/wp.

[19] Vd. http://www.nzz.ch/international/weissrusslands-diktator-mimt-offenheit-1.18601092.

subskribi promeson, ke ili ne enmiksiĝos en la politikon. Pro ofendo de la rego unu persono estis kondamnita al 30-jara aresto en malliberejo.[20]

Post la balotoj de 2013 la opozicio en ***Kamboĝo*** suspektis trompon. Kiam en januaro 2014 en Pnom-Peno okazis pacaj protestagadoj, la polico perforte disbatis ilin kaj la ministerio pri internaj aferoj malpermesis pliajn publikajn manifestaciojn. La polico aplikis ekscesan perforton kun la rezulto, ke pluraj personoj vundiĝis aŭ mortis. La opinia libereco estis draste limigata, same la rajto asociiĝi kaj kunvenadi.

En ***Laoso***, kiu daŭre estas regata de komunistoj, la situacio de la homaj rajtoj estas malfacile kontrolebla, ĉar mankas transparenteco. La raporto, kiun la laosa registaro prezentis en novembro 2014 por subteni la kontroladon de la situacio fare de la homrajta konsilio de UN, kiu estis planata por la komenco de 2015, enhavis praktike neniujn utilajn informojn pri la problemoj de la homaj rajtoj en Laoso. Fine de 2014 aperis leĝpropono por kontroli la interreton. Uzantoj de Fejsbuko estis avertataj, ke la registaro ne toleras informojn, kiuj „ĝenas la socian ordon aŭ subfosas la sekurecon“ de la lando. Du politikaj aktivuloj, kiuj estis kondamnitaj al 20-jara malliberigo kaj kiuj provis organizi pacan manifestacion, daŭre troviĝas en arestado. Sombath Somphone, elstara reprezentanto de la civilsocio, estis kidnapita en decembro 2012 kaj neniam reaperis.[21] Kelkaj popolgrupoj protestis kontraŭ registaraj planoj pri giganta konstru-projekto, ĉar ili devis forlasi siajn vilaĝojn kaj translokiĝi al aliaj lokoj.

En principo, la homrajta situacio en Laoso povas esti komparata kun tiu en ***Vjetnamio***, kie la stato de la homaj rajtoj ne pliboniĝis esence. La samaj rigoraj limigoj por libere esprimi opiniojn, pace manifestadi kaj asociiĝi restis validaj. La ŝtato (t.e. la komunisma partio) totale kontrolas la gazetaron kaj la justicon, same ĉiujn politikajn kaj religiajn organizaĵojn. Sennombraj politikaj malliberuloj daŭre restadas en prizonoj, kie ili vivaĉas sub malfacilaj kondiĉoj. En novembro 2013 ekvalidis nova vjetnama konstitucio, kiu antaŭvidas la garantiadon de la bazaj homaj rajtoj. Aliflanke, tiuj estas limigataj samtempe de la nacia punkodo. Kvankam en januaro 2015 Vjetnamio fariĝis membro de la UN-konsilio por homaj rajtoj, la reĝimo en Hanojo rifuzis 45 de 227 rekomendoj de la konsilio por plibonigi la situacion de la homaj rajtoj en la lando. Aparte alergie la komunistoj reagas, se temas pri punktoj kiel homrajtaj defendistoj, disidentoj, opinia libereco kaj mortpuno. Krom tio, Vjetnamio subskribis la UN-konvencion kontraŭ turmentado. La vjetnamaj aŭtoritatoj anoncis, ke oni intencas prilaboradi diversajn jurajn sistemojn. Kvankam tiaj promesoj estis farataj, ilia efektivigo progresas tre malrapide. La parlamento rifuzis propronon por ŝanĝi la leĝon pri la geedza kaj familia juro, kiu antaŭvidis rajtojn por samseksemaj partneroj. Malgraŭ tiuj kondiĉoj, diversaj homrajtaj defendistoj kaj pledantoj por socia kaj politika ŝanĝoj daŭrigis sian kuraĝan aktivecon, senkonsidere al la risko de ĉikanado, persekutado kaj punado. Aktuale, minimume 60 politikaj malliberuloj troviĝas en vjetnamaj prizonoj. La ĉefa ´celpubliko´ inter tiuj malliberuloj estas bloguloj kaj sendependaj interretaj ĵurnalistoj, labor-aktivuloj, politike kaj socie engaĝataj civitanoj, anoj de religiaj kaj etnaj malplimultoj kaj homrajtaj defendantoj. 18 bloguloj devis trapasi dubindan tribunalan proceson pro „misuzado de demokrataj liberecoj por lezi ŝtatajn interesojn“ (la komunistoj kutimas inversigi ĉiujn riproĉojn, kiujn ili ricevas de ekstere, aK). Laŭ paragrafo 258 de la vjetnama punkodo ili ricevis punojn de 15-monata ĝis 3-jara restado en malliberejo. La kondiĉoj en vjetnamaj malliberejoj estas ege malfacilaj kaj mizeraj; mankas medicina helpo kaj taŭgaj manĝaĵoj, krom tio, la prizonuloj estas mistraktataj sen malhelpo flanke de la gardistoj, kaj kelkaj estas izolataj, t.e. ne havas kontakton kun la ekstera mondo. Diversaj civilsociaj aktivuloj devis elteni surstrate atakojn de nekonataj agresantoj aŭ estis malhelpataj veturi en eksterlandon por partopreni forumojn pri homaj rajtoj. Aliaj aktivuloj, kiuj volis partopreni aranĝojn de eksterlandaj ambasadoj en Vjetnamio aŭ ĉeesti jurajn procesojn kontraŭ disidentoj, estis ĉikanataj, timigataj kaj malhelpataj forlasi la loĝejon. Ŝajnas ke okazis tri mortekzekutoj per venena injekcio; la nombro de ´kandidatoj´ por la mortpuno en Vjetnamio estas estimata per ĉirkaŭ 650, sed la registaro ne publikigis ciferojn kaj ĉi-koncernaj statistikoj restis sekreto de la ŝtato.[22] En tuta vico de politike motivataj protestoj kontraŭ Ĉinio, Tajvano, Japanio kaj Koreio pereis nekonata nombro de homoj. Malgraŭ iuj ŝajnaj progresoj, en diversaj mondaj indeksoj pri demokratio, gazetara libereco, korupto kaj paco Vjetnamio daŭre okupas la plej malbonajn rangojn.[23] En aŭgusto 2015 Vjetnamio refunkciigis la diplomatiajn rilatojn kun Usono.

Malgraŭ iaj politikaj, juraj kaj ekonomiaj reformprocezoj, okazantaj ankaŭ en ***Mjanmaro*** (eksa *Birmo*), rilate la staton de la homaj rajtoj oni konstatis neniujn substancajn progresojn. Sur kelkaj ŝlosilaj kampoj eĉ okazis

---

[20] Vd. http://www.nzz.ch/panorama/30-jahre-haft-wegen-majestaetsbeleidigung-auf-facebook-in-thailand-1.18591899.

[21] Pliajn informojn vd. sub https://en.wikipedia.org/wiki/Sombath_Somphone#Disappearance_and_response kaj http://sombath.org.

[22] Pri la situacio de la homaj rajtoj en Vjetnamio vd. ankaŭ http://www.planlingvoj.ch/Vjetnamio_Homajrajtoj.pdf.

[23] Laŭ la Indekso pri demokratio de la gazeto Economist Vjetnamio situis en 2014 sur la sufiĉe malbona 130 de 167 rangoj. Laŭ la Indekso pri percepto de korupto de Transparency International Vjetnamio okupas la 119an de entute 174 rangoj. Laŭ la Indekso pri libereco de la gazetaro de Freedom House Vjetnamio troviĝas preskaŭ kune kun Ĉinio ĉe la fino sur la 186a loko de entute 199 rangoj, dum Reporteroj sen limoj donis al Vjetnamio la 175an de 180 rangoj; en ambaŭ indeksoj la rango de Vjetnamio estas komparebla kun la pozicio de Ĉinio. La komunisma partio de Vjetnamio totale kaj tre pedante kontrolas la amaskomunikilojn de la lando, kritiko kontraŭ la registaro estas malpermesata kaj temoj kiel demokratiaj reformoj, religia libereco kaj teritoria posedo estas subpremataj. Kiu rompas tiujn principojn, tiu devas riski drastajn punojn pro „ŝtata renverso“ aŭ „kontraŭ-registara propagando“. Pli ol 30 bloguloj troviĝas en la malliberejo. Rimarkinda estas la vjetnama pozicio en la Monda Pac-Indekso: nome tie la lando okupas la 45an rangon ankoraŭ antaŭ Latvio, Francio kaj Britio – komplete absurda rezulto!

malprogreso. Kvankam en 2011 la regado de la milista ĥunto oficiale finiĝis, la politikan povon daŭre havas generaloj de la mjanmara armeo. En kelkaj provincoj (ŝtatoj) armataj grupoj daŭre batalas unu kontraŭ la aliaj, kaj tutlande valida konvencio pri armistico ne povis esti atingita. Progreso eble estas, ke la armeo maldungis 376 infanajn soldatojn kaj junajn plenkreskulojn. La rajtoj libere esprimi opinion kaj libere kunvenadi estis draste limigataj. Ko Htin Kyaw, la prezidanto de la asocio „Movado por Demokratio" (MDCF), kiu engaĝiĝas por homaj rajtoj en Mjanmaro, estis akuzita pro diversaj ´krimoj´ kaj kondamnita al 13-jara punaresto en malliberejo, ĉar li organizis protestojn kontraŭ la registaro. Tri aliaj similaj aktivuloj same troviĝas en la malliberejo. La ŝtatprezidento subskribis leĝon, kiu ebligas pli facile aresti kaj malliberigi opoziciulojn. Longan malliberejan punon ricevis ankaŭ kelkaj ĵurnalistoj, kiuj raportis pri iu sekreta fabriko, kiu laŭ ilia supozo produktas kemiajn armilojn. La promeso de la prezidento amnestii ĉiujn pacajn politikajn malliberulojn ne estis plenumita. En la tuta lando okazis protestoj kontraŭ la konfiskado de tero. La polico reagis per ekscesa perforto, pafado kontraŭ manifestantoj kaj arestado de sennombraj kamparanoj kaj aktivuloj, precipe en la regiono Sagaing. Mjanmaro daŭre ne ratifis la UN-konvencion pri turmentado, kvankam la vicministro pri eksteraj aferoj promesis tion. En oktobro forpasis unu ĵurnalisto en polica arestejo, probable ĉar li estis turmentata. Li raportis pri bataloj inter armeanoj kaj armataj ribeluloj. La sekurecaj fortoj daŭre ĝuas imunecon kontraŭ jura persekutado, kiu estas garantiata de la konstitucio al ili. Krimoj kontraŭ lezado de homaj rajtoj ne estas esploataj, nek punitaj, kaj ekzistas kazoj de homoj, kiuj komplete malaperis post sia arestado. Kvankam la prezidento transformis juĝojn pri mortpuno en malliberejan arestadon, la juraj reguloj por kondamni homojn al la mortpuno restis validaj. En junio 2015 la parlamento de Mjanmaro malakceptis novan leĝon por eviti, ke *Aung San Suu Kyi*, la mondfama gvidantino de la mjanmara opozicio, kiu samtempe portas la nobelpremion pri paco kaj kiu longan tempon troviĝis en hejma aresto, povu kandidatiĝi kiel ŝtatprezidento. Laŭ la valida leĝo ŝtatprezidento de Mjanmaro povas fariĝi nur personoj, kiuj ne havas eksterlandan edzon aŭ infanojn kun eksterlanda civitaneco (ĝuste la edzo kaj la infanoj de Aung San havas britajn pasportojn). La popolgrupo Rohingya, kiu estas islama minoritato, vivanta en la ŝtato Rakhaing ĉe la limo kun Bangladeŝo, estis daŭre subpremata kaj diskriminaciata. Ĉi tiu popolo havas unu milionojn da homoj. Ĉar laŭ la leĝo pri ŝtataneco de 1982 la Rohingya-minoritato ne estas oficiale agnoskata kiel popolgrupo, ĝiaj anoj sekve estas ekskludataj de la ŝtataneco de Mjanmaro. Pro la persekutado kaj reprezalioj kontraŭ tiu popolgrupo minimume unu miliono da homoj de tiu tribo vivas kiel rifuĝintoj en Bangladeŝo kaj aliaj aziaj landoj. UN konsideras la popolon Rohingya „la plej multe persekutata minoritato de la mondo".[24]

Ankaŭ en ***Bangladeŝo***, kie vivas 158 milionoj da homoj plejparte en granda mizero, la politika, ekonomia kaj socia situacioj estas ege stresataj. Regule okazas ekstrema perforto kontraŭ kritikaj ĵurnalistoj, opoziciuloj kaj virinoj. Tre malfacila estas la situacio de la laboristoj en la fifamaj teksaĵfabrikoj de Bangladeŝo, kie la sekurecaj kondiĉoj estas komplete nesufiĉaj. En tiaj fabrikoj mortis lastatempe minimume 1130 kaj vundiĝis minimume 2000 homoj. Kontraŭ pluraj homoj estis aljuĝita la mortpuno, kaj minimume unu persono estis ekzekutita en decembro 2013. Multegaj virinoj fariĝis viktimo de trompa perado, homa komercado kaj seksa ekspluatado.

En ***Nepalo*** mankis la volo kaj povo de la registaro alpreni efikajn rimedojn favore al la protekto de la homaj rajtoj. Diskriminacio okazas surbaze de diferencoj rilate sekson, kaston, socian tavolon, etnan apartenecon kaj religion. Politike, la aŭtoritatoj draste reagis kontraŭ la provo de C.K. Raut, kiu pledis por la sendependiĝo de la regiono Terai (Madeŝ). Li estis arestita kaj akuzita pro „kontraŭŝtataj aktivecoj". Granda problemo estas la situacio de duonmiliono da nepalaj laboristoj, kiuj estis sendataj de trompemaj kaj koruptaj perantoj en la arabajn ŝtatojn de la Golfo, kie ili devas labori en diversaj konstruejoj sub mizeraj kondiĉoj kaj sen vera laborprotekto kaj kie ili riskas esti ekspluatataj. Inter julio 2013 kaj julio 2014 estis nombrataj 880 tiaj laborfortoj en eksterlando, kiuj mortis. Ĉar multaj tiaj nepalaj labormigrantoj, kiuj ne ricevis sian promesitan salajron en eksterlando, perdis sian laborlokon aŭ devis pagi al la perantoj altajn makleraĵojn, ili devis alpreni monpruntojn kun altaj interezoj kaj tiel amasigis malfacile repageblajn ŝuldojn. La tertremo de 2015 aldone ege malfaciligis la situacion en la tuta lando kaj akrigis la mizeran vivadon de la popolo de Nepalo, kiu restis unu el la plej malriĉaj landoj de la mondo.[25]

Fine, ni turnu la atenton ankoraŭ al kelkaj aliaj landoj: Norda Koreio, Suda Koreio kaj Japanio.

Verŝajne la elstara bizara kulmino de la grandstila lezado de la homaj rajtoj estas ***„Korea Demokrata Popolrespubliko" (Norda Koreio)***, kiu en la cetera mondo estas konsiderata kiel plej lasta klasika totalisma ŝtato kun „pure stalinisma sistemo", regata de la sola komunisma familia dinastio en la historio. En februaro 2014 la komisiono de UN por esplori la homrajtan situacion en tiu ĉi orientazia lando publikigis sian raporton, kiu ampleksas 372 paĝojn, por veni al la konkludo, ke multaj lezoj okazintaj en tiu lando estas klasifikeblaj kiel „krimoj kontraŭ la homeco kaj homaro". En Nordkoreio ekzistas gigantaj gulagecaj koncentrejoj, punlagroj, malliberejoj kaj „reedukaj tendaroj", en kiuj vivas centmiloj da homoj, inter ili multaj kompletaj familioj, kiuj ricevis kolektivan punon, kaj kien ili estis senditaj post maljustaj tribunalaj procesoj. La vivkondiĉoj en tiuj lokoj estas teruraj kaj mizeregaj. Sed la nordkorea registaro, kiu preskaŭ totale izolas siajn landon kaj popolon, neas la ekziston de tiaj politikaj koncentrejoj en Nordkoreio, kies limoj estas hermetike fermataj (de tempo al tempo rifuĝintoj tamen sukcesas atingi

[24] Detalojn vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Rohingya.

[25] Laŭ la Monda Evolua Indekso (Human Development Index) ĝuste Bangladeŝo, Nepalo kaj Pakistano estas la plej malriĉaj landoj de orienta Azio (rangoj 139, 143 kaj 144 de 175 rangoj) kaj estas, kune kun Jemeno, kiu okupas la 148an rangon, la plej malriĉaj landoj de Azio entute.

eksterlandon, precipe Ĉinion, Sudkoreion kaj Japanion, kie ili povas raporti pri la situacio en sia patrujo[26]). La nordkorea sekreta polico arestis ankaŭ kelkdek personojn, kiuj malaperis el Nordkoreio, sur la teritorioj de Sudkoreio kaj Japanio. En Nordkoreio regule furoras nutraĵ-krizoj, tiel ke la popolo ofte malsatas kaj dependas de eksterlanda helpo, kiu eĉ ne ĉiam atingas la plej helpindajn homojn. En Nordkoreio praktike ĉiuj civitanaj rajtoj, precipe libere esprimi opinion, esti informata, praktikadi religion kaj libere moviĝi, estas baze subpremataj kaj ege limigataj. Kristanoj kaj budhanoj estas persekutataj, kaj civitanoj de Nordkoreio ne rajtas legi alilandan gazetaron, nek rajtas veturi eksterlanden (krom diplomatoj kaj sportistoj), la telefonado al eksterlando estas ege limigata kaj severe kontrolata. Regas totala gazetara cenzuro kaj totala ŝtata ideologia propagando, kiu faras el la homoj groteskajn marionetojn, kiuj devas ŝajnigi sin kontentaj kaj feliĉaj kaj demonstri la superecon de Nordkoreio. En tio la armeo ludas elstaran edukan rolon. En Nordkoreio oni praktikas iujn neklarajn formojn de deviga aŭ perforta prostitucio (nomata „kippŭmjo“), en kiu verŝajne ankaŭ infanoj partoprenas. Ĉinio resendas ĉiujn nordkoreojn, kiuj kaŝe trairis la limon, al Nordkoreio. Virinoj, kiuj estas kaptataj kaj suspektataj, ke ilin gravedigis ĉinaj viroj, estas devigataj aborti per injekcio; infanoj, kiuj naskiĝis vivaj, estas mortigitaj kaj forĵetataj tra specialaj rubaĵujoj antaŭ ol esti enterigitaj.[27] En pli fruaj jaroj okazis ankaŭ publikaj ekzekutoj por timigi la amasojn (la plej lasta oficiala ekzekuto surbaze de mortpuno estis registrita en 2013). La registaro en Pjongjango nur parte montris sin preta kunlabori kun UN por plibonigi la situacion. Internacian atenton vekis la ondo de mort-ekzekutoj, kiuj laŭdire koncernis iujn membrojn de la familio de la nordkorea diktatoro Kim Jong-Un,[28] kiuj samtempe estis parencoj (onklo, onklino aŭ simile). Pro la ekstrema manko de transparentco estas malfacile ekscii kaj kompreni, kio vere okazas en Nordkoreio. En ĉiuj internaciaj rangoj kaj indeksoj Nordkoreio okupas pli malpli la plej lastan rangon. Malgraŭ ĉio tio, ankaŭ Nordkoreio akceptas eksterlandajn turistojn, malfermas sin al eksterlandaj ekonomiaj investoroj kaj travivas fazon de modesta moderniĝo, kiu ne povas eviti okcidentan influon.[29] En ĉio tio certe ne necesas forgesi, ke Nordkoreio estas tipe azia kaj ne eŭropa aŭ usona ´civilizo´. Malgraŭ la supozataj amaskrimoj de la nordkorea diktatoro, la indonezia fondaĵo „Sukarno“ anoncis, ke ĝi aljuĝis al li pacpremion por „paco, justeco kaj homeco“ pro ties „batalo kontraŭ neokoloniisma imperiismo.[30] Laŭ la fondaĵo la kritiko kontraŭ la nordkorea reĝimestro pro lezado de la homaj rajtoj estas nur „okcidenta propagando“.

Pro la supozeblaj politikaj agadoj de Norda Koreio kontraŭ la sudo de la duoninsulo, en ***Korea Respubliko (Suda Koreio)*** la nervozeco kreskas. Tio ŝajnas esti la ĉefa kaŭzo por adapti kaj severigi la juron pri la nacia sekureco, kiu servas por limigi la opinian liberecon. En 2013 129 kaj en 2014 32 personoj estis akuzitaj pro laŭdira lezado de la „Leĝo pri Nacia Sekureco“, kiu ampleksas krimojn kiel la „konspiron por renverso“, „instigon de ribelo“ k.s. Ĉefa politika viktimo de tiu juro fariĝis la maldekstrema „Unuiĝinta Progrespartio“, kiu estis malpermesita post kiam la sudkorea Konstitucia Tribunalo klasifikis ĝin danĝera por la „demokratia ordo“; ĝia membro Lee Seok-ki estis arestita pro ŝtatperfido (t.e. planataj puĉo kontraŭ la sudkorea registaro kaj reunuiĝo de Koreio sub nordkorea gvido), kaj la deputitoj de tiu partio perdis siajn parlamentajn mandatojn.

Japanio, la plej lasta parlamenta monarkio kun „imperia moŝto la imperiestro“ (japane: „tenno“, angle: Emperor, germane: Kaiser) kiel ŝtatestro, izoliĝas pli kaj pli per ŝajna distanciĝo de la respektado de internaciaj homrajtaj normoj. Japanaj specifaĵoj ĉi-rilate estas, ke la japanaj aŭtoritatoj ne volas sufiĉe protekti la rajtojn de eksterlandanoj kaj ties parencoj (temas precipe pri etnaj koreoj) kaj ke ĝi ne emas kontraŭbatali la neadon de krimoj farataj dum la dua mondmilito (nome temas precipe pri seksa sklaveco en la japana armeo). La oficialaj rilatoj inter Japanio kaj Koreio daŭre estas streĉataj. Japanoj, kiuj estis kondamnitaj al la mortpuno antaŭ jardekoj, devis tro longe atendi en malliberejoj por ricevi ĝin. Unu el tiuj malliberuloj, kiu estis arestita en 1966 kaj mortkondamnita en 1968 (!) surbaze de perforte devigita konfeso kadre de maljusta proceso, estis liberigita post 48 jaroj da arestado en mallinereko, ĉar li psike malsaniĝis.[31] La mortpuno ne estas abolita en Japanio, kaj la plej aktuala mortekzekuto okazis en junio 2015 en Nagojo en la kazo de 44-jara rab-murdisto.[32] Sub la preteksto de la nacia sekureco estis enkondukita nova leĝo, kiu koncernas la defendon, diplomation kaj terorismon kaj per kiu eblas klasifiki certajn informojn ŝtataj sekretoj; la kritiko kontraŭ tiu ĉi leĝo estas, ke ĝi povus malfaciligi la publikan aliron al informoj kaj malaltigi la ĝeneralan transparentecon en la ŝtato.

---

[26] Ekzemple: http://www.bild.de/politik/ausland/nordkorea/so-grausam-wird-in-gulags-hingerichtet-34814350.bild.html, http://www.welt.de/politik/ausland/article122572766/Nordkorea-baut-Straflager-aus-und-toetet-brutal.html, https://www.youtube.com/watch?v=mMJvY43jlDM kaj https://en.wikipedia.org/wiki/Human_rights_in_North_Korea#Internment_camps_for_political_prisoners.

[27] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Human_rights_in_North_Korea#Forced_prostitution.

[28] Pri li cirkulas la iom enigma onidiro, ke li vizitis lernejon en Berno, Svislando (vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Kim_Jong-un).

[29] Interesan filmon pri Nordkoreio vd. sub https://www.youtube.com/watch?v=5xs--To414I.

[30] Vd. http://www.spiegel.de/politik/ausland/indonesien-kim-jong-un-soll-friedenspreis-bekommen-a-1046486.html.

[31] Vd. http://www.amnesty.ch/de/laender/asien-pazifik/japan/dok/2014/briefaktion-fuer-iwao-hakamada.

[32] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Todesstrafe#Japan kaj http://www.amnesty-todesstrafe.de/files/reader_todesstrafe-in-japan.pdf.

Komparante la kulturon de la homaj rajtoj en tiuj tri landoj, oni sendube povas konstati iujn similecojn kaj paralelojn en la ´mentaleco´ de tiuj popoloj, precipe la senkompatan traktadon de certaj suspektindaj kaj punendaj homoj.

Ĉu temas pri azia ´mentaleco´, ĉu pri komunisma heredaĵo, ankaŭ en ***Mongolio*** kutimas la ĉantaĝo de arestitoj por devigi ilin konfesi sian krimon, kio estas ligata kun turmentado kaj mistraktado. Post la likvido de iu speciala instanco de la ĝenerala prokuroraro, la rimedo de la ebleco esplori plendojn pri prokuroroj, juristoj kaj policistoj ne plu ekzistas. Kvankam antaŭ kelkaj jaroj oni ankoraŭ povis legi pri sekretaj mort-ekzekutoj en Mongolio, ĉi tiu temo ne plu aperis en la nuna raporto de AI.[33]

Fine ankoraŭ kelkajn rimarkojn pri Indonezio, Filipinoj kaj Maledivoj.

El ***Indonezio*** venis sciigoj pri gravaj lezoj kontraŭ la homaj rajtoj, interalie malpermesataj mortigoj, nenecesa perforto kaj superflua turmentado, kiuj estis plenumataj de policistoj kaj fortoj de la sekurecaj servoj. Ĉefaj viktimoj estas iuj homoj, kiuj estas suspektataj, ke ili apartenas al iu sendependiga ribela organizaĵo, kaj iuj indiĝenaj komunumoj kiel Suku Anak Dalam en la provinco Jambi, kiuj protestis kontraŭ la planoj de iu firmao, kiu produktas palmoleon. Dedek Khairudin malaperis en novembro 2013 sensupre, post kiam li estis arestita de iu ano de la armea sekureca servo. En regionoj, ekzemple Papuo kaj Maluku, kie okazas sendependigaj strebadoj, diversaj politikaj aktivuloj estis arestitaj. Religia minoritatoj, precipe islamaj (kiel la Ahmadiyya-komunumo kaj la siistoj), estis ĉikanataj, timigataj kaj atakataj. En Aceh minimume 76 personoj estis punataj per bastonbatoj pro krimoj laŭdire plenumataj kontraŭ la reguloj de la Ŝario (al tio apartenas vetludo, alkohola konsumado kaj divorco). **En** septembro 2014 la parlamento de Aceh eĉ severigis la islaman leĝon, laŭ kiu ankaŭ samseksemaj kaj negeedzaj seksaj kontaktoj estas puneblaj.

Ĉar en ***Filipinoj*** turmentado restis senpuna, kritikaj ĵurnalistoj kaj homrajtaj defendistoj riskis esti mortigitaj. La masakro kontraŭ 58 ĵurnalistoj en Maguindanao en 2009 estas konsiderata kiel plej granda masakro en la mondo, kiu iam estis plenumita kontraŭ ĵurnalistoj. La filipina ŝtato tamen transprenis la respondecon por la krimoj kontraŭ la homaj rajtoj, kiuj estis plenumataj dum la milita stato, kiu estis proklamita de la Marcos-diktaturo, kaj fondis komisionon por esplori la rajtojn de rekompencoj por ĉi-koncernaj viktimoj. En marto 2014 la filipina registaro kaj la armata Islamisma Liberiga Fronto (MILF) subskribis ampleksan pactraktaton por fini la intertraktan procezon, kiu daŭris 17 jarojn. La konvencio inter alie antaŭvidas la kreon de la aŭtonoma regiono Bangsamoro en la sudo de Filipinoj. Malgraŭ tio okazis brutalaj atencoj flanke de armataj islamismaj grupoj kiel Abu Sayyaf, kiu ne agnoskas la konvencion inter MILF kaj la registaro. En julio 2014 Abu Sayyaf mortigis 21 personojn en la provinco Sulu. Por la periodo inter januaro kaj julio 2014 la komisono CHR registris 75 kazojn de turmento, la plimulto de viktimoj de turmento originas el malriĉaj kaj marĝenaj tavoloj de la loĝantaro. Kvankam ekde 2009 ekzistas leĝo kontraŭ turmentado, neniu kulpanto estis akuzata aŭ punata.

Pro la preparado de la reaplikado la mortpuno en ***Maledivoj*** post pli ol 60 jaroj sen ekzekuto, la vivo de minimume 20 personoj estis en danĝero. La bastonbata puno estis aljuĝata precipe al virinoj, kiuj havis ekstergeedzajn seksajn kontaktojn. En julio 2014 iu islamisma grupo kaptis kelkajn virojn kaj minacis ilin per malagrablaj sekvoj, se ili daŭrigas subteni la „ateismon“. Neniu de tiuj respondeculoj estis jure persekutata. Unu pledanto por la religia libereco (Ismail „Hilath“ Raŝid) estis vundita dum pertrancila atako, kaj alia konata ĵurnalisto (Aĥmed Rilvan Abdullah) estis verŝajne malaperigita.

Afriko

Katastrofa restis la situacio de la homaj rajtoj ankaŭ en multaj landoj de Afriko:

Niĝerio vekis la atenton de la monda publiko, kiam la islama terorisma grupo Boko Haram kaptis aŭ rabis 276 lernantinojn kaj retenis ilin en nekonata loko. Samtempe, la sekurecaj fortoj de Niĝerio plenumis diversajn krimojn kontraŭ homoj, kiuj estis arestitaj, ĉar ili estis suspektataj, ke ili estas anoj de Boko Haram. La milita konflikto inter diversaj armataj grupoj en ***Niĝero*** produktis pli ol 57´000 rifuĝintojn, de kiuj 16´000 serĉis ŝirmon kaj protekton en najbaraj landoj, precipe Malio kaj Niĝerio. En la ***Respubliko de Centra Afriko*** okazis turmentado, seksa perfortado kaj amasmurdoj, kiuj apenaŭ trovis la atenton de la monda publiko. 5000 homoj pereis malgraŭ la ĉeesto de internaciaj pactrupoj Tre malbona estas la homrajta situacio en ***Ĉado***, ***Burkina Faso***, ***Malio*** kaj ***Maŭretanio***, kie oni ankoraŭ praktikas la sklavecon. En ***Liberio***, ***Siera-Leono*** kaj ***Gvineo***, kie furoris la ebola malsano, mankis bazaj helprimedoj por rapide kaj efike kontraŭbatali kaj haltigi tiun teruran epidemion, kiu mortigis milojn da homoj, kiuj parte estis stigmatizataj de la socio. Pli frue plenumataj militkrimoj daŭre ne estis esplorataj de la politiko kaj iliaj respondeculoj restis nepunataj. En la ***Eburborda Respubliko***, kie 600 politikaj prizonuloj atendis sian proceson, pli ol 180 estis liberigitaj. La akuzoj kontraŭ la iama prezidento Laurent Gbagbo estis

[33] Pri la mortpuno en Azio vd. http://www.swp-berlin.org/de/publikationen/swp-aktuell-de/swp-aktuell-detail/article/todesstrafe_in_asien.html.

konfirmitaj de la Internacia Punkortumo. En ***Ganao*** de la polica oficejo pri hejma perforto estis registritaj en 2013 16´275 kazoj de perforto kontraŭ virinoj kaj knabinoj, kvankam hejma perforto estas leĝe malpermesata.

En ***Sudsudano***, kiu iam signifis la esperon de Afriko, perforte mortis dekmiloj da civiluloj, du milionoj da homoj estis forpelataj. Ambaŭ flankoj, kaj la registara armeo kaj la opozicio kulpas pri militaj krimoj.[34] En ***Sudano*** mem, kiu estas islam(ism)a ŝtato laŭ la konstitucio, la situacio ne estas pli bona. La konfliktoj en la provincoj Darfuro kaj Blua Nilo kaŭzis amasan forpeladon de homoj kaj sennombrajn mortviktimojn inter la civila loĝantaro. La sudana armeo detruis publikajn konstruaĵojn, lernejojn kaj malsanulejojn kaj blokis la aliron de organizaĵoj al la homoj, kiuj bezonas helpon. Laŭ la indekso pri fiaskintaj ŝtatoj (*Fund for Peace*) Sudano okupis en 2010 la trian rangon.

En ***Eritreo***, kiu evidente transformiĝis al brutala totalisma ŝtato, miloj da politikaj prizonuloj troviĝis en malliberejoj, kie ili estas tute izolataj kaj sen kontakto kun la ekstera mondo. La kondiĉoj en eritreaj malliberejoj estas neimageble teruraj. Junaj viroj estas perforte rekrutataj por dumvive servi en la armeo. Membroj de religiaj minoritatoj (sektoj) estas persekutataj. Tiu situacio generis amason da rifuĝintoj, kiu strebas iri al Eŭropo; UNHCR registris 338´129 rifuĝintojn kaj azilpetantojn, kio estas enorme granda nombro. Multaj fariĝis viktimoj de bandoj, kiuj agadas en Sudano kaj Egiptio, kaj estis retenataj dum unu jaro de tiuj bandoj, kiuj provis ĉantaĝi iliajn familiojn por ricevi monon.[35]

Pro la milita konflikto en ***Somalio***, kiu en la indekso pri fiaskintaj ŝtatoj (*Fund for Peace*) okupis en 2010 la unuan rangon, pli ol 100´000 civiluloj estis vundataj, lezataj, forpelataj aŭ mortigitaj. Ĉiuj partioj de la konflikto kulpas pri gravaj lezoj de la homaj rajtoj. Estis multaj kazoj de turmentado, seksa perfortado kaj kaptado aŭ rabado de infanoj, kiuj estis devige rekrutataj kiel soldatoj. Fine de 2014 Somalio anko-raŭ ne ratifis la UN-konvencion pri infanaj rajtoj. En iu urbo unu virino estis ŝtonumita, ĉar oni riproĉis al ŝi, ke ŝi havis plurajn edzojn. Helporganizaĵoj havis nur limigatan aliron al la viktimoj. En Somalio ekzistas 1 miliono da homoj, kiuj estas rekte koncernataj de la humaneca krizo, kaj 2,1 milionoj bezonis helpon kaj nutraĵojn. 900´000 rifuĝintoj el Somalio troviĝis en najbaraj landoj, precipe Etiopio kaj Kenjo. La mortpuno, kiu estis aljuĝata de armeaj tribunaloj kaj efektivigataj al opoziciuloj, kreskis, ĵurnalistoj estis arestitaj aŭ mortigitaj, la gazetara libereco estas subpremata, redakcioj fermataj. La ekzisto de infanaj soldatoj estas konataj ankaŭ en ***Konga Demokratia Respubliko***, kie la seksa perfortado kaj ekspluatado de virinoj kaj knabinoj fare de anoj de la konga armeo estas kutima afero. Juraj klopodoj por kontraŭbatali la senpunecon estis malmulte sukcesaj. Ne pli bona estas la homrajta situacio en Konga Respubliko (Brazzaville), kie okazis iu dubinda operaco, kiu direktis sin kontraŭ rifuĝintoj de Konga DR, kun grava lezado de ties rajtoj.

La registaro de ***Kenjo*** nervoze reagis kontraŭ terorismaj atakoj, kiuj estis plenumataj de somaliaj islamistoj sur kenja teritorio, kaj fortigis la defendon kadre de la „lukto kontraŭ terorismo“. Lige kun tiu batalo estis limigataj ankaŭ la agadlibereco de NROj. En 2010 prezidento Kenyatta estis akuzita pro supozataj krimoj kontraŭ la homeco kaj devis aperi antaŭ la Internacia Punkortumo en Hago, kiu devis retiri la akuzon en decembro 2014 pro manko de pruvoj.[36] Dum sia vizito en Kenjo en julio 2015 la usona prezidento Obama kritikis la diskriminacion de samseks-emuloj, sed Kenyatta replikis, ke la kenja kulturo ne akceptas samseksemon.[37]

Ankaŭ ***Ugando*** aplikis pli rigorajn rimedojn kontraŭ civilsociaj institucioj kaj seksaj minoritatoj. Homoj en ***Tanzanio***, kiuj suferas la malsanon de la albinismo, riskis esti mortigitaj por rikolti iliajn seksorganojn, ĉar en Tanzanio (kaj aliaj landoj de Afriko) furoras la superstiĉa kredo, ke albinuloj posedas specialajn fortojn por kuraci HIV-infekton.[38] En ĉiuj tri menciitaj landoj kutimas perforto kaj diversaj atakoj kontraŭ virinoj kaj lezoj de ties rajtoj. En certaj regionoj de orienta Afriko, kie vivas la triboj Masai, Kisii kaj Kuria, daŭre estas praktikata la tradicio de la kripligo de virinaj seksorganoj. La registaroj de ***Burundo*** kaj ***Ruando***, du elstaraj ekzemploj de genocid-riskaj ŝtatoj, kiuj estas subfosataj de senskrupulaj armeaj sekretaj servoj, ekstreme limigis la opinian kaj gazetaran liberecojn kaj enkondukis drastajn reprezaliojn kontraŭ kritikaj aŭ sendependaj ĵurnalistoj, homrajtaj defendistoj kaj opoziciuloj. Precipe en Burundo, kie en majo 2015 la sekretservistoj provis puĉi kontraŭ la reganta prezidento, kiu ne volas forlasi sian postenon, la situacio estas ege nervoza. La aktuala krizo kaŭzis ĉ. 100´000 fuĝantojn, kiuj sovaĝe cirkulas en la regiono.

Ankaŭ en ***Angolo*** la rajtoj libere kunvenadi kaj asociiĝi estas subpremataj kaj pacaj manifestaciantoj estis mistraktataj de la polico, kiu ankaŭ kulpas pri arbitraj mortigoj (la raporto de AI mencias plurajn kazojn). Miloj da familioj fariĝis viktimoj de perfortaj forpeloj el siaj loĝdomoj, kiuj estis detruataj, sen doni adekvaran rekompencon en centoj da kazoj. Iu junulo (Manuel Nito Alves) retroviĝis antaŭ la tribunalo pro laŭdira kalumnio kontraŭ la ŝtatprezidento (sed li estis senkulpigita). Kontraŭ alia homo, kiu „kalumniis“ ŝtatajn oficistojn, estis

---

[34] Ĵus aperis gazetara komuniko pri barbaraj krimoj, kiujn soldatoj plenumis en Sudsudano (vd. http://www.faz.net/aktuell/politik/soldaten-in-suedsudan-verbrennen-maedchen-bei-lebendigem-leib-13677428.html).

[35] Vd. ankaŭ https://www.hrw.org/news/2014/12/17/denmark-eritrea-immigration-report-deeply-flawed.

[36] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Uhuru_Kenyatta#Anklage_vor_dem_Internationalen_Strafgerichtshof kaj http://www.nzz.ch/international/afrika/prozess-gegen-kenyatta-ist-geplatzt-1.18438919.

[37] Vd. http://www.zeit.de/politik/ausland/2015-07/barack-obama-nairobi-kenia-homosexuelle-kritik-diskriminierung,

[38] Mortigoj de albinuloj estas konataj ankaŭ en Burundo, Kenjo, Konga DR, Zimbabvo kaj Svazilando. Detalojn vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Albinismus.

komencita jura proceso, temas pri la ĵurnalisto kaj homrajta defendisto Rafael Marques de Morais, kiu fariĝis internacie konata pro sia raportado pri koupto kaj la diamanta inddstrio en Angolo.[39] En 2012 kaj 2013 malaperis la ĵurnalistoj Milocas Pereira Cláudio António „Ndela“ kaj Adilson Panela Gregório „Belucho“ sen postlasi spurojn.

En ***Mosambiko*** la polico agas per ekscesa perforto kontraŭ ĉiuj, kiuj estas suspektataj esti batalantoj de la resista movado RENAMO.

La aŭtoritatoj de ***Sambio*** agadis sisteme kontraŭ registaraj opoziciuloj, civilservanoj kaj seksaj minoritatoj. En januaro 2014 la ĉefo de la opozicia partio Frank Bwalya estis arestita kaj akuzita pro kalumnio, ĉar li komparis la tiaman prezidenton kun terpomo (sic). En la bantua lingvo li utiligis esprimon, kiu signifan homon, kiu ne akceptas konsilon.

En ***Zimbabvo***, kie la 90-jara prezidento Robert Mugabe ne volas forlasi la postenon, la polico sufokis per ekscesa perforto ciujn protestojn kaj turmentis aresttajn protestintojn; de tiu perforto estis koncernataj ankau aktivuloj de la reganta partio ZANU-PF, en kiu okazis konkurenc-luktoj.

En ***Namibio*** estis daŭrigata la longdaŭra jura proceso kontraŭ la t.n. Caprivi-malliberuloj, kiuj estis akuzitaj pro ŝtatperfido. AI konsideras multajn de tiuj malliberuloj, entute temas pri 111 viroj, kiuj parte sidas en prizonoj jam de pli ol 14 jaroj, supozeble neperfortaj politikaj malliberuloj, kiuj troviĝas en malliberejoj pro politikaj aŭ etnaj kaŭzoj aŭ ĉar ili apartenas al certaj organizaĵoj. Krom tio, en aŭgusto 2014 la nearmata manifestantino Frieda Ndatipo estis mortigita de la polico antaŭ la sidejo de la registara partio Swapo. Ŝi partoprenis en protestoj de la interesgrupo „Infanoj de la liberiga batalo“, kiu luktas por tio, ke la infanoj de Swapo-membroj, kiuj mortis en la ekzilo, ricevu de la registaro monon kaj laboron.

Last but not least necesas raporti ankaŭ pri ***Etiopio***, la plej maljuna kristana lando de Afriko, kie la homrajta situacio fariĝis pli kaj pli malbona. Malgraŭ rapida ekonomia kresko, kio faras el la lando, kiu daŭre vivas kvazaŭ en bibliaj kondiĉoj, kazon de espero, la demokratio estas malhelpata, la homaj rajtoj akre lezataj. La registaro krude agis kontraŭ enlandaj disidentoj, kritikaj ĵurnalistoj, bloguloj (precipe de „Zone-9“), pacaj manifestantoj kaj membroj de opoziciaj partioj, kiujn oni arestis prevente en kazo de suspekto, por eviti ke ili povu publike esprimi sian opinion. Do, la opinia libereco estas draste limigata, la libereco de la gazetaro estas subpremata. Ekzistas leĝo, kiu malhelpas la laboron de homrajtaj organizaĵoj. Arbitraj malliberigoj (de miloj da homoj), mistraktado, turmentado kaj ekscesa perforto estas kutimaj kaj rutinaj en tiu lando. La registaro aplikas diversajn rimedojn kaj metodojn por la politika kontrolado de la loĝantaro, al kiuj apartenas la politika submetado de la polico kaj justico. Naciaj kaj regionaj sekurecaj servoj respondecas por diversaj lezadoj de la homaj rajtoj praktike en la tuta lando. En la urboj Ambo kaj Guder kaj en la universitatoj de Wollega kaj Madawa-lubu la polico pafis kontraŭ manifestantoj, kio kaŭzis minimume 30 mortantojn. Inter la etnaj minoritatoj precipe la popolo Oromo estas konfrontata kun lezataj homaj rajtoj, ĉar oni timas ilin kiel regionajn kontraŭulojn de la centra registaro en Adisabebo. Krom tio, agentoj de la etiopia registaro aktivis en diversaj aliaj landoj por kapti kaj rekonduki serĉatajn personojn, kiuj parte posedas eksterlandan civitanecon, al Etiopio, kie ilin probable atendas maljusta jura proceso kaj longa malliberigo.[40]

Latinameriko

Centra Ameriko

En ***Honduro*** estis registrataj polica perforto kontraŭ indiĝenaj kaj afro-honduraj minoritatoj kaj 636 mortigoj de virinoj (femicidoj). En ***Gvatemalo***, kie ekzistas en principo la samaj problemoj, estis mortigitaj pli ol 500 virinoj. La respondeculoj por amasmurdoj, militkrimoj kaj kontraŭhomaj krimoj, kiuj okazis dum la milita konflikto inter 1960 kaj 1996, ne estis punataj. La ´teatro´ ĉirkaŭ la proceso kontraŭ eksprezidento Ríos Montt, kiu estis akuzita pro genocido, ankoraŭ ne finiĝis.[41] En ***Nikaragvo*** daŭre validas absoluta malpermeso de abortoj. Pluraj virinoj estis mortigitaj lige kun hejma perforto. Indiĝenoj protestis kontraŭ la decido de la nikaragva registaro disdoni licencon por konstrui kanalon tra la lando kaj inter ambaŭ oceanoj, kiu tuŝas la teritorion de indiĝenoj. Malgraŭ promesoj de la panama registaro serĉi personojn, kiuj fariĝis viktimoj de malaperigoj dum la Noriega-diktaturo de la 1970aj jaroj, neniuj progresoj estis farataj. En septembro 2014 la Supera Kortumo de Panamo decidis, ke Manuel Noriega, la iama potenculo de ***Panamo***, estu prezentata antaŭ la tribunalo (esence pro lia kunrespondeco por la mortigo de iu soldato en 1969!). En tiu tempo Noriego jam troviĝis en la malliberejo lige kun la mortigo de du politikaj kontraŭuloj dum sia prezida tempo). Ankaŭ en Panamo vivas indiĝenoj, kiuj protestis

[39] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Rafael_Marques_(journalist).

[40] Laŭ la Monda Evolua Indekso (Human Development Index) fakte ĉiuj landoj de ´nigra´ Afriko situas post rango 100 (de 175) kaj ĝuste multaj tiaj landoj formas tutan grupon de plej malriĉaj landoj de la mondo. Temas pri Zimbabvo, Kenjo, Ugando, Madagaskaro, Gambio, Niĝerio, Dĵibutio, Maŭretanio, Eritreo, Senegalio, Gvineo, Ruando, Benino, Tanzanio, Ebura Bordo, Malavio, Sambio, Angolo, Ĉado, Gvineo Bisaŭa, DR Kongo (Kinŝasa), Centrafrika Respubliko, Etiopio, Mozambiko, Burundio, Malio, Burkina Faso, Niĝero kaj Siera-Leono (rangoj 145-175).

[41] Vd. http://www.nzz.ch/international/amerika/entgeht-rios-montt-einer-verurteilung-1.18576800.

kontraŭ la konstruado de baraĝo sur sia teritorio. En ***Meksiko*** malaperis 43 studentoj, kiuj verŝajne estis mortigitaj de krimaj bandoj kun la partopreno de policanoj kaj soldatoj. La meksika registaro ne reagis por esplori la incidenton sed male klopodis bagateligi ĝin. Kvankam en ***Puerto Riko*** la mortpuno estis abolita en 1929, Usono, al kies justico la ŝtateto parte estas submetita, klopodis en pluraj kazoj efektivigi la mortpunon. Sed en tri kazoj la asizaj juĝantoj de Puerto Riko povis atingi, ke la mortpuno estis transformita al dumviva aresto en malliberejo.

En ***Kubo***, kiu estas daŭre regata de la komunistoj de Castro, la rajtoj libere esprimi opinion, pace manifestadi kaj publike kunvenadi estis daŭre limigataj. La nombro de spontanaj arbitraj arestoj eĉ kreskis, kaj okazis politike motivataj juraj persekutoj. Progreso estis la ŝanĝo de la vojaĝa leĝo en januaro 2013, laŭ kiu kubaj civitanoj povas en principo (teorie) pli facile veturi al eksterlando, ankaŭ disidentoj. Tamen, oni observis, ke la dokumentoj de disidentoj estis konfiskataj, kiam ili revenis al Kubo. Ĝis la fino de 2014 Kubo ne ratifis la Internacian Pakton pri civitanaj kaj politikaj rajtoj, nek la Internacian Pakton pri ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj, kvankam la lando subskribis ambaŭ paktojn en februaro 2008. La demandoj de la speciala raportisto de UN pri libereco de renkontiĝo kaj asociiĝo (oktobro 2013) kaj de la speciala raportisto de UN pri turmentado kaj aliaj kontraŭhomaj traktadoj (majo 2014) restis nerespondataj de la kuba registaro. De 1990 AI daŭre ne povas viziti la landon. Ioman esperon signifas la revivigo de kontaktoj inter Kubo kaj Usono, kiuj decidis refunkciigi siajn diplomatiajn rilatojn. Sekvo de tiu proceso estas, ke en decembro 2014 okazis interŝanĝo de malliberuloj kaj ke la kuba registaro anoncis la liberigon de pliaj 50 politikaj malliberuloj. Ripetiĝis jena bizara ritualo: Post kiam Usono longigis la ekonomian embargon kontraŭ Kubo, UN rezolucie alvokis Usonon por la 23a fojo (!) ĉesigi la embargon, kaj prezidento Obama anoncis la intencon diskutigi la US-Kongreson por nuligi la embargon. La rangoj de Kubo en diversaj mondaj indeksoj pri demokratio, gazetara libereco, korupto kaj paco estas daŭre malbonaj.[42] Kritiko kontraŭ la registaro estis subpremata kaj sekvigis diversajn jurajn konsekvencojn por kritikistoj kaj ĵurnalistoj, i.a. timigon, ĉikanadon, politike motivatan punpersekutadon, arbitran arestadon, diversspecajn reprezaliojn, kiujn ŝtataj oficistoj rajtas fari kaj kiuj estas subtenataj de la ŝtata sekureco, kiu pedante kontrolas la landon. La justica sistemo daŭre troviĝis sub rekta politika kontrolo. La rajto ricevi justan proceson antaŭ sendependa tribunalo estis forte limigata. Politike engaĝataj civitanoj estis prevente malliberigataj por eviti, ke ili partoprenu en publikaj manifestacioj. Okazis ankaŭ, ke tiaj homoj estis atakataj de pagataj batuloj. La estro de la sendependa novaĵagentejo „Hableos Press“, Roberto de Jesús Guerra Pérez, ricevis anonimajn minacojn, kaj en Havano li estis disbatita de iu nekonata atakanto. La registaro strikte kontrolas sian oficialan gazetaron cefa organo restis nur *Gránma*), sendependa ĵurnalismo ne ekzistas aŭ estas subpremata, kaj la uzado de la interreto estis limigata kaj ofte interrompata pro „teknikaj“ problemoj. Post kiam en majo 2014 la blogulino Yoani Sánchez ekfunkciigis sian novan retujon „14ymedio“, ĝi estis atakata de hakeroj. Vizitantoj de ŝiaj retpaĝoj estis rekondukataj al iu retpaĝo, kiu enhavis propagandon kontraŭ la blogulino. La artikoloj 72-90 de la punkodo estis pli ofte aplikataj; per ili eblas pli facile malliberigi kritikistojn de la registaro. Fine de 2014 kvin homoj daŭre troviĝis en la malliberejo, ĉar ili utiligis sian rajton libere esprimi sian opinion; tri el ili estis kulpigataj pri „ĝeno de la publika ordo“, post kiam ili sidis 1,5 jarojn en esploraresto. Unu el ili ricevis punon de 4 jaroj, la du aliaj estis senditaj por 2,5 jaroj en la malliberejon. Du aliaj kubanoj, kiuj estis klasifikitaj kiel „danĝeraj“, estis senditaj por 3 kaj 3,5 jaroj en la malliberejon. Unu el ili publike pendigis en Guantánamo materialojn kun kontraŭ-registara enhavo. 12 eksaj prizonuloj ne rajtis forlasi la landon kun la klarigo, ke ili devas plenumi la reston de sia puno ekster la malliberejo (sic). La nombro de arbitraj arestoj kaj malliberigoj de personoj por silentigi ilian kritikan voĉon draste kreskis. La koncerna homrajta komisiono, kiu okupiĝas pri tiu ĉi afero, nombris 8899 kazojn en la jaro 2014, kio estas kresko de pli ol 27% kompare kun la antaŭa jaro. La membroj de la fama grupo „Blankaj damoj“ estis ĉikanataj, regule haltigataj kaj arestataj por kelkaj horoj por malhelpi ilian liberan cirkuladon. Laŭ propra raporto de tiu organizaĵo, en 2013 entute 1810 membroj estis arestitaj. Dum la dua pintkonferenco de la latinamerikaj kaj karibaj landoj, kiu okazis en januaro 2014 en Havano, pluraj kritikistoj estis arestitaj aŭ cikanataj. Ĉar tiuj aktivuloj ne povis veturi al Havano, la antaŭviditaj konferencoj de la alternativa movado devis esti nuligitaj. Iuj kubanoj estis arestitaj, ĉar ili ĝenis la viziton de papo Benedikto XVI.; kvankam ili povis forlasi la malliberejon, ili devis resti en hejma aresto.

En ***Haitio*** pli ol 80´000 personoj, kiuj perdis sian loĝejon post la tertremo de 2010, troviĝis en 123 provizoraj tendaroj. En la ĉefurbo Port-au-Prince centoj da familioj fariĝis senhejmaj, post kiam la polico perforte detruis iliajn loĝejojn sen disponigi adekvatan anstataŭon. Ankaŭ en Haitio perforto kontraŭ virinoj ka knabinoj estas vaste aplikata. Post la nuligo de februaro 2014 de iu decido, ke la iama potenculo Jean-Claude Duvalier (mortinta en oktobro 2014) ne povas esti akuzita pro krimoj kontraŭ la homeco, aperis duboj pri la objektiveco kaj sendependeco de la haitia justicsistemo. En la ***Dominika Respubliko*** kreskis la spontanaj mortigoj fare de la policistoj, kiuj restis nepunitaj malgraŭ kredindaj pruvoj kontraŭ ili. Miloj da dominikanoj de haitia origino ne povis rericevi la dominikan civitanecon kaj restis senŝtataj, kio estis kritikata de la Interamerika Kortumo por homaj rajtoj. La nombro de mortigoj de virinoj kaj knabinoj kreskis en tiu lando je 53% en la unuaj ses monatoj de 2014.

[42] Laŭ la Indekso pri demokratio de la gazeto Economist Kubo situis en 2014 sur la malbona 127 de 167 rangoj. Laŭ la Indekso pri percepto de korupto de Transparency International Kubo okupas la 63an. Laŭ la Indekso pri libereco de la gazetaro de Freedom House Kubo okupas la 190an de entute 199 rangoj, kaj Reporteroj sen limoj konfirmas la malbonan pozicion de Kubo per la 170an de entute 180 rango. Vd. ankaŭ http://www.planlingvoj.ch/KUBO_Politika_raporto_2010.pdf.

Suda Ameriko

Malgraŭ iuj progresoj, grandaj homrajtaj problemoj ekzistas praktike en ĉiuj landoj de Sudameriko, kie precipe estas lezataj la rajtoj de indiĝenaj komunumoj, kiuj estas ĉikanataj kaj ĝenataj lige kun diversaj infrastrukturaj kaj konstru-projektoj. En ***Ĉilio*** kaj ***Argentino*** okazis grava teritoria konflikto kun la Mapuĉo-indiĝenoj kaj la Toba Qom-komunumo, kaj en nordorienta Argentino la indiĝenoj de India Quilms estis atakataj per armiloj, ĉar ili klopodis konservi sian landon laŭ la tribunala vojo. Kvankam la ŝtato de ***Paraĝvajo*** klopodas leĝe reguligi la rajtojn de indiĝenoj, tamen okazis ekscesa polica perforto kontraŭ iuj indiĝenaj komunumoj, kiuj insistis pri siaj rajtoj loĝi en sia origina teritorio. Kontraŭ la lezado de homaj rajtoj lige kun la rikoltado de nafto en la nacia parko de Yasuni okazis rotestoj de indiĝenoj ankaŭ en ***Ekvadoro***. Kiel en aliaj landoj, ankaŭ en ***Bolivio***, kiu eĉ havas indiĝenan prezidenton, la opinio de la indiĝenoj estas apenaŭ konsultata en la kazo de gravaj planataj konstru-projektoj; tamen ĉi-koncerna leĝo estas nun preparata, kvankam la puna juro daŭre ne estas reformata.[43] En ***Peruo*** nekonataj krimuloj mortigis tri oficialajn reprezentantojn de la Asaninka-indiĝenoj, kiuj protestis kontraŭ malpermesata senarbarigo. En januaro 2014 la prokuroraro de la ĉefurbo Lima ĉesigis la proceson ligatan kun 2000 perfortaj steriligoj de indiĝe-naj virinoj kaj kamparaninoj okazintaj en la 1990aj jaroj. En tiu jardeko okazis 200´000 steriligoj (aŭ sterilizoj) sen konsento de la koncernataj virinoj.

En ***Kolombio*** daŭre furoris diversaj gerilaj grupoj, kiuj plenumis gravajn krimojn kontraŭ la homaj rajtoj kaj la humaneca internacia juro. Precipe la kamparana loĝantaro suferis pro tiu perforto. Malgraŭ la promeso rezigni pri kidnapoj, en la unuaj tri monatoj de la jaro 2014 okazis 75 kidnapoj (en la sama tempo de 2013 estis nombritaj 85 kidnapoj). Pri la plimulto de kidnapoj oni kulpigis krimajn bandojn, nur en 21% de la kazoj geriloj estis konsider-ataj kiel respondeculoj. Krom tio, inter januaro kaj septembro 2014 estis mortigitaj 40 homrajtaj defendistoj, en 2013 la nombro estis 70. Inter la viktimoj troviĝis anoj de indiĝenoj kaj afro-kolumbianoj.

Lige kun protestoj kontraŭ prezidento Maduro en ***Venezuelo*** 43 personoj estis mortigitaj, 870 vunditaj kaj 3000 arestitaj. La polico pafis sur senarmajn homojn per municio el mallonga distanco. La ´sanga´ heredaĵo de la regado de Hugo Chávez estas bone rimarkebla en Karakaso.[44]

En ***Uruĝvajo*** evidente okazis streboj por malhelpi la prilaboradon de la historia pasinteco dum la armea diktaturo (1973-85) kaj por malfaciligi la aborton. Ekzistas malfacilaj kondiĉoj en malliberejoj, kaj la esplorado de murdoj de tri transseksaj virinoj en 2011/12 estis prokrastata.

Norda Ameriko

En majo 2014 la ***kanada*** polico konstatis, ke inter 1980 kaj 2012 estis mortigitaj 1017 indiĝenaj virinoj kaj knabinoj, kio estas pli ol la kvaroblo kompare kun la nombro de viktimoj inter neindiĝenaj kanadanoj. La aŭtoroj de la UN-raporto pri la rajtoj de indiĝenaj popoloj, kiu estis publikigita en majo 2014, konstatis, ke la soci-ekonomia situacio de la indiĝenoj mizeriĝis kaj ke en kanadaj malliberejoj troviĝas proporcie tro da indiĝenoj. En pluraj kazoj la kanada registaro donis la preferon al la rikoltado de krudmaterialoj kaj energio ol respekti la indiĝe-najn rajtojn. Kiel sola lando Kanado rifuzis parton de la fina dokumento de la UN-mondkonferenco pri indiĝenaj rajtoj.

La ĉefaj riproĉoj, kiujn AI faras al ***Usono***, estas: Arbitreco kaj senpuneco kadre de la kontraŭ-terorisma programo, dubinda malliberigo de homoj (entute 127) en la prizono de Guantánamo, malfavoraj vivkondiĉoj en usonaj prizonoj (multaj malliberuloj devas pasigi tro longan tempon en izolataj ĉeloj), daŭra ekzisto de la mortpuno (en 2013 estis ekzekutitaj 38 viroj kaj 1 virino kaj en 2014 33 viroj kaj 2 virinoj, t.e, 1394 personoj depost 1976, la jaro de la nuligo de la moratorio). En usonaj malliberejoj entute troviĝas 2 milionoj da homoj! Grandaj problemoj estas ankaŭ la troa nombro de mortpun-kandidatoj (ĉ. 3055), la eraraj mortkondamnaj verdiktoj kaj la tro drastaj malliberejaj punoj por homoj, kiuj ankoraŭ ne atingis la 18an jaraĝon (malrespektado de infanaj rajtoj), la ekscesa polica perforto kontraŭ malarmataj homgrupoj kaj la troreaga mortpafado de homoj fare de la polico (inter la viktimoj troviĝis multaj nigruloj), Ĉe la limo kun Meksiko 50´000 infanoj estis arestitaj de la usona polico, kiu retenis ilin dum tagoj aŭ semajnoj en konstruaĵoj, en kiuj mankas sufiĉaj sanitaraj instalaĵoj kaj la ebleco konsulti juristojn, tradukistojn kaj medicinajn servojn.[45] Tre malbona kaj skandaleca estas la sorto de psikaj malsanuloj, da

[43] Vd. http://www.nzz.ch/feuilleton/wie-viel-zukunft-birgt-die-vergangenheit-1.18570389.
[44] Vd. http://www.nzz.ch/international/amerika/das-blutige-erbe-von-hugo-chavez-1.18576223.
[45] Laŭ la Indekso pri demokratio de la gazeto Economist Usono situis en 2014 sur la 19a de 167 rangoj. Laŭ la Indekso pri percepto de korupto de Transparency International Usono okupas la 17an de 174 rangoj. Laŭ la Indekso pri libereco de la gazetaro de Freedom House Usono okupas la 31an an de entute 199 rangoj, dum Reporteroj sen limoj donis al Usono nur la kompare malbonan 46an de 180 rangoj. Sur la Monda Pacindekso (Global Peace Index) Usono okupas la mirigan malbonan 101an de 162 rangoj, kiu estas nur 1-2 pozicioj antaŭ Kazaĥstano kaj Uzbekistano. La ĉi-rilata pozicio de Usono ne konsiderinde ŝanĝiĝis en la pasintaj jaroj, kvankam Obama, prezidento de Usono, portas la nobelpremion pri paco.

kiuj en Usono ekzistas milionoj. Post la fermo de psikiatriaj klinikoj miloj da viktimoj perdis hejmon, ŝirmon kaj protekton kaj sovaĝe cirkuladas sur la stratoj, kie ili estas minacataj de diversaj danĝeroj.[46]

Aŭstralio, Novzelando, Papuo-Novgvineo

Nek la malnova nek la nova registaro de ***Aŭstralio*** sukcesis kontraŭbatali la diskriminacion de indiĝenoj, precipe maorioj (2,3% de la tuta loĝantaro). En la kazo de indiĝenaj junuloj la kvoto de arestoj estis 25-oble pli alta ol ĉe la ne-indiĝena loĝantaro. Inter septembro kaj decembro 2014 en la indiĝena komunumo Oombulgurri en okcidenta Aŭstralio estis detruata plimulto de loĝdomoj. Krom tio, la aŭstralia registaro rigore kontraŭbatalis azilpetantojn, kiuj venis el Papuo-Novgvineo, aplikante diversajn dubindajn metodojn.

Ankaŭ en la malliberejoj de ***Novzelando*** troviĝas proporcie tro multaj indiĝenoj, nome 50% de viroj kaj 65% de virinoj en novzelandaj malliberejoj estas maorioj. Novezlando rifuzis plurajn rekomendojn de la homrajta komisiono de UN por kontroli kaj pli forte protekti la situacion de la homaj rajtoj en la lando, ĉar en la novzelanda leĝaro mankas paragrafoj pri ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj. 27% de infanoj en Novzelando vivas en malriĉeco, precipe indiĝenaj. Kazoj de perforto kontraŭ virinoj kaj infanoj vaste ekzistis, precipe inter indiĝenoj. La ŝtata novzelanda sekreta servo GCSB prispionis civitanojn laŭ malpermesata maniero. En 2014 la registaro akceptis leĝon pri „batalo kontraŭ terorismo“, kiu tro malforte respektas la privatecon kaj liberecon de koncernataj personoj.

En ***Papuo-Novgvineo*** la perforto kontraŭ virinoj kaj infanoj estis ligata kun laŭdira sorĉado, en kio en iuj kazoj homoj mortis. Ĉar UN konsideras la aferon serioza problemo, la organiza ĵo enga ĝis specialan esploriston-raportiston.

Homaj rajtoj en Eŭropo

Okcidenta kaj meza Eŭropo

Por ne fingromontri nur al apartaj ´kanajlaj´ ŝtatoj ekster Eŭropo, kie la homaj rajtoj estas evidente aparte krude kaj grandstile lezataj, ni turnu la atenton al la landoj de Eŭropo aŭ ***Eŭropa Unio***, ĉar ankaŭ en ĝia landaro oni povas trovi mankojn kaj deficitojn sur la kampo de la homaj rajtoj, kiel montru la sekva ĉapitro.

Kelkaj antaŭrimarkoj: Eŭropo sentas fortan premon de diversaj flankoj: El la orienta flanko Eŭropon minacas triobla danĝero - rusa, ĉina kaj araba-islama: Ruslando signifas por Eŭropo konsiderindan politikan-ideologian problemon pro la reaktivigo de agresema ekspansia-imperiisma kaj reviziisma potenc-politiko, kiu evidente celas pridubi kaj nuligi la principojn de la internacia pacordo, subfosi kaj diskrediti la valorojn de la liberalisma-demokratia sistemo de Eŭropo, kiu estis pene sed sukcese konstruata depost 1945. Per tio por la mondo Ruslando restis malagrabla problemŝtato same kiel en la tempoj de la carismo kaj komunismo. Ĉinio, kiu montris ĝis nun nenian komprenon aŭ intereson por demokratia-liberalisma ordo laŭ okcidenta tipo, jam delonge premas la ekonomian konkurenc-kapablon de Eŭropo, kiun ĝi celas subfosi kaj malfortigi per malmultekoste produktataj kaj ofte dubindaj amasvaroj (ekonomia imperiismo). Ankaŭ la barbara islama terorismo, kiu furoras en Proksima Oriento kaj aliaj mondopartoj, signifas gigantan defion por la (okcidenta) civilizo entute, kiel oni ankoraŭ ne povis imagi ĝin antaŭ kelkaj jaroj. Sub la aventureca kaj ĉantaĝema politiko de la kruda perforto de tiuj tri potencoj, kiuj evidente fajfas pri la respektado de la homaj rajtoj kaj celas la totalan diskreditadon de la universalaj humanismaj ideoj, valoroj kaj atingoj de la okcidenta mondo (kiu mem ne estas anĝelo), la eŭropa modelo de la paco, demokratio kaj liberalismo riskas perdi sian signifon, povus disfali, esti detruata kaj malaperi, se oni ne adoptas adekvatajn memdefendajn rimedojn por eviti tiun evoluon, kio inkluzivas la produktadon de ampleksa arsenalo de efikaj armiloj, kiuj havu samtempe la celon eviti novajn militojn inter la rivalaj grandpotencoj. De la suda flanko miloj da rifuĝintoj el Afriko kaj Proksima Oriento, kie furoras militoj, mizeroj kaj diversaj civilizaj katastrofoj, klopodas atingi la eŭropan kontinenton, kie ili serĉas ŝirmon, akcepton kaj laboron ofte kun la rigoraj kontraŭstarado kaj rifuzado de la eŭropaj landoj, kies humanisma tradicio travivas gravajn ekzamenon kaj defion. Trie, la rilatoj inter Eŭropo kaj Usono de jaroj estas streĉataj pro gravaj politikaj kaj ekonomiaj kvereloj, konkurencaj luktoj kaj spionadaj agadoj, kiuj kaŭzis profundan reciprokan malfidon, kio ne estas sendanĝera por Eŭropo. La renovigo de ĉiurilata alianco inter Nordameriko kaj Eŭropo, do de la klasika historia Okcidento, estas nepre necesa. El ĉiuj flankoj Eŭropo do estas alfrontata per gravaj premoj kaj defioj sur plej diversaj kampoj, ebenoj kaj niveloj, kiuj estas malfacile solveblaj. La ekstrema politika kaj kultura heterogeneco kaj la granda ekonomia diverseco de la

[46] Vd. http://www.nzz.ch/international/amerika/psychisch-kranke-in-den-usa-auf-der-strasse-oder-im-knast-1.18585256?reduced=true.

landaro de Eŭropo, la kaprica sinteno de kelkaj EU-membroŝtatoj (kiel Britio, Grekio, Hungario kaj Ĉeĥio) signifas novajn riskojn, kiuj minacas, komplikas kaj malstabiligas la koheron kaj integriĝon de tiu kontinento. La demokratia sistemo laŭ okcidenta modelo ŝajnas troviĝi en profunda ekzisto-krizo, sed ĝia anstataŭigo per diktaturo, terorismo kaj milito, kiel tion praktikas Ĉinio, Ruslando, la „Islama Ŝtato“ kaj diversaj landoj de Afriko certe ne povas esti racia alternativo.

Trafoliumante la dikan novan volumon, kiu enhavas la raporton de Amnestio Internacia pri la tutmonda situacio de la homaj rajtoj en la jaroj 2014/15, oni trovas ne nur ĉapitrojn pri la lezado de la homaj rajtoj en la plej teruraj ´kanajlaj´ ŝtatoj de la mondo sed ankaŭ en la modernaj demokratiaj industri-landoj de la Okcidento, kiuj ĝenerale estas konsiderataj kiel modeloj por la respektado de la homaj rajtoj. Kvankam landoj kiel Germanio, Danio, Svedio, Norvegio, Finnlando, Svislando, Francio, Britio ktp. konsideras sin mem plej progresemaj kaj modernaj rilate la aplikadon de la principoj de la homaj rajtoj, ankaŭ en tiuj landoj ekzistas ĉi-rilataj mankoj kaj deficitoj. Pro tio, la raporto de AI vekas atenton ankaŭ en tiuj landoj, kiujn AI kritikas pro dubindaj homrajtaj praktikoj kiel ekscesa polica perforto kontraŭ manifestantoj, rigora kontraŭbatalado kaj traktado de rifuĝintoj, migrantoj kaj azilpetantoj fare de aŭtoritatoj, diskriminacio kaj kruda traktado de diversaj minoritatoj, precipe romaoj (ciganoj), kiuj estas minacataj de la aplikado de instrumentoj, kiuj ne konformas al la modernaj normoj de la internacia juro. Krome, seksa perforto kontraŭ virinoj kaj la hezitema agnosko de la rajtoj de seksaj minoritatoj estas daŭraj temoj en la eŭropaj landoj. La inkluzivado de rajtoj por samseksemaj individuoj kaj vivpartneroj en la katalogo de homaj rajtoj signifas novan dimension. Certe, en la tuta mondo, ne nur en islamaj landoj, multaj homoj ne povas akcepti nek aprobi en principo geedziĝon inter samseksemuloj, pri la kontraŭstarado flanke de diversaj tradiciaj eklezioj, kies mentaleco estas konservema kaj reakcia (kiel en Irlando aŭ Pollando), ni tute ne parolu. Do, provi komprenigi al tiuj homoj, ke ili ne pravas, estus tute malĝuste, malprave kaj sensence.

Ni do rigardu al kelkaj EU-landoj pli proksime.

Ekzemple la raporto pri Germanio kaj aliaj okcidenteŭropaj landoj parte postlasas la impreson, kvazaŭ en tiuj ĉi landoj estas plenumataj gravaj homrajtaj lezoj kaj krimoj. Kvankam en tiuj landoj problemoj kun la homaj rajtoj sendube ekzistas, certe, la homrajtaj problemoj en la (okcident)eŭropaj landoj estas preskaŭ bagatelaj kompare kun la grandstila lezado de la homaj rajtoj en la ´kanajlaj´ ŝtatoj. Malfacilas ĝuste kompreni, kompari kaj interpreti la kriteriojn. Certe, turmentado en Germanio, Francio aŭ Italio ne estas komparebla kun turmentado en Saŭdarabio, Irano aŭ Ĉinio. Tamen, en la eŭropaj landoj ekzistas kelkaj problemoj, kiujn necesas serioze konsideri, diskuti kaj solvi. Kvankam estas danĝere ĝeneraligi la problemojn, gravas kaj necesas montri mankojn, kritiki negativajn tendencojn kaj mencii ankaŭ unuopajn kazojn, kion la raporto de AI brile faras kaj kio estas ĝia ĉefa merito. La spektro de (facile) lezataj (kaj lezeblaj) homaj rajtoj estas granda kaj vasta. Kompreneble, la sekva superrigardo limigas sin al la respegulado de plej esencaj temoj kaj prezentado de plej interesaj kazoj kaj landoj en la raporto de AI. Kiel oni vidos, la problemoj parte similas, sed kelkaj landoj havas ankaŭ siajn tre specifajn kazojn kaj temojn. En tio ekzistas ankaŭ kelkaj kuriozaĵoj, kvankam ofte ili ne estas sen tragiko.

Tiel, ***Germanio*** trovis kritikon de AI precipe pro tio, ke ĝiaj instancoj faris tro malmulte por eviti polican perforton; ĉi-rilate estis ricevitaj pluraj plendoj, kiuj ŝajne estis neglektataj de la aŭtoritatoj, inter alie pro manko de financaj rimedoj. En iuj kazoj la polico troigis la praktikojn de la sufokado de protestoj, aplikante ekscesan forton de akvoĵetiloj. Nature, inter pacaj batalantoj kutime aperis ankaŭ perfortaj protestantoj, kiujn oni ne povas kaj ne volas toleri. Krom tio, en pluraj federaciaj landoj la policistoj ne estas markitaj numere por povi identigi ilian personon. Aperis ankaŭ plendoj de loĝantoj de hejmoj por rifuĝintoj kaj azilpetantoj, kiuj asertis, ke ili estis mis-traktataj de gardistoj. Laŭ la nova raporto pri konstitucia protekto, en Germanio la ksenofobiaj kaj rasismaj atakoj kontraŭ hejmoj por rifuĝintoj kaj azilpetantoj fare de radikalaj dekstremuloj konsiderinde kreskis. La germanaj aŭtoritatoj estis kritikataj ankaŭ pro tio, ke ili ŝajne klopodis tro malmulte por eviti krimojn kontraŭ iuj minoritatoj, kiuj servas kiel atakeblaj celobjektoj flanke de radikalaj rasismaj grupoj. Por plibonigi la situacion sur tiu ĉi kampo estis farataj pluraj rekomendoj por aktualigi la validan leĝaron de la punkodo. En Germanio daŭre ekzistas malnovaj leĝoj, kiuj diskriminacias seksajn minoritatojn. AI ankaŭ tre malvolonte vidas la komercadon kaj eksportadon de armiloj en ´riskajn´ landojn (kiel Saŭdarabio aŭ Emiratoj). Intertempe, Germanio ratifis la UN-konvencion pri komercado de armiloj, kiu ekvalidis en decembro 2014, kaj la federacia ministro pri ekonomio promesis pli rigoran kontroladon de la eksportado de certaj armeaj varoj. Kritikon trovis ankaŭ la decido, ke Germanio proklamis ŝtatojn kiel Serbion, Makedonion kaj Bosnio-Herzegovinon „sekuraj“, ĉar tiu decido ebligas redukti la ŝancon, por ke rifuĝintoj el tiuj landoj povu ricevi protekton kaj azilon.[47] La germanaj partioj CDU kaj CSU klopodas atingi, ke ankaŭ Kosovo, Montenegro kaj Albanio estu proklamitaj kiel sekuraj landoj. 20% de loĝantoj en Germanio havas t.n. „migracian fonon“,[48] do devenas de migrantoj, kaj ĉi tiu popolgrupo daŭre kreskas.[49] En la interreto kreskis retorikaj atakoj de malamo kun rasisma karaktero kontraŭ rifuĝintoj. Rasismo ekzistas eĉ inter eksterlandanoj mem

[47] Vd. http://www.zeit.de/politik/deutschland/2015-06/verfassungsschutzbericht-islamisten-terrorgefahr-rechtextremismus. Fakte Kosovo kaj Montenegro celas esti agnoskataj de Germanio kiel „sekuraj“ landoj (vd. http://www.zeit.de/politik/ausland/2015-08/fluechtlinge-balkan-kosovo-montenegro-sichere-herkunftslaender).

[48] Germanlingve: Migrationshintergrund.

[49] Vd. http://www.tagesschau.de/inland/zuwanderung-119.html.

(turkoj kontraŭ kurdoj, serboj kontraŭ kroatoj, araboj kontraŭ judoj ktp.).[50] Fine de julio 2015 la germana federacia prokuroraro anoncis, ke ĝi intencas esplori la farojn de du ĵurnalistoj (Meister kaj Beckedahl) de la blogo „netzpolitik.org“, kiuj estas suspektataj pro „ŝtatperfido“, ĉar ili diskonigis en siaj raportoj sekretojn de la interna sekureca servo pri la konstitucia protekto.[51] Kritikistoj de tiu decido supozas, ke oni celas timigi ĵurnalistojn kaj ataki la liberecon de la gazetaro. Dum reprezentantoj de CSU, partio kun ksenofobiaj tendencoj, bonvenigis en principo la elpaŝon de la federacia prokuroraro, precipe maldekstraj politikistoj akre kritikis ĝin, parolis pri skandalo kaj postulis la demision de la prokuroro. Vide al simila praktikado en ´kanajlaj´ ŝtatoj, ĉi tiu kazo, kiu fariĝis publika nun ankaŭ en Germanio, vekis apartan atenton de la politiko kaj kaŭzis amasajn protestmanifestaciojn.[52]

Aŭstrio ratifis la „Konvencion pri prevento kaj kontraŭbatalo de perforto kontraŭ virinoj kaj kontraŭ hejma perforto“ kaj la „Konvencion pri komercado per armiloj“. En la justica sistemo okazis kelkaj gravaj neglektoj, kaj azilpetaj proceduroj daŭris tro longe. La aŭstra polico ricevis la riproĉon, ke en iuj kazoj estis aplikata troa perforto kontraŭ manifestantoj. En aprilo 2014 Aŭstrio lanĉis novan humanecan programon por akcepti 1000 siriajn rifuĝintojn. Post atako de malamo kontraŭ siriaj rifuĝintoj en Fejsbuko, la koncerna aŭtoro estis maldungita de sia labordonanto.[53] Laŭ iu universitata studo el la jaro 2001, la duono de aŭstroj estis konsiderataj kiel ksenobobiaj.[54] Aliaj fakuloj neas la ekziston de aparta ksenofobio ĉe aŭstroj.[55] La ĉefa maldekstrema populisma partio de Aŭstrio estas FPÖ, kiu postulas limigi la enmigradon, la rigoran efektivigon de Dublin II kaj la forigon de krimaj eksterlandanoj. Lastatempe tiu partio fortigis sian proteston kontraŭ la influo de la islamo kaj kontraŭ samseksema geedziĝo.

Esencan kritikon AI direktis kontraŭ ***Francio*** lige kun la diskriminacio de enmigrintaj romaoj (ciganoj), kiuj estis perforte forpelataj de siaj loĝejoj sen proponi al ili akternativon. Koncernataj estis ĉirkaŭ 11´000 personoj. La leĝaro pri seksaj minoritatoj estis adaptita tiel, ke samseksemaj paroj rajtas geedziĝi kaj adopti infanojn. Post diversaj islamismaj atakoj kontraŭ francaj institucioj kaj civitanoj la etoso fariĝis konsiderinde pli nervoza, kun eventuala danĝero de troaj reagoj kontraŭ suspektindaj personoj, precipe araboj aŭ arabdevenaj francoj. Precipe post diversaj terorismaj incidentoj kun islamismaj kaj antisemitismaj motivoj (Tuluzo, Parizo), la timo inter la francoj kreskis.[56] La dekstremisma partio „Nacia Fronto“ de Le Pen fariĝis la tria plej granda partio de Francio post la du ĉefaj tradiciaj partioj. La ksenofobia potencialo en Francio do estas granda kaj kreskanta, kaj la maldekstra registaro pli malpli senhelpa.

Pro troa okupiteco, la vivkondiĉoj en malliberejoj de ***Belgio*** estis nesufiĉe bonaj. La UN-komisiono pri forigo de rasa diskriminacio devis okupiĝi pri riproĉoj, kiun la belga polico ricevis, ke ĝi aplikis troan perforton kontraŭ migrantoj surbaze de rasismaj motivoj. La Eŭropa Komisiono pri rasismo kaj maltoleremo kritikis Belgion, ke en tiu ĉi lando islamanoj, precipe virinoj portantaj kaptukon, estis diskriminaciataj dum sia serĉado de laborloko kaj provo aliri varojn kaj servojn. En 2013 en Flandrio la malpermeso porti religiajn simbolojn kaj vestaĵojn en la lernejoj estis konfirmita. Poste la Belga Ŝtata Konsilio tamen decidis, ke tiu ĉi malpermeso kontraŭdiras la rajton je libera religia praktikado. La kaŭzo de la skandalo estis la kazo de lernanto el la religia komunumo de la sikistoj, al kiu oni malpermesis porti la turbanon en iu lernejo. Unu el la ĉefaj radikaldekstraj politikaj partioj en Belgio, kiu gvidas flandran naciismon-separatismon kaj pledas por limigo de la nombro de enmigrantoj, estas la „Flandra Intereso“ (eksa „Flandra Bloko“). En majo 2014 ekvalidis nova leĝo, kiu malpermesas diskriminacion de homoj surbaze de ilia seksa identeco. Tutlanda enketo de AI de februaro 2014 rezultigis la scion, ke unu kvarono de la virinoj en Belgio suferis seksan perforton flanke de sia partnero, kaj 13% respondis, ke ili estis eĉ sekse perfortataj de viro, kiu ne estis ilia geedza partnero. En la pasintaj jaroj en Belgio fariĝis konataj ankaŭ kelkaj krudaj kazoj de lezataj infanaj rajtoj.

En ***Nederlando*** migrantoj sen oficiala restadpermeso troviĝis en malliberejo tro longan tempon kaj devis elteni severajn kondiĉojn. Diversaj NROj kaj interŝtataj organoj esprimis kritikon pri la starigo de personaj profiloj laŭ etnaj kriterioj fare de la punjusticaj instancoj. Kiel reago al tiu kritiko la nederlandaj registaro kaj polico komunikis, ke oni malakceptas la starigon de datumbanko laŭ tiaj kriterioj. La ĉefa radikala protagonisto kontraŭ la „islamigo de Eŭropo“ estas Geert Wilders. En siaj publikaj elpaŝoj li ofte transiras la limon de la tolerebla, tiel ke li regule havas problemon kun la justico pro misfamigo k.s.[57]

---

[50] Vd. http://www.focus.de/politik/deutschland/kein-rein-deutsches-problem-warum-es-rassismus-auch-unter-auslaendern-gibt_id_3813111.html.

[51] Vd. http://www.nzz.ch/international/verfahren-gegen-deutsche-journalisten-1.18588585, https://netzpolitik.org/2015/verdacht-des-landesverrats-generalbundesanwalt-ermittelt-doch-auch-gegen-uns-nicht-nur-unsere-quellen kaj http://www.nzz.ch/international/deutschland-und-oesterreich/range-wirft-ministerium-politische-einflussnahme-vor-1.18590078.

[52] La 10an de aŭgusto la esploroj kontraŭ la bloguloj de netzpolitiko.org estis oficialaj finitaj.

[53] Vd. http://www.spiegel.de/panorama/gesellschaft/oesterreich-porsche-entlaesst-lehrling-wegen-hass-kommentar-a-1045306.html.

[54] Vd. http://www.hagalil.com/austria/gemeinde/artikel/2001/fremdenfeindlich.htm.

[55] Ekzemple rilate la sintenon al turkoj vd. http://diepresse.com/home/politik/innenpolitik/609971/Das-ist-eine-osterreichische-Art-der-Fremdenfeindlichkeit.

[56] Vd. http://www.spiegel.de/panorama/gesellschaft/attentat-von-toulouse-fremdenfeindlichkeit-in-frankreich-a-822394.html

[57] Plej novan kazon vd. https://www.tt.com/home/10316985-91/staatsanwaltschaft-wien-ermittelt-gegen-geert-wilders.csp.

Ĉefministro Cameron anoncis en ***Britio***, ke li intencas organizi referendumon kun la celo forlasi Eŭropan Union kaj la Eŭropan Homrajtan Konvencion, kaze ke li estos reelektita (en majo 2015 lia Konservativa Partio estis reelektita per absoluta plimulto). En septembro 2014 la civitanoj de Skotlando voĉdonis kontraŭ eksiĝo el Britio, kio estus signifinta ankaŭ la eksiĝon de Skotlando el Eŭropa Unio kaj la disfalon de Grandbritio, kiun la britoj tamen volis eviti. La Internacia Punkortumo enkondukis esplorojn kontraŭ iuj britaj soldatoj, kiuj estas suspektataj pro tio, ke ili plenumis militajn krimojn kaj mistraktis malliberulojn en Irako. La prilaborado de la historia pasinteco en Nordirlando progresis nekontenige. Aborti en Nordirlando eblis nur laŭ certaj esceptoj. La parlamentoj de Nordirlando kaj Skotlando okupiĝis pri nova leĝo, kiu celas kontraŭbatali la komercadon per homoj. La konservema brita registaro intencas severigi la strikan juron, kio ĝojigas la reprezentantojn de la ekonomio sed maltrankviligas la sindikatistojn. La 15an de julio 2015 la brita ministrino pri internaj aferoj malpermesis la uzadon de akvoĵetiloj kontraŭ protestantoj sur la teritorio de Anglio kaj Kimrio, post kiam la londona urbestro aĉetis tri malnovajn akvoĵetilojn en Germanio.[58] Post la amasa atako de rifuĝintoj kontraŭ la fervoja tunelo inter Britio kaj Francio ĉe la Kanalo en somero 2015, la brita registaro severigis la leĝojn pri migrantoj.[59]

La nova irlanda leĝo pri aborto ne konformis al la internaciaj normoj, kaj azilpetoj restis tro longe ne decidataj. La registaro instalis sendependan komisionon por esplori la misuzojn kaj mistraktojn de virinoj kaj infanoj, kiuj okazis en la 1920-90aj jaroj en hejmoj, kiuj estis gvidataj de katolikaj ordenoj kun ŝtata subvencio. Oni konstatis, ke la ĝisnuna esplorado de misuzoj en la katolika eklezio ne sufiĉis por plenumi la normojn por sekurigi la rajtojn de ĉi-koncernaj viktimoj. En majo 2015 la voĉdonintoj de ***Irlando*** akceptis kun neatendita klareco per 62,1% leĝon, kiu permesas la geedziĝon inter samseksemaj partneroj. Precipe la katolika eklezio de Irlando pledis kontraŭ tia permeso.

Svislando, kiu ne estas membro de EU sed tamen forte ligata kun ĝi pere de duflankaj kontraktoj, traktatoj kaj interkonsentoj,[60] estas akra dorno en la okuloj de AI precipe pro tio, ke la svisaj aŭtoritatoj kaj polico ofte aplikas tro drastajn metodojn de perforto kontraŭ rifuĝintoj, azilpetantoj kaj migrantoj. Se iliaj azilpetoj estis malakceptitaj, kutime sekvas rapida kaj rigora eksigo de tiaj homoj, ekzemple niĝerianoj, tamuloj aŭ eritreanoj, ĉe landlimoj kaj en flughavenoj, de kie ili estas senkompate resendataj en siajn hejmlandojn (repatrujigataj), kie ilin eventuale atendos gravaj problemoj kiel arestado, malliberigo, persekutado aŭ mortigo. En marto 2015 iu rifuzita azilpetinto estis resendita per ŝipo! Temas pri marokano, kiu dufoje rifuzis reveturi per aviadilo.[61] Rifuzataj azilpetintoj regule defendas sin kontraŭ tiaj decidoj per sensaciaj protestoj kaj okupado de konstruaĵoj, ekzemple preĝejoj.[62] Alia problemo estas la malbonaj kondiĉoj de la arestado en tro okupataj malliberejoj, kie mankas gardistoj. AI negative rilatas ankaŭ al certaj politikaj „popoliniciativoj“ de la svisa rekta demokratio, kiuj konfliktas aŭ konkurencas kun la internacia juro aŭ tikle tuŝas la homajn rajtojn (ekzemple: aŭtomata eksigo de krimaj eksterlandanoj el la lando, malpermeso por islamaj virinoj porti kaptukon en iuj publikaj lernejoj,[63] malpermeso konstruadi novajn minaretojn per la konstitucio,[64] k.s.). Pro tio en eksterlando aperis la impreso, ke parto de la svisa popolo (precipe tiuj, kiuj voĉdonas por la partio SVP) havas ksenofobian kaj rasisman sintenon. Fakte en Svislando ekzistas iusence tradicio por ksenofobio.[65] En Svislando estas registritaj 23,8% da eksterlandanoj (2013), kaj ĉiujare enmigras en la landon 70-80´000 novaj eksterlandanoj, kio estas enorma kvanto. Kontraŭ tiu evoluo pledas precipe la dekstrema-populisma-patriotisma partio SVP, kiu opinias, ke la lando, precipe ĝiaj sociaj instalaĵoj, ne kapablas daŭre elteni tian amason da novaj eksterlandanoj, kio estas ligata kun enorma financa ŝarĝo. Tial, SVP premas la svisan registaron retrakti la interkonsentojn kun Eŭropa Unio rilate la liberan cirkuladon de personoj el EU, kiun tiu partio volas limigi precipe en la kazo de orienteŭropaj landoj. Sed EU ĝis nun rifuzis retrakti kun Svislando la principon de la libera cirkulado de personoj, tiel ke novaj konfliktoj estas antaŭvideblaj. En aŭgusto 2015 eksplodis politika-burokratia kampanjo

---

[58] http://www.zentralplus.ch/de/news/politik/3940125/UK-Keine-Wasserwerfer-f%C3%BCr-die-Polizei.htm.

[59] Vd. http://www.heute.de/london-cameron-verschaerft-asyl-politik-gegen-fluechtlinge-und-helfer-39554740.html.

[60] Tiel ke iuj asertas, ke Svislando estas de facto sed ne de iure membro de EU.

[61] Vd. http://www.1815.ch/news/schweiz/politik/schweiz-schafft-erstmals-abgewiesenen-asylsuchenden-per-schiff-aus-20150329125756.

[62] Vd. ekzemple http://www.tagesanzeiger.ch/panorama/vermischtes/Abgewiesene-Asylsuchende-besetzen-Lausanner-Kirche/story/28652070.

[63] Pri la malpermeso porti kaptukon vd. http://www.tagesanzeiger.ch/dossiers/schweiz/dossier2.html?dossier_id=2084, http://www.nzz.ch/schweiz/kopftuchverbot-an-thurgauer-schule-ist-unzulaessig-1.18114904, http://www.humanrights.ch/de/menschenrechte-schweiz/inneres/gruppen/religioese/kopftuchverbot-oeffentlichen-schulen, http://www.nzz.ch/schweiz/kopftuchverbot-an-schule-das-bundesgericht-muss-entscheiden-1.18462629, http://www.kath.ch/newsd/muslimische-lehrerinnen-mit-kopftuch-auch-an-schweizer-schulen kaj https://de.wikipedia.org/wiki/Kopftuchstreit.

[64] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Schweizer_Minarettstreit. Laŭ la supozo de esploristoj, la islamfobio en Svislando malpliiĝis en Svislando ĝuste post la akcepto de la minareta malpermeso en novembro 2009. (Vd. sekvan piednoton).

[65] Laŭ iu oficiala studo kvarono de ls svisoj estas ksenofobiaj (vd. http://www.blick.ch/news/politik/studie-beweist-jeder-vierte-schweizer-ist-fremdenfeindlich-id3477205.html). Pri rasismo en Svislando vd. http://www.gfsbern.ch/de-ch/Detail/zusammenleben-in-der-schweiz-2010-2014, http://www.edi.admin.ch/frb/02015/?lang=de kaj http://www.ekr.admin.ch/home/d112.html.

ĉe kelkaj kantonoj, kiuj postulas rifuzi la azilon al eritreaj rifuĝintoj.[66] En aŭgusto 2015 la organizaĵo „Pink Cross“ deponis juran plendon kontraŭ V. Huonder, episkopo de Chur, pro „homfobiaj eldiroj“ kaj „publika alvoko al krimoj aŭ perforto“ kontraŭ samseksemuloj, post kiam la episkopo en publika prelego citis el la Malnova Testamento, kiu enhavas frazon, laŭ kiu estas peko, se viroj dormas kun aliaj viroj, kiu estas punenda per la morto.[67]

Skandinavio

En ***Danlando*** okazis diskuto pri la enkonduko de identigaj markoj por policistaj uniformoj. La parlamento ŝanĝis la koncernan leĝon tiel, ke seksa misuzo en geedzaj rilatoj estas konsiderata kiel krimo. Sed la dana registaro tamen entreprenis nenion por plibonigi la rajtojn de seksperfortataj viktimoj. La azilpeta proceduro por seksaj minoritatoj estis plibonigataj, sed protektindaj personoj estis diskriminaciataj (arestataj). La UN-komisiono pri forigo de rasa diskriminacio kritikis publikajn rasismajn paroladojn, kiuj estis publike prononcataj kontraŭ certaj minoritatoj vivantaj en ***Svedio*** kaj alvokis la svedajn instancojn esplori tiajn kazojn. La sama komisiono kritikis ankaŭ la ekziston de rasismaj kaj ekstremismaj organizaĵoj, kiuj elpaŝis en tiu en si mem paca lando. Nova studo rezultigis la scion, ke seksa perforto estas relative ofta fenomeno en ***Norvegio***. Iuj seksaj minoritatoj spertis diskriminacion. 578 infanoj de azilserĉantoj, kies peto estis rifuzita, ricevis amnestion, se ili troviĝis jam de pli ol tri jaroj en la lando. La samajn problemojn konas en principo ankaŭ ***Finnlando***, kie homoj, rifuzantaj la armean deĵoron, daŭre riskas esti punataj, se ili rifuzas ankaŭ la civilservon. Malgraŭ tiuj mankoj kaj deficitoj, la skandinaviaj landoj okupas kun Svislando kaj aliaj okcidenteŭropaj landoj la plej altajn rangojn en ĉiuj signifaj indeksoj de la mondo.

Sudeŭropaj landoj

Italio devis akcepti kaj digesti gigantajn amasojn da rifuĝintoj, kiuj veturis trans la Mediteranea Maro kaj atingis la italan marbordon. Kvankam la itala parlamento adoptis en aprilo 2014 leĝon, kiu celas aboli la „kontraŭleĝan envojaĝon“ kiel krimon, ĉi tiu leĝo daŭre validis almenaŭ ĝis la fino de la jaro. Miloj da romaoj loĝis en mizeraj kondiĉoj kaj multaj familioj fariĝis viktimoj de perforta forpelado fare de la italaj aŭtoritatoj. Provoj klasifiki en la itala punkodo la turmenton krimo fiaskis; per tio Italio daŭre malrespektas sian devon respekti la UN-konvencion pri turmento. Italio ankaŭ neglektis sian devon instali sendependan homrajtan komisionon, kiel tion postulas la principoj de la Parizaj normoj.

En ***Hispanio*** centoj da homoj estis arestitaj, ĉar ili utiligis sian rajton manifestacii. Por altigi la protekton de la publika sekureco, la leĝfarantoj planis enkonduki 21 novajn fareblajn krimojn, inkluzive de monpunoj por la organizantoj de pacaj manifestacioj, tiel ke la opinia libereco estus plu limigata. Ankaŭ hispanaj policistoj aplikis ekscesan perforton por aresti partoprenantojn de tiaj manifestacioj. La *kataluna* parlamento almenaŭ malpermesis la aplikon de gumaj ĵetiloj, post kiam kelkaj manifestantoj estis grave vunditaj. Sed Hispanio rifuzis la rekomendojn de internaciaj homrajtaj asocioj, kiuj postulas aboli la areston sen kontakto kun la ekstera mondo por personoj, kiuj estas suspektataj kiel teroristoj. Post kiam la Eŭropa Homrajta Kortumo venis al la konkludo, ke iliaj rajtoj estis lezataj, ĝis januaro 63 ETA-membroj estis liberigitaj. Hispanaj sekurecaj servoj daŭre kontrolis homojn surbaze de etnaj kriterioj. Multaj krimoj estis plenumataj surbaze de seksaj kriterioj. La *kataluna* registaro anoncis la intencon, ke ĝi volas malpermesi la kompletan vualadon de (islamaj) virinoj (ĝis la fino de 2014 la ĉi-koncerna leĝo ankoraŭ ne estis decidita). En 2014 minimume 45 virinoj estis mortigitaj de siaj (eks)edzoj. La kvoto de la jura persekutado sur la kampo de seksa perforto post la enkonduko de nova leĝo en 2005 malkreskis Laŭ malpermesata maniero kaj ekscesa perforto multaj rifuĝintoj estis rifuzataj ĉe la landlimo (precipe en Ceuta kaj Melilla) kaj resendataj al Maroko, kaj centmiloj da migrantoj havis, laŭ iu fifama reĝa dekreto, nur limigatan aliron al la sansistemo. La Eŭropa Komisiono por socialaj rajtoj kritikis tiun dekreton, ĉar ĝi malrespektas la principojn de la Eŭropa Sociala Ĉarto. Fine de 2014, 1205 personoj ricevis internacian protekton, sed nur 255 ricevis la statuson de rifuĝinto. Kvankam en 2013 la hispana registaro promesis akcepti 130 siriajn rifuĝintojn, ĝis la fino de 2014 tamen nenio okazis. La difinoj pri malaperigo kaj turmentado de personoj en la hispana leĝkodo ne konformis al la internacia juro pri homaj rajtoj. La rajtoj de viktimoj de la Hispana Civila Milito (1936-39) kaj de la Franco-reĝimo (1939-75) ricevi veron, justecon kaj rekompencon estis daŭre rifuzataj al ĉi-koncernataj personoj, kaj multaj kazoj de la sorto de unuopaj viktimoj, kiuj estis murditaj aŭ malaperis, ne estis esploratаj de la justico ĝis nun. Koncerne aborton, la hispana registaro retiris ĉi-koncernan leĝproponon, kiu antaŭvidis malfaciligon de aborto.

En la kazo de ***Portugalio***, AI konstatis mistraktadon de prizonuloj kaj ekscesan perforton fare de la polico, mistraktadon kaj diskriminaciadon de romaoj (ciganoj) inkluzive ties infanoj, diskriminaciadon de seksaj minoritatoj sur la kampo de la adoptado de infanoj, juran plifaciligon de la arestado de azilpetantoj kaj perforton kontraŭ virinoj kaj knabinoj – en tiu ĉi kazo ĝis la fino de novembro 2014 en Portugalio estis mortigitaj 40 virinoj

[66] Vd. http://www.derbund.ch/schweiz/standard/innerschweizer-aufstand/story/15651555 kaj http://www.derbund.ch/schweiz/standard/der-brief-erhoeht-den-druck-auf-den-bundesrat/story/19975847.

[67] Vd. http://www.blick.ch/news/schweiz/dem-bischof-drohen-bis-zu-drei-jahre-knast-schwule-zeigen-vitus-huonder-an-id4054175.html.

de siaj (eks)edzoj aŭ aliaj parencoj, apud 46 intencitaj murdoj, kio signifis kreskon kompare kun la antaŭa jaro, en kiu 37 murdoj estis registritaj.

Orienta Eŭropo

Baltaj Ŝtatoj

Kiel konate, en la Baltaj Ŝtatoj Estonio kaj Latvio vivas multaj rusoj, de kiuj granda parto estas senŝtatanoj. Temas pri ĉ. 267´789 personoj en Latvio (jan. 2014) kaj ĉ. 91´000 personoj (6,8%) en Estonio. Ŝtatanoj de ***Estonio*** kaj ***Latvio*** povas fariĝi nur personoj, kiuj trapasis lingvan ekzamenon kaj plenumas aliajn jurajn kondiĉojn. Precipe Moskvo, kiu aroge konsideras sin protektanto de la rusoj en la postsovetiaj respublikoj, akre kritikis tiun situacion kiel neakcepteblan diskriminacion de la rusa popolo kaj regule elpuŝis krudajn minacojn kaj blasfemojn kontraŭ Estonio, Latvio kaj Litovio (kie la kompare malmultaj rusoj siatempe aŭtomate ricevis la litovan civitanecon). Kvankam senŝtatanoj ne havas politikajn rajtojn, multaj rusoj, precipe maljunaj ekssovetianoj, rifuzas aŭ rezignas lerni la ŝtatajn lingvojn kaj preferas la statuson de senŝtatanoj, ĉar per siaj provizoraj dokumentoj ka pasportoj ili povas senvize viziti kaj Ruslandon kaj la landojn de Eŭropa Unio. Fakte, grandparto de rusoj (sovetianoj), kiuj de jardekoj vivis en la Baltaj Ŝtatoj kaj estis konsiderataj de estonoj, latvoj kaj litovoj kiel „okupantoj“, neniam montris seriozan intereson lerni la lingvojn de tiuj landoj, kies valoron kaj utilon ili malalte taksis. Hodiaŭ, multaj infanoj de senŝtatanoj, kiuj naskiĝis en Estonio aŭ Latvio, ne aŭtomate ricevas la koncernan ŝtatanecon, kio estas problemo el la vidpunkto de la „Internacia Pakto pri civitanaj kaj politikaj rajtoj“ kaj la „Konvencio pri infanaj rajtoj“. Koncerne la azilpetojn, en 2014 en Estonio estis prezentitaj 120 petoj, inter kiuj 35 devenis de ukrainaj ŝtatanoj. Ĝis novembro nur 20 personoj ricevis azilon, kio estas tro malalta agnoska kvoto. Estonio estas suspektata pro tio, ke ĝi ne deziras akcepti multajn azilpetantojn, kiuj riskas esti rifuzitaj ĉe la landlimo aŭ en la flughaveno kaj resenditaj en siajn originajn landojn. Rilate la agnoskon de rajtoj de seksaj minoritatoj Estonio estas pli progresema ol Latvio, kiu evidente preferas resti pli konservema. Dum en Estonio estas preparata (aŭ jam estas akceptita) leĝo, kiu permesas al samseksemaj kaj negeedziĝintaj partneroj registri sian ligon, la analoga latva leĝo formulas, ke la koncepto de la geedzeco estas rezervata al ligo inter viro kaj virino. En Latvio ankaŭ mankas sufiĉa leĝa protekto kontraŭ hejma perforto. En ***Litovio*** ekzistas iu obskura „Oficejo de la inspektoro por ĵurnalisma etiko“, kiu aplikas konservativan sintenon kaj kritikas situaciojn, kie infanoj riskas esti neprotektataj kontraŭ influoj de netradiciaj valoroj (kiel samseksemo). En Litovio ekzistis 2 sekretaj CIA-prizonoj; en Antaviliai troviĝis iu saŭdarabia civitano, kiu estis ´deportita´ kaj probable turmentata (en la jaroj 2004-6). En 2014 la UN-komisiono pri turmentado postulis de la litova registaro esplori la ĉi-koncernajn kazojn.

Mezorienteŭropaj landoj

Lige kun la batalo kontraŭ terorismo, kiu estis enkondukata de la tiama prezidento Bush (filo), ***Pollando*** konfesis post neado dum multaj jaroj, ke sur ĝia teritorio ekzistis sekreta CIA-prizono (en Stare Kiejkuty). Ĉar du iamaj prizonanoj de saŭdarabia deveno plendis, ke ili estis turmentataj en tiu prizono, la Eŭropa Homrajta Kortumo kondamnis Pollandon en du apartaj verdiktoj pro la malrespektado de la Eŭropa Homrajta Konvencio. En alia juĝo de la sama Kortumo Pollando estis kondamnita pro malhomeca kaj humiliga traktado kaj malrespektado de la rajto je privata vivo en la kazo de iu 14-jaraĝa virino, al kiu oni malpermesis aborti. Estis fakte la unua fojo, ke EU-lando estis tiel severe kondamnita. Lige kun tiu kazo la polaj aŭtoritatoj ricevis la riproĉon, ke ili faris nenion por faciligi la abortadon en aparte malfacilaj kazoj. La UN-komisiono pri forigo de rasa diskriminacio konstatis, ke rasismaj kaj antisemitismaj incidentoj multobliĝis en Pollando kaj atentigis, ke en la pola punkodo mankas klaŭzo por povi pli severe punadi krimojn kun rasismaj motivoj. Krom tio, en Pollando aperis nova leĝo, laŭ kiu psikmalsanuloj povas esti pli rigore traktataj, tiel ke ekzistas la risko, ke ili perdas siajn rajtojn. Alia nova leĝo ebligas plilongigi la malliberigon de azilpetantoj; ĉirkaŭ unu kvarono de tiaj malliberuloj estas infanoj.

Ankaŭ en ***Ĉeĥa Respubliko*** romaoj (ciganoj) spertis diskriminacion. La UN-komisiono pri ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj rimarkis, ke en Ĉeĥio ekzistas multaj romaaj infanoj, kiuj estas senditaj al specialaj lernejoj por handikapuloj, kaj postulis aboli tiajn lernejojn. Eŭropa Komisiono enkondukis juran proceduron por esplori la situacion de romaaj lernantoj en la kleriga sistemo. Krom tio, en psikiatriaj klinikoj de Ĉeĥio okazis mistraktado de pacientoj kun mensaj handikapoj, kaj mankas efika kontrolo por eviti tiajn kazojn. En 2010 la ĉeĥa registaro pardonpetis pro la steriligo de ĉ. 1000 romaaj virinoj en la (komunisma) periodo inter 1972 kaj 1991 kaj submetis leĝproponon, kiu antaŭvidas monrekompencon por viktimoj. Fine, islamanoj devis elteni ŝmiratakojn flanke de kontraŭ-islamaj agresuloj. La saman lernejan problemon ĉe romaoj havas en principo ankaŭ ***Slovakio***. En junio 2014 la slovaka parlamento akceptis modifon de la konstitucio, laŭ kiu la geedzeco estas konsiderata kiel „unika ligo inter viro kaj virino“. Geedziĝo inter samseksemaj partneroj estas do eksplicite ekskludita. La koncerna

paragrafo ekvalidis la 1an de septembro 2014. Post kiam en somero 2014 400´000 personoj subskribis peticion por atingi la okazigon de ĉi-tema popola referendumo kontraŭ la permeso de egalaj rajtoj por samseksemuloj, en februaro 2015 tia referendumo, kiu estis lanĉita de la konservema „Unuiĝo de porfamilia alianco“, tamen fiaskis pro tro malgranda partopreno. Kvankam nur 20% partoprenis en ĝi (necesis 50%), 90% voĉdonis kontraŭ egalaj rajtoj por samseksemuloj kiel geedziĝo k.s. Apogantoj de la geedziĝo inter samseksemuloj bojkotis la referendumon. Krom tio, ankaŭ Slovakio resendis rifuĝintojn en siajn hejmlandojn, en kiuj ili riskis esti persekutataj aŭ turmentataj, ekzemple en Ruslando, precipe Ĉeĉenio.

El la vidpunkto de la homaj rajtoj en ***Hungario*** evoluas aparte malfavoraj kontraŭhomaj tendencoj. Dum la diskriminacio kaj stigmatizado de romaoj (ciganoj) havas longan tradicion en tiu lando, la aktuala Orbán-reĝimo ĵetis aldonan oleon en la fajron; ĝi ne nur subpremas la rajton libere esprimi alian opinion sed ankaŭ per ĉiuj manieroj kaj rimedoj malhelpas la aktivecon de la opozicia civilsocio, kiun oni krude ĉikanas laŭ (belo)rusa maniero. En Hungario ekzistas leĝo, kiu lezas la religian liberecon kaj ĉikanas ekleziojn. La hungaraj aŭtoritatoj mistraktis ankaŭ rifuĝintojn kaj azilpetantojn, kiujn oni ofte sendas en la malliberejon. Precipe ĉe la limo kun Serbio la hungaraj aŭtoritatoj resendis multajn rifuĝintojn al Serbio. En 2015 Hungario komencis konstrui dratbarilon ĉe sia landlimo kun Serbio[68] kaj anoncis, ke oni ne plu pretas repreni rifuĝintojn, kiuj forlasis Hungarion en la direkto de tria lando. Do, la homrajtaj instancoj de UN kaj EU havis multajn kialojn por plendi pri la sufiĉe malfacila situacio de la homaj rajtoj en Hungario, kiu riskas fariĝi paria ŝtato laŭ faŝismaj tendencoj, kiu ne hezitas serĉi la kontakton kun Putin, kiam ĝi sentas sin „diskriminaciata“ de Bruselo.

En la krizo de aŭgusto/septembero 2015, kiam miloj da rifuĝintoj el Sirio kaj aliaj landoj sovaĝe atingis la eŭropajn landojn, Hungario kaj aliaj orienteŭropaj landoj montris nulan solidarecon sed nur neelteneblan arogantecon, krude traktante la homamason en maniero, kiu parte rememorigis tempojn de la nacisocialismo kaj komunismo.

Sudorienteŭropaj landoj

Landoj de eksa Jugoslavio

Praktike ciuj respublikoj de eksa Jugoslavio estis okupataj pri sia historia pasinteco lige kun la militoj de la 90aj jaroj, dum kiuj estis plenumataj la plej grandaj lezoj de la homaj rajtoj kaj krimoj kontrau la homeco post la dua mondmilito. La aŭtoritatoj de ***Slovenio*** ricevis kritikon ne nur pro la socia diskriminacio de romaoj (ciganoj), kiuj estas minacataj de forpelado, sed ankaŭ pro tio, ke oni viŝis la datenojn de personoj, kiuj originis de aliaj jugoslaviaj respublikoj kaj pli frue vivis en Slovenio, kie oni ne restarigis iliajn rajtojn, kiujn ili perdis en 1992 kaj ne pagis rekompencon al ili. Koncernataj estis 25´671 personoj. Krom tio, en jura proceso kontraŭ iu kritika ĵurnalistino, kiu publikigis informojn, kiuj estis klasifikitaj kiel sekretaj, evidentiĝis, ke la slovena punkodo malebligas al akuzitoj utiligi en sia defendo la kriterion de la publika intereso. Dum en ***Kroatio*** la situacio de la samseksemuloj iomete pliboniĝis, la serba minoritato daŭre spertas diskriminacion kaj multaj romaoj vivas en mizeraj kondiĉoj. Ne finsolvita estas la problemo de la monrekompencoj pagendaj favore al la viktimoj de la jugoslavia milito de la 90aj jaroj. En ***Serbio*** la esploroj kontraŭ supozataj kaj akuzataj militkrimuloj progresis malrapide. La gazetaro estis premata mem cenzuri sin. Romaoj (ciganoj) ne estis sufiĉe bone traktataj kaj krimoj pro malamo kontraŭ seksaj minoritatoj ne estis serioze konsiderataj. Same en ***Kosovo*** la esploroj kontraŭ UÇK-membroj, kiuj estas supozataj aŭ akuzataj pro militkrimoj, progresis malrapide. Inter etnaj grupoj, ĉefe albanoj kaj serboj, ekzistis perforto. Ĵurnalistoj ricevis minacojn. Romaoj, aŝkalioj kaj egiptoj estis diskriminaciataj. Isa Mustafa, ĉefministro de Kosovo, diris, ke en lia lando turmentado ne ekzistas. Post pluraj vanaj provoj, en aĉgusto 2015 la parlamento de Kosovo voĉdonis por la instalado de speciala tribunalo por esplori militkirmojn dum la sendependiga milito, kiel parto de la normaliga procezo inter Kosovo kaj Serbio (la opozicio tamen bojkotis la voĉdonadon).[69] Ankaŭ en ***Bosnio-Hercego-vino*** la juraj procesoj por esplori militkrimojn progresis malrapide kaj multaj viktimoj vane atendis justecon kaj rekompencojn. Judoj kaj ciganoj, kiuj ne apartenas al la etnoj, kiuj „konsistigas“ la ŝtaton de Bosnio-Hercegovino, ne rajtis kandidatiĝi por politikaj oficoj. En lernejoj lernantoj estis separataj laŭ etnaj kriterioj. Okazis eltombigoj de kelkcent homoj, kiuj malaperis dum la milito. Dum R. Karadžić kaj R. Mladić daŭre troviĝis en la malliberejo de la haga tribunalo, V. Šešelj malsaniĝis kaj povis reiri al Serbio. Ankaŭ en ***Makedonio*** ekzistis senpuneco rilate al militkrimoj kaj krimoj kontraŭ la homeco. Progresoj por esplori tiujn krimojn okazis nur malmultaj. La jura siste-mo de Makedonio estas malproksima de internaciaj normoj. Eksplodis perforto inter makedonoj kaj albanoj, okazis diskriminacio kaj mistraktado de romaoj (ciganoj) kaj minacoj kontraŭ seksaj minoritatoj kaj ĵurnalistoj. En ***Montenegro*** (Crna Gora) estis prononcitaj verdiktoj kontraŭ supozeblaj murdistoj kaj aliaj (milit-)krimuloj, kiuj ne konformis al internaciaj normoj. Iuj iamaj prizonuloj

[68] La germana gazetaro nomis ĝin „Nova fera kurteno“ (vd. http://www.zeit.de/politik/ausland/2015-07/ungarn-zaun-grenze-flucht-reportage).
[69] Vd. http://www.tagesschau.de/ausland/kosovo-129.html.

de la koncentrejo Morinj estis rekompencataj per sumoj en alteco de 20-30´000 eŭroj pro la suferataj mistraktoj. Aliaj 200 personoj postulis tian rekompencon. Seksaj malpli-multoj estis diskriminaciataj, minacataj kaj atakataj. 30% de la 16´000 rifuĝintoj, kiuj troviĝas en Montenegro, ris-kas fariĝi senŝtatanoj; temas precipe pri 4000 romaoj, aŝkalioj kaj egiptoj, kiuj fuĝis el Kosovo kaj ne ricevis adekva-tan loĝejon. Montenegro funkcias kiel tranzitlando por rifuĝintoj, migrantoj kaj azipletantoj. Ĉar la azilpet-proce-duro ne funkcias efike, en 2012 fakte nur du personoj ricevis azilon! En sia deziro esti agnoskataj kiel „sekuraj" landoj, la registaroj de Kosovo kaj Montenegro konfirmis, ke en iliaj landoj homoj ne devas timi politikan persekutadon, nek turmentadon.[70]

Ceteraj balkanaj landoj

Rumanio kaj Bulgario, la du plej malriĉaj kaj koruptaj EU-landoj,[71] estas du ekzemploj, kie la stato de la homaj rajtoj estas draste plibonigenda. Precipe en ***Rumanio*** la romaoj suferas sisteman diskriminacion kaj malrespektadon, eĉ kun la beno de eksprezidanto Băsescu, kiu diris en novembro 2010 (en Slovenio), ke „la vagantaj romaoj laboras nur malmulte kaj tradicie vivas de ŝtelado". Pro tiu eldiro li ricevis monpunon de la „Nacia Konsilio por la kontraŭbatalado de diskriminacio". La rumanaj aŭtoritatoj kutimas draste agi kontraŭ romaoj, kiujn ili forpelas el iliaj loĝlokoj sen doni adekvatan rekompencon. Tiel, multaj romaoj perdis siajn loĝejojn aŭ daŭre vivaĉas en improvizataj loĝejoj. La Komisaro de la Eŭropa Konsilio pri homaj rajtoj mallaŭdis ankaŭ la mizerajn vivkondiĉojn en hejmoj por infanoj kaj plenkreskuloj kun korpaj kaj psikaj malsanoj. Kelkfoje la rumana polico aplikis perforton kontraŭ homoj, kiujn oni serĉas en privataj loĝejoj. Problemojn havas ankaŭ virinoj, kiuj volas aborti, kaj seksaj minoritatoj, kiuj volas vivi laŭ siaj imagoj, ekzemple geedziĝi. Same kiel en Pollando ankaŭ en Rumanio ekzistis sekretaj CIA-malliberejoj.

En ***Bulgario***, kiu estis invadata de miloj da rifuĝintoj kaj azilpetantoj el militaj landoj (precipe Sirio), la aŭtoritatoj sentis sin nesufiĉe preparataj por adekvate akcepti kaj trakti tiujn homojn, tiel ke UNHCR rekomendis al aliaj ŝtatoj, ke ili ne resendu azilpetantojn al Bulgario. Sed ankaŭ akceptitaj rifuĝintoj renkontis problemojn en Bulgario, se ili volis aliri klerigajn instalaĵojn, medicinajn servojn aŭ ricevi loĝejon. La bulgara Helsinki-Komitato timas ĉikanojn kaj atakojn kontraŭ la koncernataj celpublikoj flanke de la aŭtoritatoj kaj naciismaj politikaj grupoj.

Tiaj grupoj ekzistas ankaŭ en ***Grekio***. Kun la helpo de turkaj aŭtoritatoj, grekaj oficistoj rigore kontroladis la komunan limon kaj perforte resendis rifuĝintojn al Turkio, kiuj enpenetris Grekion. Dum tiaj operacoj okazis diversaj akcidentoj, en kiuj rifuĝintoj trovis la morton. Grekaj NROj dokumentis la mizerajn kondiĉojn, kiujn rifuĝintoj kaj azilpetantoj renkontas en grekaj malliberejoj. Post kiam en aŭgusto 2015 UNHCR admonis Grekion transpreni sian respondecon, ĉefministro Cipras replikis, ke lia lando ne havas la kapaciton por digesti 50´000 novajn rifuĝintojn, kiuj atingis Grekion nur en julio. Precipe la insulo Lesbo estis koncernata de alta nombro de rifuĝintoj.[72] La germana televido montris ankaŭ kazojn de akceptemaj kaj helpemaj grekoj. Inter oktobro 2013 kaj januaro 2014 iu NRO, kiu okupiĝas pri rasismo, registris pli ol 350 kazojn, kiuj estis ligataj kun rasisma perforto. Dum en 2014 tiaj incidentoj, kie rasisma perforto ludis rolon, ŝajne malpliiĝis, aliflanke kreskis la nombro de atakoj kontraŭ seksaj minoritatoj. La punjustico reagis nesufiĉe efike kaj lasis ĉi-rilatajn krimojn neesploratajn. En Grekio okazis ankaŭ diversaj ĉikanoj kontraŭ romaoj (ciganoj). Estis ricevitaj plendoj pro malbona traktado fare de policaj oficistoj en policejoj, limkontrolejoj kaj malliberejoj. Rifuzantoj de la armea deĵoro estis punitaj. En Grekio la makedonoj kaj aliaj etnaj minoritatoj daŭre ne estas agnoskitaj kiel tiaj.[73] Grekio fieras pri siaj tradicioj de la demokratio, kiu praktike mortis dum la tempo de la turka jugo kaj post la dua mondmilito praktike estis kondukita ad absurdum, kiel montras la politika evoluo de la lastaj 50 jaroj, kun fatalaj sekvoj, kies atestantoj fariĝis la nunaj samtempanoj.

---

[70] Vd. http://www.zeit.de/politik/ausland/2015-08/fluechtlinge-balkan-kosovo-montenegro-sichere-herkunftslaender.

[71] Sur la Monda Evolua Indekso Bulgario okupas la 57an kaj Rumanio la 72an lokon de 175 rangoj. La korupto estas tutmonda problemo kaj nur malmultaj landoj povas esti konsiderataj kiel nekoruptaj (vd. http://www.tagesanzeiger.ch/ausland/europa/So-korrupt-ist-die-Welt/story/27401227). Laŭ gazetaraj informoj la dimensio de la korupto en EU kalkuliĝas per ĉ.120 miliardoj da eŭroj (vd. http://www.spiegel.de/spiegel/print/d-84162337.html kaj http://www.nzz.ch/wirtschaft/wirtschaftspolitik/ein-schaden-von-120-milliarden-euro-1.18235302).

[72] Vd. http://www.unhcr.ch/home/artikel/344da0ac2588f7bd39460ccf0d7b7e37/fluechtlingszahlen-auf-griechischer-insel-steigen-2.html.

[73] Vd. http://www.nzz.ch/vielschichtige-ethnische-identitaeten-im-norden-griechenlands-1.1127417 kaj http://www.uni-regensburg.de/philosophie-kunst-geschichte-gesellschaft/geschichte-suedost-osteuropa/medien/11-stelzer_zur_makedonischen_minderheit_in_griechenland__neu_.pdf. En Grekio ekzistas minimume 15 etnaj kaj religiaj minoritatoj kun parte samaj problemoj de neagnosko de iliaj rajtoj (Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Kategorie:Ethnische_Minderheit_in_Griechenland, http://www.balkanforum.info/f9/griechenland-minderheiten-3505 kaj http://www.balkanforum.info/f16/minderheiten-griechenland-235132).

Lige kun la akriĝanta eŭropa dramo de rifuĝintoj, migrantoj kaj azilpetantoj, en ***Kipro*** multaj rifuĝintoj kaj azilpetantoj estis internigataj en la vilaĝo Menogia, kie ili devis atendi sian resendon al la patrujo. La prizonecaj viv-kondiĝoj en Menogia estis nekontentigaj pro la malbona kvalito de la servoj kaj la limigataj rajtoj por la homoj.

Albanio, kiu ne apartenas al EU, estis kritikata de AI pro tio, ke en tiu lando estas praktikataj enfamilia (hejma) perforto (ĉefe kontraŭ virinoj), turmentado kaj aliaj mistraktoj de homoj kaj diskriminaciado de romaoj (ciganoj), ke ekzistas mizeraj loĝkondiĉoj kaj enorma malriĉeco. Homoj simple malaperas kaj okazas ´kontraŭ-leĝaj´ ekzekutoj. La gazetaro raportis pri kazoj de sanga venĝo kaj partopreno en la organizata krimeco (balkana mafio), kaj aperis riproĉoj (aŭ supektoj) pri kunlaborado en la komercado per homoj kaj homaj organoj.[74] Dum la komunisma tempo Albanio, kiu estis hermetike fermata al la ekstera mondo kompareble kun Norda Koreio, kvazaŭ refalis en mezepokecajn vivkondiĉojn kaj nur en la pasintaj du jardekoj ricevis la ŝancon ´resaniĝi´, fariĝi ´normala´ ŝtato kaj plibonigi la ekonomion. Sed Albanio restis la plej malriĉa lando de Eŭropo, kun la 95a rango de la koncerna indekso de la *Monda Evolua Indekso*, se oni ne konsideras Moldavion, kiu troviĝas sur la 108a loko, cetere kune kun Turkio, kiu troviĝas sur la 96a loko.

Krom tio, en ĉiuj orienteŭropaj (ekskomunismaj) landoj mankas (la preteco de) radikala prilaborado de la historia pasinteco dum la tempo de la nacisocialismo, komunismo kaj naciismo kun la sekvoj, ke la kulpuloj de la pasinteco ne estas puneblaj/ataj kaj ke la viktimoj ne povas ricevi justecon. Alia baza problemo de la situacio de la orienteŭropaj popoloj konsistas en sia profundaj tradiciaj malamo, malestimo kaj abomeno, kiujn ili reciproke sentas praktike pri ĉiuj siaj najbaroj, kiujn ili konsideras eternaj malamikoj, kontraŭ kiuj en ajna momento post longa dormo milito povas eksplodi, se oni ne bridas kaj bremsas iliajn ŝovinismajn pasiojn. Ne sufiĉe bone konante la historion de Orienta Eŭropo, la homoj en Okcidento ofte subtaksas tiujn problemojn kaj ne kapablas kompreni diversajn ´strangajn´ eventojn okazantajn en tiu mondoparto, kiujn en Okcidento oni (parte iom naive) kredas jam delonge solvitaj.

Ĉi tiu raporto ankaŭ bone montras la interrilaton de plej diversaj fenomenoj kaj dimensioj, kiuj estas intime ligataj kun politiko, ekonomio kaj historio. Sen tio ne ekzistus homaj rajtoj, nek diskuto pri tiu temo.

Situacio de la homaj rajtoj en la landoj BRICS

Enkonduko: En la sekvo estos analizata la stato de la homaj rajtoj en speciala grupo de landoj, kiuj estas konataj kiel BRICS-landoj. Temas pri ***Brazilo, Ruslando, Hindio, Ĉinio*** *kaj* ***Sudafriko***.[75] Grandskala, sistema kaj intenca lezado de la homaj rajtoj estas observata precipe en Ruslando kaj Ĉinio, pro kio tiuj du landoj estas aparte kritikataj de homrajtaj organizaĵoj, kio kaŭzis gravajn politikajn kverelojn kaj konfliktojn kun tiuj organizaĵoj kaj kun la landoj, kiuj apogas kaj financas ilin, precipe Eŭropa Unio kaj Usono. En Ruslando de Putin, kies cinika sinteno rilate al homaj rajtoj jam estas fifama, neeltenebla kaj neakceptebla, oni eĉ publike kaj oficiale mokas kaj blasfemas pri la universalaj homaj rajtoj kaj valoroj, kiujn en evidente provoka maniero oni provas intence kontraŭbatali, lezi kaj diskrediti. La sekvoj kaj spuroj de la longa totalisma reĝimo verŝajne ne estos baldaŭ forviŝeblaj en tiu lando, kiu montras denove fortan politikan reakcion kaj militan agresemon sur la internacia scenejo. Kiel ilustras diversaj rangaj indeksoj, Ruslando kaj kelkaj ties dependaj postsovetiaj satelitoj kaj komplicoj apartenas al la plej maldemokratiaj, malliberaj, koruptaj kaj malpacaj landoj de la mondo. Esenca problemo de la rusa percepto (kaj propagando) estas, ke ĝi kvalifikas ĉian kritikon kontraŭ Ruslando kiel rusfobion. Tio estas komplete falsa kaj erara percepto aŭ sinteno, almenaŭ koncerne la realecon en (okcidenta) Eŭropo, kie rusfobion oni ne povas konstati inter vastaj tavoloj de la socio kaj politiko. Kompare kun la milionoj da islamdevenaj homoj el Turkio, arabaj kaj afrikaj landoj, kiuj cirkulas en okcidenta Eŭropo kaj kontraŭ kiuj certaj dekstremaj politikaj partioj lanĉis aktivan agreseman histerion, rusoj estas publike apenaŭ videblaj kaj kontaktoj kun averaĝaj eŭropanoj estas maloftaj. Male, la sinteno al Rusio, precipe al la popolo(j) de Ruslando, flanke de la publiko en (okcidenta) Eŭropo en la pasinteco estis en principo ĉiam pozitiva, bonvola kaj plena de (naiva) espero kaj intereso por la sorto de tiu lando, kvankam skeptiko kaj malfido restis. Kaj iuj rivalaj grandpotencoj kiel Usono aŭ Ĉinio certe klopodas, por ke Ruslando ne fariĝu tro potenca lando. Certe, la sinteno de la okcidenta publiko ŝanĝiĝis, kiam Ruslando montris reakciajn,

[74] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Organhandel_im_Kosovo, http://www.tagesanzeiger.ch/ausland/europa/EU-prueft-OrganhandelVorwuerfe-in-Albanien/story/19585997, http://www.faz.net/aktuell/politik/ausland/kosovo-die-uck-und-der-organhandel-1626888.html kaj http://www.blick.ch/news/ausland/kosovo-krieg-albanien-ist-gegen-organhandel-ermittlungen-id1499502.html.

[75] Pli da informoj pri BRICS vd. sub http://eo.wikipedia.org/wiki/BRICS, precipe la anglan version. Aktuale pri BRICS vd. sub http://www.nzz.ch/wirtschaft/wirtschaftspolitik/die-brics-suchen-eine-klammer-1.18577347.

agresemajn kaj minacajn tendencojn.[76] Do, pro diversaj kaŭzoj kaj historiaj spertoj en Eŭropo ekzistas tradicia timo antaŭ Ruslando, kiu estas grandparte abstrakta, ĉe iuj orienteŭropaj popoloj tamen konkreta. Malgraŭ tiuj cirkonstancoj, pri ĝenerala rusfobio en tiu mondoparto oni ne povas paroli, eĉ se la plimulto de la plej gravaj gazetoj de (okcidenta) Eŭropo akre kritikas la aktualan situacion en Ruslando kaj la kurson de la prezidento, registaro kaj parlamento en Moskvo lige kun la krizo en Ukrainio kaj lige kun la ekstera politiko de Moskvo kontraŭ siaj najbaroj en la ekssovetiaj respublikoj. Tia kritiko ne estas la samo kiel rusfobio. Iusence, la iama admiro por la rusa popolo, kiu antaŭ du jardekoj sukcesis liberiĝi de la komunismo, eĉ transformiĝis denove al speco de kompato. La publiko en Okcidento, kiu estas komplete konfuzata de la amaso da kontraŭdiraj opinioj, klarigoj kaj interpretoj pri la origino de la krizo, malfacile povas imagi kaj kompreni la (pli profundajn) kialojn kaj motivojn de la blinda venĝema malamo, kiun Putin kaj lia bando komencis direkti kontraŭ la Okcidento, kaj la cirkonstancojn de la psika teroro, kiun lia reĝimo lanĉis kontraŭ la propra popolo, kiu ŝajnas grandparte eĉ apogi tiun politikon (se kredi la oficialajn statistikojn publikigitajn en Ruslando, kiuj povas esti falsataj aŭ manipulataj). Kaj oni ankaŭ ne komprenas kial kaj kiel longe la ruslanda popolo toleras kaj eltenas ĉiujn tiujn fifarojn. Estas grave kaj esence akcenti kaj emfazi tiujn faktojn.

Ĉinio daŭre restis betone senkompromisa pri ĉiuj kritikaj kaj protestaj voĉoj flanke de la civila socio, kiuj povus minaci la potencan monopolon de la Komunisma Partio kaj la hegemonion de la ĉina etno, kiel montras la kazoj de Hongkongo, Tibeto kaj Sinkiango, kiuj daŭre estas teritorioj okupataj kaj brutale subpremataj de Ĉinio, kaj kiel ilustras la sorto de ĉinaj opoziciuloj kaj disidentoj. Ŝajnas ke Ruslando kaj Ĉinio celas fondi neformalan aliancon, per kiu ili strebas redukti la influon de la okcidenta mondo, precipe de Usono; oni planas establi, kune kun la landoj BRICS, alternativajn ekonomiajn strukturojn, kies celoj estas konkurenci kaj anstataŭi, eventuale eĉ forpuŝi la okcidentan sistemon en sia influzono. Certe, la Okcidento, precipe Eŭropo kaj Usono, ne akceptos tiajn modelojn, kiuj baziĝas sur perforto, subpremado, agresemo, maldemokratio, malliberecо, malpaco, korupto kiel Ruslando kaj Ĉinio reprezentas ilin. Eĉ se en Okcidento oni emas kondamni Ĉinion kaj Ruslandon pro la politika (kaj ekonomia) rolo, kiun ili ludas, oni ne forgesu, ke ankaŭ tiuj du ŝtatoj faras esence la samon kiel Usono, cetere kun vasta aprobo de la propraj popoloj: Ili praktikas imperiisman kaj ŝovinisman politikon, lanĉas militojn, lezas la homajn rajtojn kaj klopodas disvastigi kaj (perforte) altrudi siajn politikon, ekonomion kaj kulturon (inkluzive de la lingvoj) al aliaj popoloj. Alia dilemo precipe por Ruslando kaj Ĉinio estas, ke la homaro en sia plimulto en principo deziras kaj celas imiti kaj enkonduki la okcidentajn (usonajn/eŭropajn) politikan, ekonomian, socian kaj kulturan modelojn (eĉ rusoj kaj ĉinoj), ĉar la okcidentaj modeloj estas ĉiurilate plej multpromesaj. Tiel longe ke tiaj landoj kiel Ruslando kaj Ĉinio konservas sian politikan sistemon de minacado, ĉantaĝado, agresemo, korupto kaj interna subpremado, oni devas konsideri ilin en principo barbaraj ŝtatoj. Nur kiam Ruslando kaj Ĉinio rezignos pri siaj diktaturaj kaj subpremaj sistemoj, la tuta situacio en la mondo ŝanĝiĝos. Nur tiam tiuj du landoj ricevos ŝancon esti egalrajte respektataj de la Okcidento, nur tiam ili povos fariĝi ĝiaj veraj kaj amikaj partneroj. Ĝis kiam ili restos barbaraj ŝtatoj, la Okcidento evitas ilin, kvankam ĝi jam estas devigata kunlabori kun ili. (Dum Ruslando ja liveras grandan parton de nafto kaj gazo sed ekonomie restis sensignifa,[77] neglektebla nano, Ĉinio estas la dua plej granda popolekonomio de la mondo kaj la ĉefa ekonomia liveranto de Usono, sen kiu la usona ekonomio malfacile povus ekzisti).[78]

Nesubtaksenda kontraŭ-okcidenta potencialo certe ekzistas en principo ankaŭ en Brazilo, Hinda Unio kaj Sudafriko, kiuj estas iamaj brutale ekspluatataj okcidentaj kolonioj, kvankam tiuj landoj ne deziras fuŝi aŭ detrui siajn rilatojn kun la Okcidento, ĉar ili timas sankciojn kaj bojkotojn, kiuj povus signifi grandan malavantaĝon por iliaj ekonomioj. Krom tio oni povas dubi, ke Brazilo, Hindio kaj Sudafriko, kiuj volas esti perceptataj kaj akceptataj de la monda komunumo kiel ´normalaj´ modernaj landoj, pretas apogi la krudan politikon de potenco kaj minacado, kiun Ruslando kaj Ĉinio aplikas kaj enlande kaj kontraŭ aliaj landoj. Kiel oni vidos en la sekva raporto, tiuj tri elstaraj evolulandoj estas sufiĉe kritikataj pro la mizera situacio de la homaj rajtoj, ĉar en ili okazas malmultaj progresoj. Oni ricevas la impreson, ke la registaroj kaj aŭtoritatoj de tuj landoj ne estas interesataj plibonigi la situacion de la homaj rajtoj, ĉar eble ili havas ankoraŭ aliajn problemojn, kiuj estas pli urĝe solvendaj, ekzemple la drasta malriĉeco, kiu karakterizas la sociojn de ĉiuj tiuj landoj. Oni ne malaltentu, ke tiuj kvin landoj havas kune preskaŭ 3 miliardojn da homoj, kio baldaŭ signifos preskaŭ la duonon de la monda loĝantaro. Sed kiel ankaŭ montras la raporto pri homaj rajtoj, ŝtatoj kaj socioj ne povas vere moderniĝi kaj emancipiĝi de la heredaĵo de la pasinteco, kiu malhelpas tiun moderniĝon, sen respektado kaj aplikado de la *universalaj* homaj rajtoj kiel ili estis difinitaj en la jaro 1948 de UN.

---

[76] Laŭ iu studo de la renoma „Pew Esplorcentro“ nur 30% de la homoj en aliaj landoj havas pozitivan opinion pri Ruslando, kaj nur 24% fidas al Putin rilate al lia internacia politiko. En la iama orienta bloko sed ekzemple ankaŭ en Jordanio la opinio pri Ruslando estas plej malbona. (Vd. http://www.spiegel.de/politik/ausland/wladimir-putin-russland-verliert-laut-studie-ansehen-a-1046941.html, http://www.pewglobal.org/2015/08/05/russia-putin-held-in-low-regard-around-the-world kaj http://www.pewglobal.org/files/2015/06/Pew-Research-Center-Russia-Ukraine-Report-FINAL-June-10-2015.pdf).

[77] Eĉ la rusa gazetaro mem konfesas, ke Ruslando postrestis ekonomie kiel plej lasta membro de la BRICS-landoj (vd. http://www.ng.ru/economics/2015-08-07/1_briks.html).

[78] Pri la kreskanta rolo de la konkurentoj de Usono, precipe de Ĉinio kaj Hindio, legu ekzemple la libron de Fareed Zakaria: The Post-American World. 2008. (Germanlingva versio: Der Aufstieg der Anderen. 2009).

Brazilo

Enkonduko: El Brazilo venis maltrankviligaj raportoj pri drastaj lezadoj de la homaj rajtoj, inter kiuj troviĝas ankaŭ mortigoj fare de la polico, kruela turmentado kaj aliaj mistraktadoj de malliberuloj kaj civiluloj. Precipe junaj afro-brazilaj loĝantoj en faveloj, kamparaj laboristoj kaj indiĝenoj formis la ĉefajn risko- kaj celgrupojn, kiuj fariĝis viktimoj de lezataj homaj rajtoj. Tutlandaj protestoj kontraŭ la gigantisma projekto de la Monda Futba-la Ĉampionado de FIFA en Brazilo en 2014 estis sufokataj de la polico per ekscesa perforto. En Brazilo okazis multaj arbitraj arestadoj kaj provoj krimigi pacajn manifestantojn. Kvankam en Brazilo la geedziĝo de samseksemaj partneroj estas leĝe permesata, diversaj seksaj minoritatoj estis diskriminaciataj kaj atakataj. Progresoj estis farataj lige kun la kritika traktado de la historia pasinteco, precipe rilate la senjurecon kaj lezadon de homaj rajtoj dum la diktaturo de la jaroj 1964-85. La brazila registaro subtenis diversajn UN-rezoluciojn kontraŭ diskriminacio de seksaj minoritatoj kaj favore al la ´neŭtraleco´ de la interreto, la protekto de datenoj kaj de la opinia libereco. La rangoj de Brazilo en diversaj mondaj indeksoj pri demokratio, gazetara libereco, korupto kaj paco estis mezaj ĝis malbonaj.[79]

Perforto dum protest-manifestacioj: Lige kun la projektego de la Monda Futbala Ĉampionado de FIFA, kiu okazis en somero 2014 en Brazilo, miloj da homoj protestis surstrate ekzemple kontraŭ la altigo de biletkostoj por la publika transporto, kontraŭ altegaj elspezoj por financi internaciajn sportajn eventojn kaj kontraŭ mankantaj investoj ĉe publikaj servoj. La (armea) polico ofte perforte subpremis kaj likvidis tiujn protestojn per dubindaj metodoj, ĉirkaŭiante centojn da protestantoj, arbitre arestante ilin kaj farante absurdajn akuzojn kontraŭ ili. Iu favelo en Rio de Ĵaneiro estis ´vizitata´ de soldatoj de la armeo kaj marameo por kontroli la loĝantaron. Krom tio en diversaj urboj, kie okazis futbalaj ludoj, minimume ok kritikaj ĵurnalistoj estis atakataj, kaj en la tago de la fina ludo 15 ĵurnalistoj estis atakataj fare de la polico, kiam ili volis raporti pri iu protest-manifestacio. Unu ano de la filmteamo forpasis, ĉar li estis trafita de fajro-ĵetilo, kiu estis lanĉita de manifestantoj.

Publika sekureco kaj polica perforto kontraŭ civilaj personoj: La publika sekureco servis al la brazila polico kiel preteksto por lezi la homajn rajtojn. Laŭ oficialaj statistikoj, en 2013 424 kaj en la unua jarduono de 2014 285 personoj estis mortigitaj de la polico, kio signifas kreskon de 37% kompare kun la antaŭa jaro (la realaj nombroj probable estas pli altaj, aK). AI mencias plurajn individuajn kazojn. Okazis jura esploro kontraŭ kelkaj policistoj, inter kiuj kelkaj estis kulpigitaj pri la murdo de la juĝistino Patricia Acioli en aŭgusto 2011. Ŝi respondecis por la kondamno de 60 polic-oficistoj, kiuj estis akuzitaj pro la partopreno en la organizata krimo.

Kondiĉoj en malliberejoj, turmentado kaj senjureco: La brazilaj malliberejoj estas fifamaj, ĉar kutime ili estas plenplenaj kaj ĉar en ili regule okazas diversaj formoj de perforto kaj turmentado de homoj. En 2013 en la malliberejo de Pedrinas en la ŝtato Maranhão 60 malliberuloj estis mortigitaj, unu jaron poste ankoraŭfoje 18. Estis publikigitaj videofilmoj, kiuj montris senkapigojn de homoj. En 2013-4 la tribunaloj kulpigis 75 policistojn pri la mortigo de 111 malliberuloj dum tumultoj en la Carandiru-malliberejo (Casa de Detenção) de São Paulo en 1992. Sed en 2014 la koncernataj policistoj daŭre deĵoris. La nova sistemo por eviti kaj preventi turmenton, kiu estis enkondukita en 2013 en Brazilo, ankoraŭ ne funkcias kontentige. Por esplori la senjurecon dum la diktaturo inter 1964 kaj 1985 estis instalata speciala „Nacia Komisiono por trovi la veron“, kiu publikigis sian finan raporton en decembro 2014.

Defendantoj de homaj rajtoj kaj indiĝenaj popoloj: Ekzistis multaj problemoj por kontentige efektivigi la nacian programon por protekti defendantojn de homaj rajtoj, precipe financaj, juraj kaj organizaj. Ekzistis sistemaj kontraŭstaroj flanke de la aŭtoritatoj. La homaj rajtoj de certaj indiĝenaj triboj estis en danĝero. En septembro 2013 la Guarani-Kaiowá-komunumo de Apika´y (Mato Grosso)[80] protestis kontraŭ la ordono de la loka tribunalo forlasi difinitan teritorion. Ankaŭ la Quilombola-komunumoj devis lukti por konservi siajn teritoriajn rajtojn. La nesolvita problemo de la teritoria juro kaŭzis konfliktojn kaj minacis la indiĝenojn per perforto flanke de armataj viroj kaj lokaj farmistoj kiel en iu kazo en la ŝtato Maranhão. Lige kun tiaj teritoriaj konfliktoj en 2013 34 personoj perdis sian vivon, kaj la juraj instancoj faris malmulton por esplori tiujn okazaĵojn. Tiel, la respondeculoj por la mortigo de la Quilombola-parolisto F. Pinto Nero en oktobro 2010 ankoraŭ ne devis aperi antaŭ la tribunalo, kvankam kvar suspektitoj povis esti identigitaj de la polico.

Seksaj minoritatoj, abortoj: Kvankam ekzistas oficiala rezolucio, kiu aŭtorizas la geedziĝon de samseksemaj partneroj, daŭre okazis homfobiaj esprimoj flanke de diversaj konservativaj politikistoj kaj ekleziuloj, kiuj klopodas

---

[79] Laŭ la Indekso pri demokratio de la gazeto Economist Brazilo situis en 2014 sur la 44a loko antaŭ Slovakio, Kroatio, Hungario, Bulgario, Serbio kaj Rumanio, kio estas mirinda fakto. Malpli ĝojigaj estas la ciferoj de la Indekso pri percepto de korupto de Transparency International, laŭ kiuj Brazilo okupas la 69an lokon post Kubo, Turkio, Kuvajto kaj Sudafriko sed antaŭ Bulgario, Grekio, Italio kaj Rumanio. Laŭ la Indekso pri libereco de la gazetaro de Freedom House Brazilo okupas la 90an de entute 199 rangoj; Reporteroj sen limoj donis al Brazilo la pli malbonan 111an de 180 rangoj inter Ugando kaj Niĝerio. La problemo de la gazetaro de Brazilo estas, ke la centraj amaskomunikiloj apartenas al la dek plej influaj privataj entreprenistaj familioj, kiuj monopolas, regas kaj kontrolas ilin. En Brazilo okazas, ke ĵurnalistoj estas murditaj, se ili raportas pri korupto, organizata krimo kaj protestoj. Sur la Monda Pacindekso (Global Peace Index) Brazilo okupas la 74an de 162 rangoj.

[80] Ĉi-rilatan leteran kampanjon vd. sub http://www.amnesty.ch/de/laender/amerikas/brasilien/dok/2015/briefaktion-fuer-indigene-gemeinschaft.

eviti, ke ĉi-temaj klarigaj kaj klerigaj materialoj atingu la lernejojn. Laŭ komuniko de la NRO „Grupo Gay da Bahia“ en 2013 entute 312 personoj mortis sekve al homfobiaj krimoj. Iuj religiaj grupoj ankaŭ premis la registaron por atingi, ke oni malpermesu kaj punu abortojn. (La ĉi-koncerna brazila leĝo permesas aborton en kazo de seksa perforto, vivdanĝero por la virino aŭ aliaj gravaj kaŭzoj). Ĉar la eblecoj por aborti restas limigataj, multaj virinoj sekrete abortis. Granda publika atento estis vekata, kiam en Rio da Ĵanejro du virinoj perdis la vivon pro tio. La kadavro de unu el la virinoj estis kaŝata de la familio kaj sekrete bruligita de la klinika personaro.
Komerco per armiloj: Kvankam Brazilo subskribis la „Internacian Konvencion pri komerco per armiloj“, ĝia ratifiko ankoraŭ ne okazis. La brazila registaro rifuzis publikigi datenojn pri eksportitaj armiloj kaj ne respondis demandojn de sciencistoj kaj ĵurnalistoj pri armiloj, kiuj estis liverataj en landojn, en kiuj la homaj rajtoj estas grandstile lezataj.

Ruslando

Enkonduko: Tre malfavoran rolon por la homaj rajtoj ludas Ruslando, kio povus esti evitata, se la lando estus regata de pli liberalisma kaj malpli kontraŭ-okcidente orientata registaro. Laŭ ĉiuj ĉi-koncernaj indeksoj, Ruslando apartenas al la plej malliberaj, maldemokratiaj, koruptaj kaj malpacaj landoj de la mondo.[81] La demokratiaj instrumentoj estis senhonte misuzataj kaj la civitanaj kaj homaj rajtoj estis senskrupule, grandstile kaj sisteme malatentataj, subpremataj kaj lezataj de la (verŝajne duonkrima) Putin-reĝimo, kiu montras faŝismajn trajtojn.[82] La plimulto de sendependaj amaskomunikiloj, kiuj kritike perceptis kaj analizis la Putin-reĝimon, estis elŝaltata, kaj la spaco por libere esprimi opinion, se ĝi ne kongruas kun la oficiala versio de la ŝtato, fariĝis pli kaj pli malvasta kaj limigata. En 2012 estis enkondukataj diversaj rigoraj kaj tre efikaj rimedoj por silentigi kritikajn voĉojn kaj por subpremi la rajtojn libere renkontiĝi kaj asociiĝi. Pluraj NROj, kiuj okupiĝis pri problemoj de la homaj rajtoj, demokratio kaj milito, estis ĉikanataj aŭ malhelpataj kaj devigataj registriĝi kiel „eksterlanda agento“. Manifestacioj de la „eksterparlamenta“ opozicio estis subpremataj, malhelpataj aŭ malpermesataj kaj certaj aktivuloj de la kritika civilsocio estis arestitaj aŭ kondamnitaj al drastaj punoj. En malliberejoj, kie la vivkondiĉoj estas ĝenerale tre malbonaj, prizonuloj estis mistraktataj. La situacio en Kaŭkazo restis malstabila kaj danĝera. La viktimoj de diversaj krimoj restis sen ebleco aliri al juraj rimedoj kaj ne povis sin defendi ĉe ŝtataj juraj instancoj. Homrajtaj aktivuloj, sendependaj ĵurnalistoj kaj juristoj plenumis en Ruslando sian laboron kun granda risko esti atakataj, arestataj aŭ mortigitaj.[83]
Politika fono: En februaro 2014 multaj sportistoj kaj gastoj el la tuta mondo vizitis la Olimpiajn Ludojn en Soĉi, kiuj restis internacie kontestataj pro siaj multegekosta giganteco, altgrada korupto, detruado de la naturo kaj dubinda traktado de la homaj rajtoj.[84] Post la ludoj Ruslando surprizis la mondon per kelkaj krudaj politikaj agoj. En marto efektiviĝis la kaŝe preparata kaj ruze manipulata anekso de Krimeo fare de Ruslando, kiu esence estis apogata de krimeaj rusoj kaj bojkotata de ukrainoj kaj tataroj, kaj kiu okazis kontraŭ la volo de Ukrainio, al kiu tiu duoninsulo apartenis. Post la anekso de Krimeo, kiu praktike egalis al ŝtelado aŭ rabado de fremda ŝtatteritorio,[85] tie nun validas

---

[81] Laŭ la Indekso pri demokratio de la gazeto Economist Ruslando situis en 2014 sur la tre malbona 132a loko en la ĉirkaŭajo de Togolando, Vjetnamio, Kamerunio, Angolo, Burundo, Ruando, Kataro k.a. kaj plurajn lokojn post Belorusio. Laŭ la Indekso pri percepto de korupto de Transparency International ĝi okupas la tre malbonan 136an lokon post Ĉinio kaj Pakistano. Laŭ la Indekso pri libereco de la gazetaro de Freedom House Ruslando estas konsiderata kiel „ne libera“ kaj troviĝas sur la ekstrema malbona 180a de 199 rangoj kune kun Etiopio kaj Saŭdarabio, kaj laŭ Reporteroj sen limoj 2015 ĝi aperas sur la malbonega 148a de entute 180 rangoj post Mjanmaro (Birmo), Bangladeŝo kaj Malajzio. En la Monda Pac-Indekso (Global Peace Index) de la Instituto pro Ekonomiko kaj Paco (Sidnejo/Novjorko/Meksiko), Ruslando aperas inter la plej lastaj landoj sur la 153a loko, tuj post Israelo kaj antaŭ Pakistano, Nordkoreio, Jemeno, Centrafrika Respubliko, Somalio, Sudano, Sirio, Konga Demokratia Respubliko, Afganistano kaj Irako. Laŭ la indekso 2015 de http://www.reputationinstitute.com la reputacio de Ruslando konsiderinde falis ĝuste pro la anekso de Krimeo kaj la milito en orienta Ukrainio.
[82] Ankaŭ la rusa sociologo Igor Eidmann kredas, ke la faŝismo revenis al Ruslando, ke la aktuala situacio en Ruslando similas al hitlerisma Germanio kaj ke la putinistoj volas venĝi sin pro la perdita Malvarma Milito. La oficiale kredigata subteno de Putin estas iluzio, dum la vero estas, ke la plimulto de la rusoj ne interesiĝas pri politiko (vd. http://www.nzz.ch/meinung/kommentare/russland-ohne-putin-ld.1350#login).
[83] Liston de mortigitaj ĵurnalistoj en Ruslando vd. sub http://de.wikipedia.org/wiki/Medien_in_Russland#Bekannte_Opfer_von_Attentaten kaj http://de.wikipedia.org/wiki/Liste_während_der_Berufsausübung_getöteter_Journalisten.
[84] Dum la konstruado de la infrastrukturo de tiuj Olimpiaj Ludoj, kiuj kostis ĉ. 50 miliardojn da dolaroj, gravaj lezoj de la homaj rajtoj estis plenumataj, ekzemple perforto kontraŭ lokaj loĝantoj, ekpluatado kaj lezado de rajtoj de laboristoj, atakoj kontraŭ civilsociaj asocioj kaj kritikaj ĵurnalistoj, diskriminacio de seksaj minoritatoj.
[85] Kiel tiu anekso efektiviĝis legu sub http://de.wikipedia.org/wiki/Krimkrise#Verlauf. Difinon kaj kazojn de aneksoj vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Annexion. Ĉi-rilatan kontraŭdiran diskuton inter du rusaj juristoj vd. sub: http://www.novayagazeta.ru/politics/67715.html, http://m.rg.ru/2015/03/23/zorkin-site.html kaj http://www.novayagazeta.ru/politics/68785.html; germanlingvan resumon vd. sub http://www.laender-analysen.de/russland/pdf/RusslandAnalysen295.pdf. Pri la historio de Krimeo kaj la demando al kiu Krimeo apartenas aŭ apartenu vd. http://www.planlingvoj.ch/Tataroj_de_Krimeo.pdf.

la leĝoj de Ruslando, kiuj estis altruditaj al la popolo de Krimeo, inkluzive de la nova ruslanda civitaneco (kiun parto de la krimeanoj eĉ tute ne deziris). Kvankam la rusaj aŭtoritatoj formale proklamis la rusan, ukrainan kaj tataran oficialaj lingvoj de Krimeo, precipe la tataroj de Krimeo priplendis novan diskriminacion, tiel ke multaj tataroj forlasis la duoninsulon kaj preferis translokiĝi aŭ al Ukrainio aŭ al aliaj landoj (ekzemple Turkio). La licenco de la tatara televido ne estis renovigita de la rusaj instancoj,[86] la libereco de la gazetaro en Krimeo estis draste limigata kaj ĵurnalistoj, kiuj ne reprezentas la oficialajn vidpunktojn, devas enkalkuli atakojn, reprezaliojn aŭ aliajn malavantaĝojn.[87]
Poste komenciĝis milita agreso kontraŭ orienta Ukrainio (Donbaso),[88] kien enpenetris eksterlandaj soldataroj kun evidenta kaj ĉiurimeda rusa subteno (kvankam Moskvo obstine neas sian partoprenon en tiu milito), tiel ke la registaro de Kievo perdis la regadon super tiu regiono, kiun la ukraina armeo klopodis defendi kaj rekonkeri. Sekve al tiu perforta interveno la situacio en Donbaso kaj de ties civila popolo draste ŝanĝiĝis, malboniĝis kaj malstabiliĝis. La rezulto de tiu milit-simila krizo estis, krom esenca malstabiligo de Ukrainio mem, pli ol 10´000 mortintoj kaj 1,5 milionoj da fuĝintoj. Tragika kulmino de tiu konflikto estis la kraŝo de la civila malajzia aviadilo MH17, kiu flugis la 17an de julio 2014 super Ukrainio (Donbaso) kaj plej verŝajne estis eltere pafita de rusa misilo, ĉar la separatistoj erare kredis, ke temas pri ukraina milita aviadilo, kun la rezulto, ke 283 pasaĝeroj, ĉefe nederlandaj, malajziaj, aŭstraliaj, indoneziaj kaj britaj civitanoj, kaj la 15-membra aviadila personaro, pereis.[89] Ambaŭ flankoj, kaj la donbasaj separatistoj, kaj la ukraina armeo, kulpigis unu la alian pri la katastrofo. Kio koncernas la konflikton mem, kaj ukrainoj kaj separatistoj kulpas pri gravaj lezoj de la homaj rajtoj kaj pri la malrespektado de la milita juro.[90] Fakte, ankaŭ post la interkonsentoj inter la konfliktantaj partioj en Minsko la bataloj en Donbaso estis daŭrigataj kaj ŝvelas ĝis nun. Ĉiujn kritikojn kaj riproĉojn, kiujn la Okcidento direktis kontraŭ Moskvo, la Kremlo aŭ la Ministerio pri eksterlandaj aferoj, gvidata de S. Lavrov, aŭtomate resendis kutime en akompano de absurdaj kontraŭ-argumentoj.[91]
La eŭropaj kaj okcidentaj ŝtatoj, kiuj volis ekonomie helpi al Ukrainio, sed ankaŭ la plimulto de la UN-ŝtataro malakceptis la anekson de Krimeo,[92] ĉar oni opiniis, ke ĝi kontraŭis la principojn de la internacie valida juro, kiu en principo estas agnoskata ankaŭ de Ruslando. Sekve, la Okcidento enkondukis diversajn sankciojn kontraŭ Ruslando kaj klopodis internacie izoli la landon. Anstataŭ valoroj kiel homaj rajtoj, demokratio, opinia plurismo, politikaj kaj individuaj liberecoj, Ruslando komencis laŭte propagandi principojn, kiuj kontraŭdiras tiujn valorojn. Por pravigi sian politikon kaj konservi sian potencon la Putin-reĝimo aplikis pli kaj pli agreseman retorikon kaj histerian propagandon kontraŭ Ukrainio, la Baltaj Ŝtatoj, Pollando kaj aliaj okcidentaj najbaroj, kiuj estas nun konsiderataj de Moskvo kiel kontraŭuloj aŭ malamikoj, precipe NATO. Grandparto de la ruslanda popolo ŝajnas daŭre subteni la „patriotisman“ politikon de Putin, enkalkulante la riskon perdi civitanajn liberecojn kaj homajn rajtojn, kiuj tradicie malmulte valoras en Ruslando.[93] Dum la politika vivo estas komplete egalŝaltata, ankaŭ la kultura vivo de Ruslando, kiu estas kontrolata de ministro V. Medinskij, subpremas ĉiujn aktivecojn, kiuj ne konformas al la imagoj

---

[86] Pri novaj ĉikanoj kontraŭ la tataroj de Krimeo vd. http://www.welt.de/print/die_welt/politik/article144297947/So-schuechtert-Moskau-die-Krim-Bewohner-ein.html. http://www.nzz.ch/international/europa/eine-stimme-fuer-die-krimtataren-1.18577998, http://www.nzz.ch/feuilleton/putin-wollte-die-ganze-ukraine-1.18582480, http://www.tagesschau.de/ausland/krimtartaren-sender-103.html, http://www.welt.de/geschichte/article125377674/Russlands-lange-Abrechnung-mit-den-Krimtataren.html. Pliajn informojn pri la situacio de la homaj rajtoj en Krimeo (anglalingve), kiu apartenas nun al Ruslando, vd. sub http://www.bpb.de/internationales/europa/ukraine/195200/dokumentation-menschenrechtssituation-auf-der-krim.
[87] Vd. ankaŭ http://www.laender-analysen.de/russland/pdf/RusslandAnalysen291.pdf.
[88] Pri militkrimoj de Ruslando en Donbaso vd. https://de.informnapalm.org/kriegsverbrechen-russen-exekutieren-ukrainische-kriegsgefangene-suedlich-von-krasny-partisan, http://www.spiegel.de/politik/ausland/ukraine-krise-amnesty-international-entlarvt-moskaus-genozid-luege-a-998493.html, http://www.nzz.ch/international/schneise-im-propaganda-dschungel-1.18407514, http://www.amnesty.ch/de/laender/europa-zentralasien/ukraine/dok/2014/beweise-fuer-kriegsverbrechen, http://www.amnesty.ch/de/laender/europa-zentralasien/ukraine/dok/2014/beweise-fuer-kriegsverbrechen, https://www.wsws.org/de/articles/2014/09/12/ukra-s12.html.
[89] Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Flugo_17_de_Malaysia_Airlines. Ruslando obstine kontestas la hipotezojn prezentitajn en Okcidento pri la verŝajnaj kaŭzoj de la akcidento, konfuzis la mondon per propraj (nekredindaj, mensogaj) teorioj kaj sisteme blokas intencojn esplori ĉi tiun incidenton kadre de UN (vd. http://www.nzz.ch/international/mh17-tribunal-duerfte-an-moskaus-veto-scheitern-1.18587456).
[90] Vd. http://www.faz.net/aktuell/politik/ausland/europa/kriegsverbrechen-von-ukrainischen-freiwilligenbataillonen-13146583.html, http://www.nzz.ch/international/schneise-im-propaganda-dschungel-1.18407514 kaj http://www.spiegel.de/politik/ausland/ukraine-prozess-gegen-pro-ukrainischer-kaempfer-a-1045801.html.
[91] Ekzemple ke la Okcidento ne estas interesata ĉesigi la konflikton en Donbaso, nek interesiĝas pri kompromisa solvo (vd. http://www.ng.ru/news/512870.html).
[92] Per 100 voĉoj por, 11 kontraŭ kaj 58 sindetenoj la Ĝenerala Asembleo de UN alvokis „ĉiujn ŝtatojn, internaciajn organizaĵojn kaj specialigatajn agentejojn ne agnoski ajnan ŝanĝon en la statuso de la Aŭtonoma Respubliko Krimeo kaj la urbo Sevastopolo surbaze de la referendumo de la 16-a de marto 2014“. Pollando kaj la Baltaj Statoj (Litovio, Latvio kaj Estonio) plj laute kondamnis la anekson de Krimeo, car ili timas esti la venotaj viktimoj de la rus imperiismo.
[93] Ĉefe la junularo (precipe 18-24-jara) naive adoras Putinon kiel duondion kadre de groteska personkulto (vd. http://web.de/magazine/panorama/kult-wladimir-putin-30810374).

de la oficiala kulturpolitiko. La ekonomio de Ruslando draste malboniĝis pro la sankcioj kaj precipe pro la falo de la prezoj por nafto kaj gaso. La rublo perdis ĝis 40% de sia valoro, kiu esence malriĉigis vastajn sociajn tavolojn (en Ruslando pli ol 23 milionoj da homoj, t.e. 16% de la loĝantaro, vivas sub la limo de malriĉeco[94]). La inflacio atingis en 2014 11%, por 2015 estas atendataj 15% (ciferoj varias de fonto al fonto).[95] Okcidentaj ekonomiistoj, precipe la Monda Banko, parolas pri longdaŭraj recesio kaj stagnado[96] (vortoj kiujn oni evitas en Ruslando, same kiel anekso, anstataŭ kiu en Ruslando oni parolas pri „reunuiĝo"). La ekonomio de Ruslando suferas ankaŭ pro la burokrateca, korporaciisma-monopolisma ŝtatkapitalisma sistemo, kiu estas malmulte merkat-ekonomie orientata kaj priservas kelkajn ĉefajn branĉojn tro unuflanke.[97] Samtempe, la milita rearmado estas akcelata pere de konstruado de novaj superaj armilaj sistemoj (tankoj, raketoj), kiujn la rusoj ankaŭ intencas vendi al eksterlando, ekzemple al la landoj BRICS. Anoncita estis ankaŭ la renovigo de la nuklea arsenalo, kiu estu starigota sur Krimeo kaj en la Kaliningrada regiono.[98] Putin minacis la mondon, ke Ruslando „defendos sin" se necese ankaŭ per nukleaj armiloj. Por akiri la mondan atenton, ne mankas ĉiam novaj minacoj, provokoj kaj agresoj de la rusa flanko kontraŭ la internacia komunumo, tiel ke kelkaj diplomatoj kaj historiistoj esprimis sian timon, ke ekzistas la danĝero, ke (nuklea) milito kun Ruslando povus eksplodi.[99] La Okcidento ekskludis Ruslandon de la kunlaboro kun NATO, G7 kaj Eŭropa Parlamento kaj starigis liston de rusaj politikistoj kaj entreprenistoj, kiuj estas deklaritaj kiel nedezirataj personoj en la okcidentaj landoj. Ruslando siaflanke enkondukis sankciojn kontraŭ Eŭropa Unio kaj publikigis liston de nedezirataj EU-politikistoj, kio esence profundigis la malboniĝon de la rilatoj.
Probable kiel reago al la severigo de la okcidentaj sankcioj kontraŭ Ruslando, Putin subskribis dekreton (fine de julio 2015), laŭ kiu la ruslandaj doganistoj estas devigataj senprokraste detrui kaj bruligi ĉe la landlimoj ĉiujn okcidentajn nutraĵojn, kiuj estas koncernataj de la ruslanda embargo, malpermesataj de la importado kaj konsiderataj kiel false deklarita kontrabandaĵo. Ĉi tiu kampanjo komenciĝis en Ruslando per laŭta propagando en aŭgusto 2015, tamen ne sen akompano de konsiderinda protesto: Pli ol 310´000 peticiantoj (8.8.) subskribis en la interreto alvokon kontraŭ tiu barbara agado, kiu koncernas cento(j)n da tunoj da nutraĵoj (319,3 t en la 6.8.). La Kremlo defendis la kampanjn per la ne tro kredinda argumento, ke necesas zorgi pri la sano de la popolo.[100] Per ĉiuj tiuj senfinaj venĝaj reagoj kontraŭ la internacia komunumo Ruslando praktike distanciĝis de la Okcidento, de kiu laŭdire ĝi sentas sin trompata kaj humiligata, donante la preferon al la kunlaboro kun la landoj BRICS kaj aliaj ŝtatoj, kiuj simpatias kun tiu landogrupo, ekzemple Argentino, Venezuelo, Irano, Vjetnamio kaj Egipto, al kiu la rusoj volas vendi siajn armilojn.

---

[94] Vd. http://www.spiegel.de/wirtschaft/soziales/russland-fast-23-millionen-menschen-leben-unter-armutsgrenze-a-1038418.html.
[95] Vd. http://www.nzz.ch/wirtschaft/wirtschaftspolitik/russlands-steiniger-weg-zu-mehr-selbstversorgung-1.18591003, https://www.quandl.com/collections/russia/russia-economy-data.
[96] Vd. http://www.spiegel.de/wirtschaft/soziales/weltbank-rechnet-mit-langer-rezession-in-russland-a-1026764.html kaj http://www.laender-analysen.de/russland/pdf/RusslandAnalysen299.pdf. La plej aktuala raporto de la Monda Banko pri la ekonomio de Ruslando estas elŝutebla sub http://www.worldbank.org/content/dam/Worldbank/document/eca/russia/rer33-eng.pdf.
[97] Pri la ekonomio kaj ekonomia politiko de Ruslando vd. http://www.laender-analysen.de/russland/pdf/RusslandAnalysen297.pdf, http://www.laender-analysen.de/russland/pdf/RusslandAnalysen287.pdf, http://www.laender-analysen.de/russland/pdf/RusslandAnalysen276.pdf, http://www.laender-analysen.de/russland/pdf/RusslandAnalysen270.pdf, http://www.laender-analysen.de/russland/pdf/Russlandanalysen259.pdf, http://www.laender-analysen.de/russland/pdf/Russlandanalysen255.pdf, http://www.laender-analysen.de/russland/pdf/Russlandanalysen251.pdf k.a.
[98] Kiu cetere estis aneksita de USSR en oktobro 1945 same kiel la Baltaj Ŝtatoj estis aneksitaj en 1940 de USSR.
[99] Vd. http://www.tagesanzeiger.ch/ausland/europa/Spitzendiplomat-warnt-vor-Krieg-zwischen-Russland-und-Westen/story/27674917 kaj en *Sputnik News*, kiu estas organo de la rusa propagando, oni malferme parolis pri nuklea milito (vd. http://de.sputniknews.com/politik/20150628/302981171.html). Krom tio, Ruslando simuladis la okupacion de norvega, dana, sveda kaj finna teritorioj (http://www.bluewin.ch/de/news/ausland/2015/7/1/us-denkfabrik-schockiert-mit-russischem-eroberungsszenario-.html). Laŭ postulo de iu ruslanda deputito, la ĝenerala prokuroraro de Ruslando devis esplori, ĉu la sendependiĝo de la tri Baltaj Ŝtatoj en 1991 konformis al la leĝo aŭ ne, kio signifas novan grandegan provokon kontraŭ tiuj ŝtatoj. (vd. http://www.welt.de/politik/ausland/article143368890/Baltikum-Anfrage-bringt-Moskau-in-Bedraengnis.html, http://www.interfax.ru/russia/450574, http://tass.ru/politika/2085684, http://www.newsru.com/russia/30jun2015/genprok.html, http://www.gazeta.ru/politics/news/2015/06/30/n_7334889.shtml, http://www.vedomosti.ru/politics/articles/2015/06/30/598680-deputat-fedorov-prosit-genprokuraturu-proverit-zakonnost-priznaniya-nezavisimosti-stran-pribaltiki, http://novayagazeta-ug.ru/note/u1542/2015/06/30/121819).
[100] Vd. http://www.derbund.ch/ausland/europa/brennende-schweinebaeuche/story/26893495, http://www.sueddeutsche.de/wirtschaft/anordnung-von-putin-empoerung-in-russland-ueber-lebensmittel-vernichtung-1.2598246, http://de.sputniknews.com/panorama/20150806/303681813.html, https://slon.ru/posts/54872, http://top.rbc.ru/politics/06/08/2015/55c32b649a79470d911fcf8f, http://www.spiegel.de/politik/ausland/russland-wladimir-putin-laesst-lebensmittel-vernichten-kommentar-a-1047103.html, http://ria.ru/society/20150805/1163726971.html, http://www.handelsblatt.com/politik/international/vernichtungsaktion-westlicher-produkte-die-schweinchen-sind-dagegen/12161388.html. Eĉ la gvidanto de la komunisma partio Zjuganov kritikis la barbaran kaj cinikan fifaron de Putin. En Ruslando oni suspektas la koruptajn rusajn doganistojn, ke ili kaŝe revendis importitajn varojn, kiujn ili povis kapti ĉe la landlimo; por eviti tion Putin ordonis bruligi la varojn.

Libereco de la opinio, situacio de la ĵurnalismo: La ruslanda registaro fortigis la kontrolon kaj cenzuron pri la plej gravaj amaskomunikiloj (ĉefe presataj kaj interretaj gazetoj, radio kaj televido[101]), kio draste reduktis la eblecojn libere esprimi alian opinion ol la ŝtate validan. Krom en neoficialaj kaj privataj interretaj forumoj, kiuj estas malfacile kontroleblaj kaj do estas akra dorno en la okuloj de la Kremlo, principa kritiko kontraŭ Putin aŭ la ruslanda politiko praktike ne aperas en gravaj gazetoj aŭ televidaj elsendoj, kie okazas senfinaj konfuzaj raportoj kaj polemikaj diskutoj pri Ukrainio, sen tuŝi tabuajn temojn. Grandparto de la gazetaro, kiu ne estas rekte kontrolata de la ŝtato, aplikas memcenzuron kaj evitas publikigi opiniojn, kiuj devias de la oficialaj vidpunktoj. Sendependaj amaskomunikiloj ricevis admonojn de ŝtataj instancoj, devis maldungi kunlaborantojn kaj zorgi pri siaj komercaj rilatoj. Amaskomunikiloj estis utiligataj ankaŭ por misfamigi politikajn kontraŭulojn kaj sendependajn neregistarajn organizaĵojn. Kelkaj ekzemploj: En januaro 2014 rusaj retprovizantoj eliminis la televidan kanalon *Doĵd´* el sia programo, post kiam la kanalo provokis kritikan debaton pri la okupacio de Leningrado dum la dua mondmilito. Krom tio oni rifuzis al la kanalo plilongigi la kontrakton por lui studiajn ejojn. La kanalo *Doĵd´* estis konata pro sia sendependa kaj kritika raportado ekzemple pri la okazaĵoj sur la Majdan-placo en Kievo, kiujn *Doĵd´* prezentis laŭ alternativa maniero ol la ŝtata televido faris tion. Sekve, *Doĵd´* povis elsendi nur en la interreto kaj devis esti financata per alternativaj monrimedoj por povi plu ekzistadi. Post admono flanke de la instanco, kiu registras kaj kontrolas la amaskomunikilojn („Roskomnadzor"), la ĉefredaktorino de la interreta portalo *lenta.ru* devis esti maldungita. La kaŭzo estis intervjuo kun iu dekstrema ukraina naciisto. La antaŭe sendependa koncepto de la redakcio komplete ŝanĝiĝis. En tiu ondo de ĉikanoj la aŭtoritatoj fortigis la kontroladon de la interreto. Laŭ nova leĝo la ĝenerala prokuroro povas postuli de „Roskomnadzor" fermi certajn interretajn paĝojn, kiuj ekzemple alvokas al partopreno en nepermesataj manifestacioj. La konfirmo de juĝisto ne estas bezonata. En marto 2014 la konataj novaĵportaloj *Ežednevnyj žurnal, grani.ru* kaj *kasparov.ru* estis fermitaj post kiam ili raportis pri protest-manifestacioj en Moskvo. Enmiksiĝon flanke de moskvaj kontrol-instancoj spertis ankaŭ la radiokanalo *Eĥo Moskvy*, kiu apartenas al Gazprom Media kiel ĉefa akcia posedanto (!!!). La redakcio ricevis admonon forigi de sia retujo iun interparoladon kun du ĵurnalistoj, kiuj rakontis pri la bataloj en Donecko kaj esprimis por-ukrainajn vidpunktojn. Krom tio, okazis atakoj kontraŭ ĵurnalistoj, kiuj raportis aŭ volis raporti pri sekretaj entombigoj de rusaj soldatoj, kiuj pereis en la milito en Ukrainio. En aŭgusto 2014 la eldonisto de la gazeto *Pskovskaja gubernija*, Lev Ŝlosberg, estis tiel krude batita, ke kun gravaj vundoj ĉe la kapo li devis esti flegata en la hospitalo. Kiel unua lia gazeto raportis pri sekretaj entombigoj de soldatoj. La esploristoj ne povis trovi la kulpantojn, kiuj disbatis la pskovan eldoniston, pro kio la esploroj estis ĉesigitaj. Alia ĵurnalisto, Timur Kuasev el Kabardio-Balkario, kiu kunlaboris kun lokaj homrajtaj aktivuloj, estis trovita morta la 1an de aŭgusto 2014. Ŝajnas, ke iu havigis al li mortigan injekcion. La kazoj de ĵurnalistoj, kiuj estis mortigitaj en Norda Kaŭkazo kiel N. Estemirova, H. Kamalov kaj A. Aĥmednabiev, ne estis efike esploataj kaj la kulpantoj restis en la mallumo. En la kazo de A. Politkovskaja, kiu estis mortigita en oktobro 2006 en Moskvo, kvin viroj estis kondamnitaj al arestado en malliberejo, sed la veraj iniciatintoj de tiu murdo neniam estis identigitaj. En aŭgusto 2015 ruslandaj ret-provizantoj fermis, laŭ ordono de „Roskomnadzor", la rusan Vikipedion.[102]

Civilsociaj aktivecoj: Por apliki la novan leĝon, kiu persekutas la „propagandon de netradiciaj seksaj rilatoj en kontakto kun infanoj", la ruslandaj aŭtoritatoj observadis anojn de seksaj minoritatoj, al kiuj ili malhelpis organizi pacajn renkontiĝojn. En januaro 2014 la ĵurnalistino Elena Klimova el la urbo Niĵnyj Tagil estis akuzita surbaze de la nomita leĝo. Ŝi fondis la interretan projekton „Children 404" por subteni LGBTI-gejunulojn. En la sekvo la organizantoj de tiu projekto estis diversamaniere ĉikanataj, ekzemple de nekonataj atakantoj, kiuj estis akompanataj de armataj policistoj, kiuj volis kontroli la ĉeestantojn de iu filmpremiero por konstati, ĉu infanoj troviĝas inter ili. Ŝajnas, ke la kampanjo kontraŭ seksaj minoritataj ĝuas la protekton de la ŝtato kaj de la rusortodoksa eklezio, kiu ripete polemikis kontraŭ la geedziĝo inter samseksemaj partneroj, evidente kun la subteno de vastaj popoltavoloj, kiuj tradicie malŝatas ankaŭ eksterlandanojn, precipe kaŭkazianojn, mezazianojn, polojn, baltojn, ukrainojn, ciganojn kaj judojn, kontraŭ kiuj ekzistas fortaj anataŭjuĝoj. Kompare kun antaŭaj jaroj, la protest-manifestacioj en Moskvo kaj aliaj urboj reduktiĝis, kvankam homoj iradis sur la straton por protesti kontraŭ la farsprocesoj kontraŭ la protestintoj de la Bolotnaja-placo, kontraŭ la armea agreso kontraŭ Ukrainio, kiu estas subtenata de Ruslando, kvankam Ruslando kontestas aŭ eĉ neas tiun subtenon, kaj kontraŭ la kondamno de la fratoj Naval´nyj, al kiuj oni faris apartan juran proceson pro laŭdira fraŭdado de mono. Por publikaj manifestacioj la organizantoj bezonis specialajn permesojn, kiuj estis nur tre malfacile riceveblaj. Multaj tiaj manifestacioj estis malpermesataj, limigataj aŭ dissolvataj de la rusaj aŭtoritatoj. Malrespektado de la koncernaj leĝoj pri manifestacioj, kiuj estis severigataj, kaŭzis drastajn punojn, ĉu monajn aŭ malliberejajn. Dek personoj, kiuj partoprenis en la manifestacioj sur la Bolotnaja-placo, estis kondamnitaj al plurjara restado en malliberejo. Politikaj aktivuloj kiel S. Udal´cov kaj aliaj estis kulpigitaj, ke ili organizis tiujn „perfortajn" manifestaciojn.[103] Regule la polico arbitre arestis centojn da homoj, kiuj publike protestis en Moskvo kaj aliaj urboj de Ruslando. Inter ili troviĝis ankaŭ la fratoj

[101] La ĉefaj televid-elsendoj, en kiuj ĉiuj plej laŭtaj rusaj populismaj demagogoj, kiuj polemikas kontraŭ Ukrainio, precipe la ukraina registaro, kutime elpaŝas, estas *Vesti* (kun Andrej Kondraŝov, Marija Sittel´ k.a.), *Vesti nedeli* (kun Dmitrij Kiseljov), *Voskresnyj veĉer s Vladimir Solovjovym*, *Special´nyj korespondent* (kun Arkadij Mamontov k.a.).

[102] Vd. http://www.spiegel.de/netzwelt/netzpolitik/russlands-provider-haben-wikipedia-blockiert-a-1049667.html.

[103] La nomojn de la Bolotnaja-proceso vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Bolotnaja-Prozess.

Naval´nyj. Dum unuflanke la manifestacioj de la opozicio estis malhelpataj aŭ malpermesataj, aliflanke la ŝtate organizataj amas-manifestacioj povis okazi sur centraj placoj de la ĉefurbo. En Moskvo du virinoj estis arestitaj de la polico, ĉar ili portis vestaĵojn kun blua kaj flava koloroj, la simbolo de Ukrainio. Sed homoj protestis ankaŭ kontraŭ ŝparado en la sansektoro kaj aliaj ´nepolitikaj´ temoj. Al 15-taga aresto estis kondamnitaj iuj homoj, kiuj blokis iun straton en Moskvo. Centoj da NROj estis vizitataj de la imposta polico aŭ de aliaj aŭtoritatoj por traesplori ilin. NROj, kiuj rifuzis registriĝi kiel „eksterlanda agento", devis enkalkuli la riskon esti akuzitaj kaj devigataj akcepti longan juran proceson aŭ esti fermitaj. Sekve, en majo 2014 la leĝo estis modifita tiel, ke la ministerio pri justico povas registri NROjn kiel „eksterlandan agenton" ankaŭ sen ilia konsento.[104] Ĝis la fino de 2014 29 NROj estis registritaj tiumaniere, inter ili pluraj gvidaj homrajtaj asocioj.[105] Minimume kvin NROj decidis ĉesigi sian akivecon kaj estis malfonditaj. Membroj de la NRO „Ekovaĥta", kiu esploris kaj dokumentis damaĝojn de la naturo lige kun la Olimpiaj Ludoj en Soĉi, estis ĉikanataj de sekurecaj fortoj, kiuj provis silentigi tiujn aktivulojn, kiujn ili parte arestis kaj akuzis dum la ludoj. En novembro iu tribunala instanco ordonis la malfondon de „Ekovaĥta". La ministerio pri justico proponis ankaŭ fermi la faman asocion „Memorial", kiu esploras kaj dokumentas krimojn plenumatajn dum la stalinisma tempo. Oficialaj kaŭzoj por tiaj fermoj kaj malfondoj kutime estis formalaj eraroj dum la registrado aŭ simile. Sub Putin estas entreprenataj strebadoj revizii kaj reskribi la historion de Ruslando, al kio apartenas i.a. la pli pozitiva pritakso de la carisma (precipe Aleksandro IIIa) kaj stalinisma periodoj (milita heroeco dum la „Granda Patrolanda Milito" k.s.).[106]

Fine de februaro 2015 en Moskvo estis mortpafita Boris Nemcov, fama rusa politikisto kaj kritikanto de Putin.[107] Dirante, ke ŝia patro mortis kiel heroo, lia filino Ĵanna ne kredas la version, ke ĉeĉenoj mendis la murdon, ĉar Nemcov estis estimata persono en Ĉeĉenio, kaj ŝovas la respondecon por la murdo al la „reprezentantoj de la diktaturo en Ruslando" mem, ĉar Nemcov jam delonge estis dorno en iliaj okuloj; li ricevis minacojn el tiu medio precipe tra la oficiala gazetaro. En Ruslando fakte multaj homoj kredas, ke la Kremlo donis la ordonon por likvidi la faman disidenton, ĉar li estis ne nur la ikono de la opozicio sed fariĝis pli kaj pli aŭdaca en sia kritiko de la faroj de la Putin-reĝimo, celante ankaŭ esplori la faktojn pri la milito en Ukrainio, kio tute ne povis plaĉi al tiuj, kiuj iniciatis tiun militon. Pro timo Ĵanna mem intertempe forlasis Ruslandon kaj dume restadas en eksterlando, kie ŝi sentas sin pli sekura.[108]

En junio 2015 Nadja Tolokonnikova kaj ŝia kolegino Ekaterina Nenaŝeva estis arestitaj en Moskvo, kiam ili kudris rusan flagon sur iu publika placo proksime de la Kremlo, portante tipajn vestaĵojn de prizonuloj.[109]

Alia rimarkinda historio estas tiu pri Il´ja Ponomarjov, la sola deputito de la Dumao, kiu voĉdonis kontraŭ la anekso de Krimeo kaj pro tio ricevis multajn problemojn. Ŝajnas ke li perdis la parlamentan imunecon, ne plu povas revojaĝi al Ruslando, kie li estas jure persekutata. Aparte drasta kazo de lezo de la rajtoj de parlamentano![110] Krom tio, en Ruslando estis lanĉita jura farsproceso kontraŭ du ukrainaj civitanoj (reĝisoro Oleg Sencov kaj ekologiisto Aleksander Kolĉenko), kiuj estas akuzitaj pro „terorismo". Alia ukraina civitanino, Nadja Savĉenko, helikoptera pilotino, al kiu la rusoj riproĉas, ke ŝi kulpas pri la morto de du rusaj ĵurnalistoj, estas same retenata kiel „militkaptito" en Ruslando.[111] Eston Kohver, sekretservisto el Estonio, kiu estis kidnapita de rusaj ´kolegoj´ kiel „spiono" dum sia

---

[104] La gulag-muzeo „Perm´-36" en la urbo Perm´ devis pagi altan monpunon de 300´000 rubloj, ĉar gi rifuzis registriĝi kiel „eksterlanda agento" (vd. http://www.ng.ru/news/511175.html kaj http://www.nzz.ch/international/ein-museum-fuer-stalins-henker-1.18588586), kio ĝi ja evidente ne estas.

[105] Pri la aktuala situacio vd. http://www.nzz.ch/international/europa/russland-knebelt-buergergesellschaft-weiter-1.18577087.

[106] Vd. ekz. https://zeitschrift-ip.dgap.org/de/article/getFullPDF/11915, http://www.laender-analysen.de/russland/pdf/Russlandanalysen196.pdf; kaj http://www.laender-analysen.de/russland/pdf/RusslandAnalysen271.pdf. Elke Fein: Geschichtspolitik in Russland: Chancen und Schwierigkeiten einer demokratisierenden Aufarbeitung der sowjetischen Vergangenheit am Beispiel der Tätigkeit der Gesellschaft MEMORIAL. Hamburg 2000; Lars Karl u.a. (Hrsg.): Geschichtspolitik und Erinnerungskultur im neuen Russland. Göttingen 2009.

[107] Vd. http://www.derbund.ch/dossiers/ausland/dossier2.html?dossier_id=2958, http://www.zeit.de/politik/ausland/2015-02/boris-nemzow-russland-tod, http://www.tagesspiegel.de/themen/reportage/putin-kritiker-in-moskau-erschossen-gab-der-kreml-den-mord-an-boris-nemzow-in-auftrag/11439522.html kaj http://www.laender-analysen.de/russland/pdf/RusslandAnalysen292.pdf.

[108] Vd. http://russian.rt.com/inotv/2015-03-07/ZHanna-Nemcova-Otec-pogib-geroem, http://gordonua.com/news/worldnews/ZHanna-Nemcova-ob-ubiystve-otca-Versiya-sledstviya-smeshna-i-bessmyslenna-Narod-CHechni-ego-ochen-uvazhal-71512.html

[109] Vd. http://www.zeit.de/politik/ausland/2015-06/pussy-riot-tolokonnikowa-russland-putin.

[110] Vd. http://www.zeit.de/politik/ausland/2015-06/ilja-ponomarjow-interview-opposition-in-russland-ist-roulette.

[111] Vd. http://www.refworld.org/docid/55c4816a4.html, http://www.swissinfo.ch/ger/prozess-gegen-ukrainischen-filmemacher-senzow-in-russland-begonnen/41561138, http://www.tagblatt.ch/aktuell/international/international-sda/Regisseur-aus-Ukraine-vor-russischem-Gericht;art253652,4297440, http://www.zeit.de/politik/ausland/2015-07/russland-ukraine-prozesse-politische-gefangene.

deĵoro ĉe la estona-rusa landlimo en septembro 2014, daŭre troviĝas en rusa malliberejo.[112] Tiel, Moskvo kolektis kelkajn ostaĝojn por havi ion en la mano por povi timigi la opozicion kaj ĉantaĝi eksterlandon. Ĉiuj tiuj senfimaj rusaj provokoj, kidnapoj, arestoj kaj procesoj estis akre kritikataj internacie. Entute la justico de Ruslando postlasas tian impreson, ke ĝi estas misuzata de la politiko por persekuti neplaĉajn personojn kaj organizaĵojn kaj por venĝi sin kontraŭ malŝatataj individuoj kaj ´malamikaj´ ŝtatoj.[113]
Turmentado: Laŭ la raporto de AI okazis pluraj kazoj, en kiuj homoj, kiuj faris juran plendon, estis devigataj retiri ĝin. Esploroj pri turmentado restis senrezultaj kaj sensekvaj. Kiel dum la stalinisma tempo, „konfesoj“, kiuj estis faritaj sub premo aŭ post turmentado, estis konsiderataj de la tribunaloj kiel validaj pruviloj. Nur en malmultaj kazoj, kie iuj homrajtaj asocioj engaĝiĝis favore al la viktimoj, la supozeblaj kulpantoj estis akuzitaj. Iu sendependa kontrolkomisiono dokumentis indikojn pri turmentado kaj aliaj mistraktoj de malliberuloj en la sverdlovska regiono. AI mencias ankaŭ alian similan kazon.
Norda Kaŭkazo: Kiel ankaŭ la internacia gazetaro raportis, la situacio en la respublikoj de Norda Kaŭkazo restis daŭre malstabila kaj danĝera. Sovaĝaj armataj grupoj atakis anojn de sekurecaj servoj. En diversaj atencoj pereis ĉirkaŭ 200 homoj, inter ili multaj civiluloj. Dum operacoj en Dagestano, Kabardio-Balkario kaj Ĉeĉenio, kie validas propraj leĝoj, okazis drastaj lezoj de la homaj rajtoj, arbitraj arestadoj, turmendatoj, mistraktadoj kaj ekstertribunalaj ekzekutoj. Pluraj homoj malaperis. Ramzan Kadyrov, la ĉefa potenculo de Ĉeĉenio, elpuŝis krudajn minacojn kontraŭ atencantoj, ekzemple ke oni kruele venĝos sin, detruos iliajn domojn kaj forpelos ilin de la lando. Tiel, minimume 15 domoj kun nemalmultaj loĝantoj, ankaŭ infanoj, estis bruligitaj aŭ detruitaj. Kiam iuj defendantoj de la homaj rajtoj dum iu gazetara konferenco protestis kontraŭ tiuj krimoj, oni ĵetis ovojn kontraŭ ilin. Kadyrov riproĉis al la estro de la homrajta asocio „Joint Mobile Group“, Igor Kaljapin, ke li subtenas terorismon, kaj en Groznyj, la ĉefurbo de Ĉeĉenio, kies centro estis bele rekonstruata, en la oficejo de tiu organizaĵo eksplodis incendio. La viktimoj de krimoj kontraŭ homaj rajtoj praktike havis neniun eblecon jure defendi sin, ĉar la punjustico neglektis siajn devojn kaj probable estis metata sub premo flanke de plej altaj politikaj instancoj. Raporti pri lezataj homaj rajtoj estis malfacile kaj danĝere. Supozeble ekzistas multaj kazoj, kiuj ne fariĝis kaj ne fariĝos konataj aŭ publikaj. Ĵurnalistoj kaj juristoj, kiuj volis raporti pri tiaj kazoj, estis minacataj kaj ĉikanataj de policistoj. La engaĝata aktivulo R. Kutaev estis arestita kaj turmentata per batoj kaj elektroŝokoj. La dagestana juristino S. Magomedova, kiu estis atakita de policistoj, kiam ŝi volis viziti klienton en iu policejo, daŭre ricevis anonimajn minacojn, kaj ŝiaj oficialaj plendoj ne estis traktataj.[114]

Hinda Unio (Barato)

Enkonduko: Grandaj problemoj de la homaj rajtoj en Hinda Unio (Barato, Hindio), kiu estas konsiderata kiel la plej granda demokratia ŝtato de la mondo,[115] estis en 2014/15, ke multaj lezoj kaj lezantoj ne estis persekutataj, malgraŭ progresintaj leĝreformoj. Oftaj viktimoj de tiuj lezoj estis/as infanoj, virinoj, senkastuloj (dalitoj[116]), indiĝenoj (adivasi[117]) kaj aliaj. Daŭre okazis arbitraj arestoj, malliberigoj, turmentoj, mistraktoj kaj ekstertribunalaj ekzekutoj. La justico havis tro da laboro kaj limigatajn financojn je dispono, kio kaŭzis, ke mistraktataj viktimoj ne ricevis justecon kaj akuzitoj ne ricevis (justan) proceson. Malbona estis la situacio en la nordorientaj federaciaj ŝtatoj, precipe en Ĵammuo kaj Kaŝmiro kaj en aliaj regionoj, kie armataj grupoj aŭ maoismaj bandoj[118] estis aktivaj kaj endanĝerigis civilulojn. En Uttar Pradeŝo kaj aliaj federaciaj ŝtatoj oni observis religie kaj etne motivatan perforton. Korupto, diskriminacio kaj kvereloj inter anoj de diversaj kastoj estis disvastigataj. Narendra

---

[112] Vd. http://baltische-rundschau.eu/welt/estnischer-geheimdienstler-eston-kohver-entfuehrt, https://www.siseministeerium.ee/en/eston-kohver, http://www.aljazeera.com/indepth/opinion/2015/03/forget-eston-kohver-150315112432470.html.
[113] Vd. ekzemple http://de.sputniknews.com/panorama/20150819/303881165.html kaj http://www.nzz.ch/international/europa/20-jahre-gefaengnis-fuer-ukrainischen-regisseur-1.18601575.
[114] Pliaj informoj pri la situacio de la homaj rajtoj en Ruslando vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Menschenrechte_in_Russland. (Esperanto-versio mankas!)
[115] Laŭ la Indekso pri demokratio de la gazeto Economist Hinda Unio situis en 2014 sur la kompare bona 26a loko tuj post Francio kaj Belgio kaj antaŭ Italio, Estonio kaj Israelo! Malpli ĝojiga estas la rezulto en la Indekso pri percepto de korupto de Transparency International, laŭ kiu Hindio okupas la 69an lokon post Kubo, Turkio, Kuvajto kaj Sudafriko sed tamen troviĝas antaŭ Bulgario, Grekio, Italio kaj Rumanio. Laŭ la Indekso pri libereco de la gazetaro de Freedom House, kiu taksas la gazetaran liberecon en Hindio nur parte libera, Hindio okupas la 80an de 199 rangoj kune kun Kroatio kaj Serbio; laŭ la listo de Reporteroj sen limoj Hindio troviĝas sur la 140a de 180 rangoj. Malgraŭ mankoj, la gazetaro de Hindio estas konsiderata kiel la plej libera en sudorienta Azio kaj la gazetara merkato prosperegas. Tamen, en la provincoj ĵurnalistoj riskas esti ĉikanataj kaj atakataj de pagataj agresuloj, precipe se ili raportas pri korupto inter lokaj politikistoj. Tial, multaj ĵurnalistoj cenzuras sin mem. En Kaŝmiro, kie ĵurnalistoj ne povas libere labori, la interreto estas ofte interrompata aŭ fermata. Ĉar la Monda Pac-Indekso, kiu donas la Hinda Unio nur la 144an de entute 162 rangoj, oni devas konkludi, ke Hindio apartenas al la plej malpacaj landoj de la mondo, kio draste kontraŭdiras la kompare bonan rangon de Hindio sur la Indekso pri demokratio!
[116] Vd. http://eo.wikipedia.org/wiki/Dalito.
[117] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Adivasi.
[118] Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Naxalite.

Modi, la nova ĉefministro de la Hindia Popolpartio (BJP), promesis plibonigi la aferojn. La raporto de AI ne emfazas la gigantajn malriĉecon kaj malpurecon en Hindio, kiuj estas neimageblaj almenaŭ por eŭropaj dimensioj, kaj kiuj certe estas la ĉefaj kaŭzoj por multaj problemoj kaj malsanoj, kiuj en tiu lando ankoraŭ ne estas solvataj aŭ venkataj.
Arbitraj arestoj kaj malliberigoj de protestantoj, ĵurnalistoj kaj homrajtaj defendantoj estas kutimaj en Hindio. Inter aprilo kaj julio 2014 estis registritaj 123 arbitraj arestoj plus 203 arbitraj mallberigoj. Ĉe 1,25 miliardoj da enloĝantoj tiu nombro ŝajnas esti treege malalta. La aŭtoritatoj utiligis la leĝan eblecon de la „administra arestado" por malliberigi ĵurnalistojn kaj homrajtajn defendantojn sen formala akuzo aŭ jura proceso. En regionoj, kiuj troviĝas sub maoisma influo, precipe indiĝenoj estis koncernataj de arbitraj arestoj. Homaj rajtoj estis ankaŭ lezataj surbaze de misuzataj leĝoj por kontraŭbatali terorismon, kiuj ne konformas al internaciaj normoj.
Armataj grupoj: Atakoj de armataj grupoj kontraŭ senkulpaj civiluloj estis observataj en diversaj federaciaj ŝtatoj. Viktimoj estis vunditaj, mortigitaj aŭ forpelitaj, ilia posedaĵo estis detruita. Ankaŭ en diversaj kunpuŝiĝoj inter armataj grupoj kaj policaj fortoj mortis civiluloj. En la ŝtato Assamo armataj grupoj estis kulpigataj pri tio, ke ili mortigis islamanojn kaj indiĝenojn.
Infanaj rajtoj: En aŭgusto 2014 la registaro submetis al la parlamento modifitan version de la leĝo pri la junulara punkodo. En Bangaloro sesjara knabino estis seksperfortita, kaj kazoj de korpa punado estis registrataj, kvankam tio estas malpermesata. Leĝaj reguloj, laŭ kiuj ankaŭ infanoj de socie minoraj familioj devas esti akceptataj de la privataj bazaj lernejoj, ne ĉiam estis respektataj, kaj infanoj de indiĝenoj kaj senkastuloj estis diskriminaciataj en la lernejoj. En Hindio ekzistas grandega diferenco inter diversaj grupoj de infanoj rilate ilian aliron al la kleriga kaj sansistemo kaj al pura trinkakvo. Grandaj problemoj estas ankaŭ infana laboro kaj infana komerco.
Perforto inter etnaj kaj religiaj grupoj: En la ŝtato Uttar Pradeŝo tensioj inter hinduoj kaj islamanoj estis observataj, same en aliaj ŝtatoj. Kazoj de perforto, kiuj kaŭzas viktimojn, ne ĉiam estis jure esplorataj. Miloj da forpelataj islamanoj ne rajtis reveni en siajn vilaĝojn. Centoj da nefinataj (kaj pli malnovaj) juraj kazoj ne estis retraktataj aŭ estis neglaktataj de la justico kaj polico pro manko de pruvoj. En diversaj ŝtatoj estis observataj perfortaj konfliktoj inter anoj de diversaj kastoj.
Konsultado ĉe grandaj ekonomiaj projektoj: Ŝtataj instancoj kaj entreprenoj lezis la rajton de la popolo esti konsultata en kazoj de grandaj ekonomiaj projektoj, precipe en la karbomineja branĉo. Iu nova leĝo eĉ protektas la entreprenistojn kontraŭ la rajtoj de la surlokaj loĝantoj, kies konsento ne plu estas bezonata, se la ŝtato volas akiri/konfiski grundon por realigi certajn konstru-projektojn. La koncernaj responsuloj de tiuj projektoj ne sufiĉe bone informas la lokan loĝantaron pri la sekvoj de tiaj projektoj. Krom tio, la koncerna ministerio nuligis la moratoriojn por la konstruado de novaj industriaj projektoj en regionoj kun aparte drasta malpurigo de la naturo kaj aero. Por miloj da homoj, precipe indiĝenoj, ekzistis la danĝero esti forpelataj. Tamen, centoj da permesoj por la karbominado estis nuligitaj de la Supera Juĝejo. Viktimoj de la katastrofo de Bhopalo (1984) ankoraŭ suferas malbonan sanon pro la sekvoj de tiu akcidento, kaj la usona kemia entrepreno, kiu estis respondecigita por la akcidento, rifuzis aperi antaŭ la tribunalo. La purigo de la ĉirkaŭaĵo de la koncerna fabriko en Bhopalo ankoraŭ ne estis efektivigita.
Mortpuno kaj ekstertribunalaj ekzekutoj: La Supera Juĝejo plibonigis la rajtojn de homoj, kiuj estis kondamnitaj al la mortpuno. En Mumbajo iu tribunalo aljuĝis la mortpunon al tri homoj, kiuj seksperfortis virinojn. Laŭ nova leĝo, la mortpuno estas antaŭvidata por ripeta seksperfortado. La mortpuno povas esti aljuĝata ankaŭ en kazo de perforta okupado (kidnapado) de aviadilo, se viktimoj mortas pro tio. La Supera Juĝejo okupiĝis ankaŭ pri kazoj de pli ol 1500 homoj, kiuj mortis dum speciale provokataj ´kunpuŝiĝoj´ kun la polico en la ŝtato Manipuro, kiuj estis interpretitaj kiel ekstertribunalaj ekzekutoj. Similaj kazoj okazis en la ŝtatoj Uttar Pradeŝo, Raĵastano kaj Guĵarato (en 2004).
Libera esprimo de opinioj: Ĉi-koncernaj leĝoj, kiuj ne kongruas kun internaciaj normoj, estis misuzataj por ĉikani kaj persekuti ĵurnalistojn, homrajtajn aktivulojn kaj homojn, kiuj libere esprimis sian opinion. Lige kun parlamentaj balotoj sennombraj personoj estis arestitaj, al kiuj estis riproĉite, ke ili kalumniis la ĉefministron Modi. La aŭtoritatoj limigis la opinian liberecon en la interreto kaj alprenis rimedojn por severigi la kontroladon de la interreta kaj telefona komunikadoj. Informoj pri la rimedoj ne estis donataj. (La vorton cenzuro oni tamen ne legas en la raporto de AI).[119]
Senpuneco: Sekurecaj kaj armeaj fortoj, kiuj lezis homajn rajtojn, ne estis persekutataj aŭ akuzataj, nek punataj, kaj ĉi-koncernaj leĝoj, kiuj ebligas imunecon kontraŭ tiaj krimoj, daŭre validis, malgraŭ protestoj de homoj, ekzemple en Ĵammuo, Kaŝmiro, Nagalando, Manipuro, Punĵabo kaj Assamo.
Rajtoj de seksaj minoritatoj: La Supera Juĝejo konfirmis en decembro 2013 la artikolon 377 de la hindia punkodo, laŭ kiu samseksemaj aktivecoj estas punendaj, konforme al la konstitucio. Tiel, ĝi nuligis la decidon de pli malsupera instanco, kiu permesis tiajn agojn. Antaŭ la parlamentaj balotoj de majo 2014 gravaj politikaj partioj pledis por la abolo de tiu artikolo. En aprilo la Supera Juĝejo tamen konfirmis en epokfara maniero la juran agnoskon de transgenruloj.[120] Tamen, estis raportite pri ĉikanoj kaj perforto kontraŭ tiu minoritato.

---

[119] La 1an de aŭgusto 2015 la hindia registaro faris retpaĝojn kun pornografia enhavo ne plu alirebla. La subita blokado eksplodigis akran diskuton pri la libereco de opinioj, cenzuro kaj civitanaj rajtoj (vd. http://www.nzz.ch/international/indien-ohne-porno-1.18589664).
[120] Pri tiu minoritato vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Transgenrulo.

Rajtoj de laboristoj kaj virinoj: Ĉar senskrupulaj perantoj kaj falsistoj de vizoj ne estis sufiĉe kontrolataj, gastlaboristoj el Hindio, kiuj iris labori en la Proksiman Orienton, precipe Irako, riskis esti ekspluatataj kiel sklavoj kaj fariĝi viktimoj de homa komercado kaj aliaj homrajtaj misuzoj aŭ trafis en malfacilan situacion inter batalantaj grupoj. Milionoj da homoj estis devigataj labori kiel dependuloj[121] en la agrikulturo, fabrikado de tegoloj, en la minado, silka kaj kotona produktadoj. Ekzistas raportoj pri mistraktado, precipe de virinoj, kiuj laboras kiel domservistinoj. Leĝoj por protekti virinojn kontraŭ perforto ne estis sufiĉe efektivigataj. Seksperfortado en la geedzeco ne estis agnoskita kiel krimo, se la edzino estis pli aĝa ol 15-jara. Precipe en la vilaĝoj ekzistas formoj de memjustico, kiu diskriminacias kaj arbitre punas knabinojn kaj virinojn pro malrespektado de sociaj normoj. Lige kun perforto kontraŭ virinoj UN kritikis Hindion, ke la viktimoj ne ricevas monrekompencon kaj ke la kulpantoj ne estas akuzataj aŭ punataj kaj postulis plibonigi la situacion per diversaj efikaj rimedoj kaj metodoj. En novembro 2014 en la ŝtato Ĉatisgaro mortis 16 virinoj, post kiam ili partoprenis en iu amasa steriligo. Ŝajnas, ke la familia planado preferas kvantajn rezultojn anstataŭ kvalitaj.
Neperfortaj politikaj malliberuloj kaj situacio en prizonoj: AI raportas pri tri kazoj de tiaj homoj, kiuj kaŭzis ioman internacian atenton pro la specifaj cirkonstancoj de ilia situacio. Gravega problemo estas la situacio de malliberuloj, kiuj troviĝas en prizonoj en esplora aresto. En decembro 2013 en hindiaj malliberejoj troviĝis 278´000 personoj en tia aresto, kio estas pli ol du trionoj de ĉiuj malliberuloj en Hindio. Proporcie tro multe reprezentataj estis anoj de senkastuloj, indiĝenoj kaj islamanoj. Grandaj problemoj de la hindia justic-sistemo estas arbitraj arestoj, tro longaj esploradoj kaj procesoj same kiel mankantaj juraj helprimedoj kaj nesufiĉa protekto kontraŭ tro longa arestado. Por iom senŝarĝi la situacion, la Supera Juĝejo ordonis al la distriktaj juĝistoj libergi tiujn prizonulojn, kiuj jam sidis tro longe en malliberejo. En la ŝtataj malliberejoj estis aplikataj turmentado kaj alia mistraktado. Viktimoj de tiaj faroj fariĝis precipe virinoj, senkastuloj kaj indiĝenoj. Ekzistis klopodoj por starigi leĝon kontraŭ turmentado. En la policejoj de la ŝtato Maharaŝtro devis esti instalataj kontrol-kameraoj por malebligi turmentadon.
Ĉikanoj kontraŭ NROj: La aŭtoritatoj (mis)uzis iun leĝon pri la financado de eksterlandaj NROj por ĉikani asociojn de la civila socio, kiuj ricevis monon el eksterlando. Koncernataj ne estis unuavice klasikaj homrajtaj grupiĝoj (kiel en Ruslando) sed grupoj, kiuj kritikis la grandajn infrastruktrajn kaj minejajn projektojn kaj la nukleajn centralojn. Tiuj grupoj estis alfrontataj per enketoj flanke de la aŭtoritatoj, kiuj minacis ilin per juraj esploroj aŭ blokado de mono, kiun ili ricevis el eksterlando. Ŝajnas, ke la enlanda sekreta servo aparte interesiĝas pri tiaj organizaĵoj, kiuj laŭdire „negative influas la ekonomian evoluon“.

Ĉinio (Ĉina Popola Respubliko)

Enkonduko: La totalisma komunisma reĝimo en Ĉinio daŭre estas drasta ekzemplo kiel bazaj homaj, individuaj kaj civilaj rajtoj estas grandstile, sisteme kaj intence lezataj. La opinia libereco estis rigore malhepata de la aŭtoritatoj, kaj politike engaĝataj civitanoj kaj homrajtaj defendantoj devis riski ĉikanadon kaj arbitran arestadon. Turmentado kaj mistraktado estas vaste aplikataj, kaj multaj viktimoj ne havis la eblecon ricevi justecon antaŭ la tribunalo. Precipe etnaj minoritatoj kiel tibetanoj kaj ujguroj, kies teritorioj estas daŭre okupataj de Pekino, estis subpremataj.[122] Neniam antaŭe ol en 2014 tiel multaj laboristoj strikis kaj postulis pli altajn salajrojn kaj pli bonajn laborkondiĉojn. En novembro 2013 la CK de KPĈ prezentis malneton de ampleksaj ekonomiaj kaj sociaj reformoj. La partio planas ankaŭ reformojn en la juro kaj justico. Krom tio oni planas fermi la ´gulagon´, t.e. koncentrejojn por „reeduki“ homojn kadre de la sistemo „Lao Dong Gai Zao“ (mallonge Laogai), kio signifas „reformon per laboro“. Tiu sistemo, kiun konsistigas 1000 malliberejoj, estas la plej ampleksa gulaga sistemo post la fino de Sovetunio.[123] La ŝtatprezidento Xi Jinping persone akcelis la batalon kontraŭ koruptaj partianoj. En tio ne estas klare, ĉu li celas serioze kontraŭbatali la korupton en si mem aŭ nur elimini rivalojn, kiuj endanĝerigas lian monopolan potencon, laŭ stalinisma maniero. La rangoj de Ĉinio en diversaj mondaj indeksoj pri demokratio, gazetara libereco, korupto kaj paco estas ege malbonaj.[124] Internaciaj plendoj kaj protestoj pri la homrajta situacio

[121] Pri tiu statuso vd. sub https://eo.wikipedia.org/wiki/Kvazaŭsklavigo_pro_ŝuldoj.

[122] Mapon de la okupataj teritorioj en Ĉinio vd. sub http://www.hist-chron.com/as/china/China-04/020-karte-China-besetzungen-1947-1962.jpg.
[123] Pli da informoj pri tio vd. sub http://www.igfm.de/china/laogai.
[124] Rilate la diversajn liberecojn, Ĉinio prezentas la plej malbonajn ciferojn de BRICS. Laŭ la Indekso pri demokratio de la gazeto Economist Ĉinio situis en 2014 sur la 144a de 167 rangoj. Laŭ la Indekso pri percepto de korupto de Transparency International Ĉinio okupas la malbonan 100an de entute 174 rangoj. Laŭ la Indekso pri libereco de la gazetaro de Freedom House Ĉinio okupas la mizeran 186an de entute 199 rangoj, kaj laŭ la listo de Reporteroj sen limoj ĝi eĉ okupas nur la 175an de 180 rangoj, do troviĝas preskaŭ ĉe la fino de la listo. La gazetaro de Ĉinio estas severe cenzurata kaj kontrolata; la propaganda ministerio diktas la tonon kaj tarifon pri la informoj, kiuj devas aperi. Pri tiklaj temoj kiel ekzemple membruligo de tibetanoj oni ne rajtas raporti. La ĉina fajromuro blokas multajn retpaĝojn, ankaŭ en Fejsbuko, Jutubo kaj Tvitero. En Ĉinio ekzistas plej multaj arestitaj ĵurnalistoj kaj bloguloj en internacia komparo. Probable la interetnaj kaj sociaj konfliktoj kaŭzas malkontenton ĉe pli kaj pli vastaj tavoloj en Ĉinio, kontribuas al tio, ke tiu ĉi lando okupas nur la 108an lokon de 162 rangoj sur la Monda Pac-

en Ĉinio preskaŭ ne plu aŭdiĝas aŭ estas nur rande esprimataj, ĉar la industriaj ŝtatoj timas la koleron de la potenculoj de Ĉinio kaj ne volas fuŝi la bonajn rilatojn kun la registaro en Pekino, de kiu granda parto de la mondo ekonomie plene dependas. Pri la nova leĝo pri sekureco, kiun la parlamento en Pekino akceptis la 1an de julio 2015, observantoj timas, ke ĝi malbonigos la situacion de la homaj rajtoj.[125]

Arbitraj arestoj, turmentado kaj mistraktado, mortpuno: En decembro 2013 Ĉinio oficiale abolis la fifaman gulagan sistemon „Reedukado per laboro" kaj anstataŭigis tiun sistemon per aliaj ne malpli rigoraj rimedoj, kies karaktero ankoraŭ estas tro malmulte konata. En Ĉinio ekzistas sekretaj prizonoj. La polico, kiu kutime ege nervoze reagas al tia aferoj, (mis)uzis ´bagatelajn´ kulpojn kiel „kverelemon", „instigadon de konfliktoj" aŭ „ĝenadon de la publika ordo" kiel pretekstojn por aresti politike engaĝatajn civitanojn. Partiaj membroj, kiuj estis akuzitaj pro korupto, estis arbitre malliberigitaj kadre de la discipliniga sistemo „ŝuanggui", sen la ebleco vidi familianojn aŭ povi konsulti juriston. Ankaŭ turmentado kaj mistraktado de malliberuloj estis kutimaj. La raporto de AI mencias plurajn kazojn en la provinco Heilongjiang. Kulpantoj kaj respondeculoj estas nur malofte akuzataj kaj punataj.

Produktado kaj eksporto de turmentiloj: Ĉinio povis firmigi sian internacian pozicion rilate la produktadon kaj eksportadon de varoj, kiun aĉetas ĉefe klientoj de la punjustico. Al tiuj kontestataj kaj parte malpermesataj varoj apartenas elektrikaj batiloj kaj piedkatenoj, kiuj estas ŝarĝataj per peziloj, sed ankaŭ larmiga gaso aŭ diversaj policaj aŭtomobiloj, kiuj estas misuzeblaj en la subpremado de homoj, kvankam ili estas konformaj al la leĝo. Ĉinio eksportis tiajn varojn sen sufiĉa eksporta kontrolo en landojn, kiuj mem grandstile lezas la homajn rajtojn. Al la ´progresoj´ apartenis, ke pro manko de pruvoj personoj, kiuj estis kondamnitaj al la mortpuno, tamen ne estis ekzekutitaj.

Homrajta defendado, libera esprimado de opinioj, religia libereco, aliaj rajtoj: Homrajtaj defendantoj devis elteni ĉikanojn, arbitrajn arestojn, restadojn en malliberejoj, turmentadon kaj aliajn mistraktojn. Unu el ili forpasis en iu malsanulejo, ĉar liaj vivorganoj estis difektitaj. La koncernita persono, Cao Sunli, estis arestita en la pekina flughaveno, kiam ŝi volis flugi al Svislando. Dum la jaro 2014 la rimedoj kontraŭ civilsocie engaĝataj personoj iĝis pli drastaj. Personoj, kiujn oni suspektis aparteni al la „Nova Civitana Movado", ricevis punojn de du ĝis ses jaroj da restado en malliberejo. Lige kun la 25a memortago pri la subpremo kaj likvido de la protestmovado sur la placo Tiananmen en 1989 estis arestitaj pli ol 60 civitanoj. Kelkaj el ili devis pasigi la tempon en esplorarestejo, inter ili la konata juristo Pu Zhiqiang. Krom tio, la ĉina registaro klopodis sisteme malhelpi kaj limigi la liberecon kaj fluon de neformalaj informoj. Fine de 2013 KPĈ instalis grupon „por la kunordigo de la sekureco en la interreto" (sic), ĉefe por kontraŭbatali „malamikajn ideologiajn influojn el eksterlando". En junio 2014 aperis malneto kun novaj dekretoj, laŭ kiuj juristoj estonte ne plu rajtu trakti kazojn de homrajtaj defendantoj, verki publikajn leterojn kaj kritiki la politikon de KPĈ kaj de la registaro. Krom tio, la registaro aperigis dekreton, laŭ kiu ĵurnalistoj ne plu rajtas raporti pri temoj, pri kiuj ili ne kompetentas (sic) aŭ publikigi kritikajn artikolojn en la interreto, kiuj ne estas permesataj de iliaj labordonantoj (sic). Aŭtoroj, kies artikoloj en la interreto estis legataj pli ol 5000 fojojn, estis arestataj kaj malliberigataj, kaj iuj ĵurnalistoj estis akuzataj, ekzemple Gao Yu kaj Xian Nanfu, pro la diskonigo de informoj, kiuj estis konsiderataj kiel „ŝtataj sekretoj"; en la televido ili devis publike konfesi siajn „krimojn" antaŭ ol la jura proceso komenciĝis. Homoj, kiuj praktikis religion, kiu estas malpermesata de la ŝtato, estis ĉikanataj, arbitre arestataj, malliberigataj, turmentataj aŭ alimaniere mistraktataj. Precipe en Sinkiango la aŭtoritatoj rigore severigis la rimedojn kontraŭ praktikantoj de la islamo. En la provinco Zhejiang okazis grandkalibra kampanjo kontraŭ la konstruado de kristanaj preĝejoj kun la klarigo, ke la konstruaĵoj ne konformas al la leĝoj. Sekve, la aŭtoritatoj ordonis detrui tiajn preĝejojn kaj forigis krucojn. Diservoj de privataj „dompreĝejoj" estis malpermesataj, kaj anoj de la religia movado Falun-gong estis persekutataj. Kvankam en principo geedzoj rajtas havi nur unu infanon, estis permesataj ankaŭ esceptoj por havi du infanojn. Kvankam laŭ revizio de la „hukou"-sistemo migrantaj laboristoj povas pli facile migri al pli grandaj urboj, multaj el ili estis devigataj postlasi siajn infanojn en la vilaĝoj, de kie ili devenas, kaj la aliro al la lerneja, sana kaj pensia sistemoj dependis de la „hukou"-statuso.

Etnaj kaj religiaj minoritatoj, Singkiango/Ujgurio, Tibeto k.a.: Treege malbona estas la homrajta situacio en la okupataj teritorioj de Sinkiango (Ujgurio) kaj Tibeto. Tiuj provincoj estas brutale subprematajde Pekino. En la *Ujgura* Aŭtonoma Respubliko (Sinkiango) la ŝtataj ĉinaj instancoj kulpigis ujgurojn pri la instigado de perforto kaj aplikis drastajn rimedojn kontraŭ ili. Kiel preteksto kutime servas „terorismo" kaj „religia radikalismo". Tiel, en majo 2014 pli ol 200 suspektataj „teroristoj kaj ekstremistoj" troviĝis en malliberejoj kaj 23 „terorismaj bandoj" estis disbatataj. Kadre de la kampanjo kontraŭ ili, 55 personoj, probable temis pri ujguroj, estis prezentitaj en sporta stadiono antaŭ 7000 ĉeestantoj kiel kulpantoj pri terorismo kaj aliaj krimoj. Okazis ankaŭ incidentoj, kiuj kaŭzis dekojn da mortigitoj, sed la informoj pri tiuj okazaĵoj restas kontraŭdiraj. En septembro 2014, Ilham Tohti, ujgura sciencisto kaj fondinto de la retujo *Uighur online*, estis kondamnita al dumviva arestpuno en malliberejo, post kiam li estis kulpigita pri „separatismo", alia taŭga preteksto por persekuti homojn krom terorismo kaj religia radikalismo. Kiel ĉefaj pruvoj por tiu verdikto servis iuj artikoloj, kiujn Tohti publikigis en la interreto. Tohti ne nur ne ricevis

---

Indekso. Malgraŭ enorme rapida ekonoma kresko, kun sia 104a de entute 175a rangoj en la Monda Evolua Indekso Ĉinio restis kompare malriĉa lando.

[125] Vd. http://www.spiegel.de/politik/ausland/china-bekommt-weitreichendes-sicherheitsgesetz-a-1041548.html.

juran helpon, sed li estis ankaŭ turmentata kaj malsatigata. *Tibetanoj* estis daŭre kaj same diskriminaciataj kiel antaŭe kaj iliaj rajtoj libere praktiki siajn religion kaj kulturon aŭ libere esprimi opiniojn kaj libere kunveni estis limigataj. Aro de tibetaj monaĥejestroj, verkistoj, aktivuloj kaj protestantoj estis arestataj kaj malliberigataj. En aŭgusto 2014 en Kardze/Ganzi en la provinco Siĉuan ĉinaj policistoj pafis kontraŭ tibetaj manifestantoj. Sep tibetanoj bruligis sin mem por protesti kontraŭ la ĉina subpremado. La nombro de publike konataj kazoj kreskis al 131. Al la familianoj de viktimoj la ĉinaj aŭtoritatoj riproĉis, ke ili „instigis“ aŭ „kunlaboris“ al tiuj membruligoj. Personoj, kiuj rilatas kun Dalai Lama, kiu daŭre estas konsiderata kiel ŝtata malamiko de Ĉinio, aŭ havas kontaktojn kun eksterlando, estis observataj kaj malhelpataj praktiki gvidajn funkciojn aŭ kandidatiĝi en komunumaj balotoj.
Hongkongo kaj Macau: En 2014 en *Hongkongo* okazis amasprotestoj por postuli pli da demokratiaj rajtoj, en kiuj partoprenis pli ol duonmiliono da homoj. La ĉinaj aŭtoritatoj, kiuj regas kaj kontrolas Hongkongon ekde ĝia redono al Popola Ĉinio en julio 1997, reagis nervozege kaj arestis centojn da protestantoj. Kiam la 3an de oktobro granda grupo de kontraŭuloj atakis la manifestantojn, okazis ankaŭ seksperfortado de virinoj kaj knabinoj. Kiam la polico likvidis la manifestaciojn fine de novembro, polica perforto estis aplikata kontraŭ la manifestantoj. Andy Tsang, la polica ĉefo de Hongkongo, informis, ke 955 personoj estis arestitaj. Sendependaj ĵurnalistoj estis malhelpataj de la ĉina polico raporti pri la okazaĵoj. Timo pri la stato de la opinia libereco aperis, kiam en januaro 2014 la ĉefredaktoro Kevin Laŭ Ĉun-to devis forlasi sian laborlokon ĉe la taggazeto *Ming Pao*. Sub lia gvido ĝi raportis pri lezataj homaj rajtoj kaj kritikis la maladekvatan konduton de altrangaj ĉinaj oficistoj en Hongkongo kaj Ĉinio. Aliaj ĵurnalistoj kritikis, ke la televida kanalo Television Broadcast Limited praktikis memcenzuron. Malfacilan situacion havas ankaŭ eksterlandaj labormigrantoj en Hongkongo, da kiuj ekzistas ĉirkaŭ 300´000, inter ili multegaj virinoj. Ili fariĝis viktimoj de malpermesata homkomercado, de arbitraj traktado kaj misuzado kaj de la limigo de iliaj rajtoj. En *Macau*, iama portugala kolonio, kiu en 1999 fariĝis speciala administra zono de Ĉinio, la kazo de universitatano, kiu postulis pli da demokratio, vekis atenton. Li estis suspendata de sia ofico pro „disvastigo de politikaj konvinkoj“ inter studentoj. Post esplorado de la afero lia laborkontrakto ne estis daŭrigata. Alia simila kazo koncernis la universitaton São José, kies rektoro maldungis iun scienciston, kiu esprimis sian politikan konvinkon. Konklude: En ĉiuj landoj, kiujn Ĉinio okupas, administras, regas kaj kontrolas, ĝi aŭtomate subpremas kaj limigas la demokration, diversajn liberecojn kaj homajn rajtojn.[126]

Evoluo de la homrajta situacio sub Xi Jinping:
http://www.nzz.ch/international/asien-und-pazifik/folter-sippenhaft-willkuerjustiz-1.18652214
http://www.nzz.ch/international/asien-und-pazifik/sippenhaft-in-china-1.18631623
http://www.nzz.ch/international/chinas-stahlhelm-fraktion-obsiegt-1.18653000

Sudafriko

Enkonduko: Tribunalaj esploroj venis al la konkludo, ke la polico de Sudafriko aplikis ekscesan perforton, respondecis por ekstertribunalaj ekzekutoj kaj ne sufiĉe protektis la kvartalojn, kie loĝas malriĉuloj. Ekzistis kazoj de detruado de posedaĵoj kaj forpelado de rifuĝintoj kaj azilpetantoj. Al la progresoj apartenas, ke por pacientoj de HIV/Aidoso kaj seksaj minoritatoj la kondiĉoj iom pliboniĝis, Homrajtaj defendantoj devis elteni timigojn kaj minacojn. La rangoj de Sudafriko en diversaj mondaj indeksoj pri demokratio, gazetara libereco, korupto kaj paco estas parte sufiĉe, parte nur meze bonaj.[127]
Ekscesa polica perforto: En aŭgusto 2014 34 strikantaj laboristoj, tri aliaj laboristoj, du policistoj kaj du sekurecaj oficistoj de iu platinminejo en Marikana estis mortigitaj de policistoj, kiuj dispafis pli ol 600 kartoĉojn kun la celo senarmigi la strikantajn laboristojn. Post tio komenciĝis jura proceso. Estis trovitaj indikoj, ke la polico klopodis kaŝi faktojn kaj detrui pruvilojn por trompi la esplorkomisionon, tiel ke altrangaj policistoj rifuzis kunlabori kun la komisiono. Dum la proceso estis analizata ankaŭ la demando pri la respondeco por la koncerna entrepreno, kiu funkciigas la minejon, rilate la protekton de la laboristoj. Finfine la ŝtato retiris la akuzojn kontraŭ 270 personoj, kiuj partoprenis en la striko.
Mortpuno, ekstertribunalaj ekzekutoj kaj turmentado: En septembro 2014 iu civitano de Bocvano estis resendita al sia lando, kiu tie estis akuzita pro diversaj krimoj, por kiuj oni povas ricevi la mortpunon, kvankam la sudafrikaj aŭtoritatoj ne ricevis certigon de la bocvanaj aŭtoritatoj, ke tiu homo ne estos mortigita. 27 policistoj de la grupo „Cato Manor Organised Crime Unit“, kiuj estis akuzitaj i.a. pro la murdo de iu sudafrikano, devis aperi

[126] Pliaj informoj pri la situacio de la homaj rajtoj en Ĉinio vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Menschenrechte_in_der_Volksrepublik_China. (Esperanto-versio mankas!)
[127] Laŭ la Indekso pri demokratio de la gazeto Economist Sudafriko situis en 2014 sur la sufiĉe bona 29 de 167 rangoj, tuj post Italio kaj antaŭ Portugalio kaj Estonio, Latvio kaj Litovio, Pollando kaj Grekio. Laŭ la Indekso pri percepto de korupto de Transparency International Sudafriko okupas la 67an de entute 174 rangoj, inter Turkio kaj Grekio kaj antaŭ Italio. Laŭ la Indekso pri libereco de la gazetaro de Freedom House Sudafriko okupas la 71an de entute 199 rangoj kune kun Hungario, Mongolio kaj Malio; laŭ la listo de Reporteroj sen limoj ĝi okupas eĉ pli bonan 39an de 180 rangoj. Kvankam laŭ la Monda Evolua Indekso (Human Development Index) Sudafriko estas la ´plej riĉa´ lando de ´nigra´ Afriko, ĝi tamen situas nur sur la 111a rango (de 175), post Ĉinio, Irano, Moldavio, Vjetnamio kaj Sirio.

antaŭ la tribunalo en Durbano. Kontraŭ anoj de la sudafrika polico (SAPS) kaj de punjusticaj instancoj estis regule farataj riproĉoj pro turmentado. La konstitucia tribunalo decidis, ke la anoj de SAPS estas devigataj esplori riproĉojn pro lezado de homaj rajtoj.
Rifuĝintoj kaj azilpetantoj: Dum la jaro 2014 estis registritaj sennombraj kazoj de perforto kontraŭ rifuĝintoj, azilpetantoj kaj migrantoj, de detruoj kaj prirabado de centoj da malgrandaj vendejoj kaj loĝejoj. 1600 homoj en 7 provincoj estis koncernataj de forpelado, inter ili 76 somalianoj. Unu rifuĝinto estis mortigita kaj 10 estis vunditaj. AI riproĉis al la sudafrika registaro, ke ĝi ne faris sufiĉe multe por protekti rifuĝintojn. La Apelacia Kortumo alprenis decidon favore al iuj azilpetantoj, kiuj volis ricevi licencon por komerci. 17 civitanoj de Konga Demokratia Respu-bliko troviĝis dum 17 monatoj en esploraresto antaŭ ol ilia jura proceso komenciĝis. La akuzatoj riproĉis al la aŭtoritatoj, ke ili estis turmentataj kaj izolataj dum sia esploraresto.
HIV/Aidoso: Granda kaj tipa problemo por landoj de Afriko kaj ĉefa mortokialo ĉe gravedaj kaj naskontaj virinoj kaj knabinoj en Sudafriko estas la infektiĝo per HIV/Aidoso. Precipe en la provincoj Mpumalanga kaj KwaZulu-Natal la morteca kvoto ĉe virinoj estas daŭre tro alta, kvankam ĝi iom falis en 2014. La registaro anoncis plibonigi la aliron al koncernaj santraktado kaj informado. Multaj mortkazoj povus esti evitataj, se la virinoj ricevus aŭ povus ricevi la necesajn terapiojn kaj informojn pli frue. Ĉefaj kaŭzoj de la prokrastoj estas malfidemo pri la sanservo, timo antaŭ HIV-testoj, nesufiĉa informado kaj mankanta malmultekosta transportado al la sancentroj (ĉar la plimultaj virinoj estas tre malriĉaj).
Seksaj minoritatoj: En 2013/14 minimume kvin personoj estis murditaj, inter ili tri lesboj (lesbaninoj), evidente ĉar ili apartenis al seksaj minoritatoj. En novembro 2014 unu viro estis jure kulpigita de la Supera Juĝejo en Johannesburgo, ĉar li seksperfortis kaj murdis lesbon. En majo 2014 Sudafriko subtenis la adopton de la rezolucio 275 de la Afrika Komisiono pri homaj kaj popolaj rajtoj. Ĉi tiu rezolucio alvokas la ŝtatojn batali kontraŭ perforto kaj misuzo surbaze de la seksa orientiĝo de homoj.
Homrajtaj defendantoj: Membroj de la registaro metis la „Oficejon por publikaj plendoj“ (Office of the Public Protector) sub premo, tiel ke eblas paroli pri intenca timigo. Temis pri la esplorado de la fraŭdado de impostmono fare de prezidento Zuma, kiun la Oficejo efektivigis; al la prezidento oni riproĉis, ke li financis sian privatan vilaon per publika mono. Alia ĉikano okazis kontraŭ reprezentanto de la NRO „Social Justice Coalition“, kiu kolektis pruvojn por esplori korupton inter policistoj kaj la nesufiĉan polican protektadon en iu mizerula kvartalo. Aktivuloj de la NRO „Treatment Action Campain“, kiuj okupiĝis pri sano favore al HIV-infektitoj kaj pri korupto ĉe provincaj oficistoj de la ANC, kiu regas Sudafrikon ekde 1994, ricevis minacojn kaj estis mistraktataj, precipe en la provinco Free State.

Kelkaj finaj rimarkoj

Certe, ne ĉiuj landoj kaj unuopaj kazoj, kiuj estas menciitaj de la raporto de AI, povis esti reflektataj en ĉi tiu studo, ĉar tiam necesus traduki la tutan libron. Kaj certe, la montritaj ekzemploj de lezataj homaj rajtoj, kiuj estis menciitaj ĝis nun, povas doni nur supraĵan impreson pri la ekzistantaj problemoj, kiuj prezentas probable nur la pinton de la glacimonto. Samtempe, ili montras ekzistantajn kaj malfacile solveblajn kazojn, situaciojn, tendencojn kaj tradiciojn en la sistemoj de la unuopaj landoj, kiujn Amnestio Internacia kaj aliaj homrajtaj organizaĵoj klopodas registri, analizi kaj kritiki. Per la raporto de AI, kiu estas iusence ankaŭ skurila testamento de la psikpatologio de ideoj, kiujn la homoj elpensas por turmenti siajn terajn kunestulojn, oni konatiĝas kun la vundaj punktoj kaj la kriterioj pri lezataj homaj rajtoj, kiuj estas sisteme atentindaj kaj pedante observendaj. Praktike en ĉiuj landoj de la mondo, ankaŭ en la modernaj demokratiaj industriaj ŝtatoj de la Okcidento, AI observis kaj daŭre registras gravajn lezojn de la homaj rajtoj. La ŝtataro estas konfrontata kun la riproĉo, ke oni ne nur permesas terurajn krimojn kontraŭ la homeco kaj homaro, sed ankaŭ ke oni faris kaj faras tro malmulte aŭ nenion por plibonigi la situacion de la homaj rajtoj kaj la sorton de homoj kaj viktimoj, kiuj estis trafitaj de perforto, subpremo kaj aliaj krimoj.

En multaj landoj la registaro kaj polico malhelpis/as al Neregistaraj Organizaĵoj, precipe homrajtaj asocioj, plenumi ties laboron favore al la civila socio. Por kontraŭbatali la influon de tiaj organizaĵoj, ekzemple en Ruslando, Ĉinio kaj Hindio, estis adoptitaj leĝoj, kiuj praktike proklamis la militon al tiaj organizaĵoj, kies kunlaborantojn oni klasifikas nedeziratаj „eksterlandaj agentoj“. Lastfoje en la tempo de la stalinismo okazis tiaj aferoj. Estas mirinde, ke landoj kaj registaroj, kiuj enkondukas, adoptas kaj aplikas tiajn metodojn, ne sentas senliman hontegon.

Ĉu ne estas ankaŭ rimarkinde, ke ekzemple en Vaŝingtono, Damasko, Moskvo, Abuĵo, Bangkoko aŭ Kolombo – pri Teherano, Riado, Hanojo kaj Havano ni tute ne parolu – politikistoj, policistoj, soldatoj kaj aŭtoritatuloj permesis abomenajn lezojn de la homaj rajtoj plej ofte sub la pretekesto de la „nacia sekureco“? Ŝajnas ke Ruslando, kiu pretendas esti gvida morala instanco en la nomo de la ortodoksa mondo (kies reprezentantoj kutime mem aprobas la militojn kaj benas la krimojn, kiujn iliaj ŝtatoj faras kaj lanĉas, ekzemple en Kaŭkazio kaj Ukrainio), kaj aliaj volonte imitas la ekzemplon de tiuj ŝtatoj, ripetante la samajn krimojn laŭ la moto: Kion vi rajtas fari, tion ankaŭ ni rajtas fari. Tiel longe, ke la liberaj demo-kratiaj landoj de la Okcidento, kiuj (prave) plej laŭte pledas por la respektado de la homaj rajtoj, parte mem lezas ilin, ilia kritiko kontraŭ la ´kanajlaj´ ŝtatoj, kiuj grandskale, sisteme kaj intence lezas la homajn rajtojn, senskrupule kaj senhonte misuzante la situacion, ne sonas tre kredinde.

Eble la sola signifa sukceso por la homaj rajtoj sur internacia nivelo estas registrebla en formo de kontrakto aŭ traktato, kiu estis ratifita de la ŝtataro la 24an de decembro 2014, kvazaŭ kiel donaco okaze de Kristnasko: Temas pri la *Internacia Konvencio pri komercado per armiloj*.[128] Luktante por tia konvencio dum jardekoj, AI ĉiam devis aŭdi la respondon, ke tia interkonsento estas malverŝajna aŭ malebla. Ĉar tiaj atingoj tamen okazas, AI estas konvinkita, ke ankaŭ la situacio de la homaj rajtoj mem estas plibonigebla.

Pli da informoj pri la kriteriaro praktikata de *Amnestio Internacia* rilate la homajn rajtojn vd. sub
http://www.amnesty.ch/de/themen/menschenrechte/menschenrechte-faq
kaj pli da informoj pri la historio kaj esenco de la homaj rajtoj vd. sub
https://eo.wikipedia.org/wiki/Homaj_rajtoj (prefere konsultu la anglan, germanan kaj francan versiojn)
Raportojn de *Human Rights Watch*, alia grava homrajta organizaĵo vd. sub
https://www.hrw.org/sites/default/files/wr2015_web.pdf
https://www.hrw.org/sites/default/files/wr2014_web.pdf
https://www.hrw.org/sites/default/files/wr2013_web.pdf
Internationale Gesellschaft für Menschenrechte: http://www.igfm.de.
Gesellschaft für bedrohte Völker: http://www.gfbv.ch/de/kampagnen___projekte/straflosigkeit_russland.cfm.

Pri la ĝusteco aŭ aktualeco de la informoj prezentitaj en tiu ĉi raporto garantio ne ekzistas.
© Prilaborita de A. Künzli, Svislando. Originale verkita en Esperanto kaj publikigita sur www.planlingvoj.ch en aŭgusto 2015. La aŭtoro (nask. 1962 en Svislando) studis slavan filologion, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la zurika universitato kaj finis siajn studojn en 1992 per la akademia grado lic. phil. (M.A.)

[128] Vd. https://www.amnesty.de/2014/12/23/waffenhandelsvertrag-tritt-kraft kaj
http://en.wikipedia.org/wiki/Arms_Trade_Treaty (Esperanto-versio mankas).